


EL POPOLA ĈINIO

中国新闻

2 1987





Pleziuro

Lernejo en printempo



FLOROJ

KAJ VIVO

Fotoj de SEN ŬEJ



Aĉeto de floroj

Ĉinoj ofte komparas ion bonan en la vivo kun floroj kaj havas ĉiam la kutimon kultivi kaj ĝui florojn. La popola vivo estas nedisigebla de floroj. Kampanoj rigardas ilin kiel simbolon de feliĉo kaj ŝatas glui

sur fenestro papertondaĵojn en formo de floroj, kio montras ilian ĝojon. Knabinoj nature ŝatas florojn. Ili portas florde-segnajn vestojn, florojn sur la kapo kaj korp-ornamojn kun floraj inkrustaĵoj kaj brodaĵoj.

Geamantoj donacas bukedon por esprimi sian amon kaj emeritoj kultivas florojn por pasigi sian maljunecon. Ĉie bonodoras belaj floroj, ĉu en la promenejoj, ĉu apud etaĝdomoj, ĉu sur balkonoj. Ili plezurigas homojn kaj sentigas al ili kvietecon.

Knabinoj kun floroj sur la kapo





Papertondaĵoj sur fenestro de kamparana familio

Bukedo, simbolo de amo



En korto



Enhavo

Cinio servas al la mondo per sia spaconaviga tekniko	2
Spaconaviga inĝeniero Zoŭ Gŭangĵuj	10
Vojaĝo en Hulun Bujr (II)	11
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (2): Impona fonto de Jangzi-rivero	65
JUBILEA JARO DE ESPERANTO: Babelo estos nepre konstruita	15
Vizito al Janĝji	18
Kio estas omnicidio?	51
SUR NIA LIBROBRETO: Pri "La Feliĉa Birdo" kaj aliaj libroj	22
POR KOMENCANTOJ: Lotuso	23
ESP-NOVAJOJ	24
Juna komponisto	26
NOVELO: Popola muziko (daŭrigo)	29
ĈINA LITERATURO: Ĉju Jŭan kaj liaj verkoj	38
Travado de rivero	43
ĈINAJ ARTOJ: Arto de sigelila gravuro	31
Fiŝhokado sur maro	44
Amo de maljunuloj	46
Muzeo de Antikvaj Sonoriloj en Pekino	49
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Silka vojo	52
ĈINAJ POŝTMARKOJ: Poŝtmarkoj pri antikvaj moneroj	64
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (VII)	55
Loĝantaro kaj perspektivo de urboj	56
KURANTAJ AFEROJ	58
AMUZO	55
INTER NI: Opinioj pri "Instruisto Mi", "Ĉinaj Vegetaraj Pladoj" kaj aliaj artikoloj	20
SUR LA KOVRILLO: Ji-nacieca danco	penetraĵo de FU ĜJUN
TRA NIA LENSŬ: Bela Kanasi	

JARABONTARIFŬ		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	5.00	US\$	6.50


ĈINIO SERVAS AL LA MONDO PER SIA SPACONAVIGA TEKNIKO


La ĉina spaconaviga afero en 1986 estas celebrinda. Tiujare Ĉinio akiris plian sukceson en lanĉo de sputnikoj kaj subskri-

bis kun sveda kaj usonaj kompanioj memorandon kaj interkonsenton pri sputnik-lanĉo por ili per ĉinaj transportaj raketoj.

Elektris la internacian scienc-teknikan merkaton la informo, ke Ĉinio lanĉos sputnikojn por fremdaj landoj, precipe por

Ekflugas la transporta raketo por lanĉi revenigeblan sateliton.





Teknikisto faranta la lastan kontrolon de monitora ekipaĵo

Usono kun alta spaco-tekniko. La internacia publiko bonvenigas Ĉinion kiel novan membron de la sputniko-lanĉaj landoj. Nemalmultaj spaconavigaj oficistoj kaj fakuloj de la okcidentaj landoj opinias, ke Ĉinio per tiu ago montris sian penadon en sia modernigo.

La 11-an de oktobro 1986, plia ĉina sputniko de teritoria prospektado akurate revenis la teron laŭplane post kvintaga flugado sur la orbito, ricevinte grandan kvanton da teknikaj donitaĵoj. Ĝi, kiel la 19-a sputniko de Ĉinio, estis lanĉita per la transporta raketo "Longa Marŝo 2" en okcidenta Ĉinio la 6-an de oktobro. Ĝis nun Ĉinio lanĉis sume ok revenigeblajn sputnikojn kaj sukcese reprenis ilin ĉiujn.

Revenigebla sputniko (ĝenerale ĉi tie temas pri ĝia revena

kajuto) estas tiu, kiu revenas teren post finplenumo de la difinitaj taskoj en la spaco.

La procezo de surorbitigo de sputniko estas tiu de akcelado kaj plialtigo. Kontraŭe, por akurate kaj sekure revenigi kajuton surteren necesas deorbitigo kaj iom-post-ioma reduktado de ĝia rapideco kaj alteco, por ke ĝi surteriĝu je rapideco de kelkdek ĝis kelke da metroj sekunde. Tio estas tekniko kun granda malfacileco. Nun nur Usono, Sovetunio kaj Ĉinio lanĉis kaj reprenis tiajn sputnikojn.

En 1956 Ĉinio starigis sian unuan raket-esploran instituton. Nun ĝi havas siajn farejojn kaj eksperimentejojn kun kompletaj fakoj, kiuj konsistigas kompletan sistemon de esplorado, projektado, provfarado, eksperimentado kaj fabrikado, kaj sta-

rigis kunlaboran reton de scienc-esplorado kaj farado en la landa skalo. La transportaj raketoj "Longa Marŝo 2" kaj "Longa Marŝo 3" faritaj de Ĉinio povas lanĉi malsamtipajn sputnikojn.

Laŭ kontrakto subskribita en 1986 Ĉinio lanĉos por Svedio poŝt-sputnikon per sia transporta raketo "Longa Marŝo 2", du komunikajn sputnikojn por la Terresat-a Korporacio de Usono, unu komunikan sputnikon por Okcidentunia Telegrafa Kompanio kaj du sputnikojn por Dominion Vide-Satelita Kompanio per sia transporta raketo "Longa Marŝo 3". Ili estas la unuaj sputnikoj lanĉotaj de Ĉinio por aliaj landoj, post kiam ĝi eniris en la merkaton de sputnikolanĉo. Krome, aliaj komunikaj kaj disaŭdigaj kompanioj de Usono, komercistoj de Britio, Nederlando, Hindio, In-



Komputilistoj

donezio, Aŭstralio, Kanado, Brazilo, Francio, Libio, Pakistano kaj aliaj landoj pere aŭ senpere interkonsiliĝis kun Ĉinio pri lanĉo de sputnikoj. Ankaŭ kompanioj de iuj aliaj landoj kontaktiĝas kun Ĉinio tiurilate.

La spaconaviga tekniko de Ĉinio estas alloga por eksterlandaj klientoj pro tio, unue, ke la tekniko de sputnikolanĉo estas konfidinda; due, la prezo por tia servo estas je 10-15% pli malalta ol tiu de internacia merkato; kaj trie, la Ĉina Popola Asekura Kompanio estas preta kunlabori kun la Internacia Asekura Kompanio kaj preni kompletan asekuran rimedon al sputnikolanĉo kaj la asekura prezo estas pli malalta ol tiu en internacia merkato.

Kompreneble, iuj eksterlandanoj havas dubon aŭ maltrankvilon pri la servo mem. Unue, pro leĝa obstaklo. Ili opinias, ke la plejparto de sputnikoj estas muntita per pecoj produktitaj de Usono. Tio signifas, ke antaŭ ol transporti sputnikon al Ĉinio ĝia posedanto devas peti eksportan permeson de la usona registaro kaj koncernaj internaciaj instancoj. Koncerne tion, vicministro de la Spaconaviga Industria Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko Sun Ĝjadong diris: "Mi kredas, ke nin subtenos registaroj usona kaj alilandaj, ĉar ni ĉiuj faras bonon por la homaro." Li diris ankaŭ, ke la ĉina popolo estas malkaŝema kaj honesta kaj neniel celas akiri eksterlandan teknikon pri sputniko per tia servo. La klien-


toj, kiuj timas, ke la tekniko difuziĝos, povas sendi kontroli la tutan procezon de la lanĉo.


Due, iuj dubas, ĉu ĉina transporta raketo povas surorbitigi sputnikon multe pli grandan ol tiu lanĉita de Ĉinio kaj ĉu Ĉinio povos lanĉi tiom da sputnikoj en unu jaro. Pri tio ĉina spaconaviga specialisto Ĵen Ŝinmin diris, ke Ĉinio havas sperton en uzado de motoro kun ultrahipotemperaturaj likvaj hidrogeno kaj oksigeno kaj povas fari transportan raketon kun pli granda ŝarĝkapablo. La ĉina spaconaviga departemento jam prenis rimedojn "pligrandigi la puŝforton de motoro" kaj "redukti la pezon de strukturo" por fari pli perfektan transportan raketon. □




Satelito reveninta surteren

Muntado de komunika satelito







La Ĝiĉjŭan-a Satelita Lanĉejo en nokto



Muntado de kovrilo de raket-komutilo


Kontrolo de lineoj de raketo






Kontrolo de mezur-lineoj

Surtera monitorado ĉe riceva anteno



Kunligo de korpartoj de raketo



Novaj Libroj

eldonitaj de la

Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ĉina Antologio (1919 — 1949) (n-ro 10-Es-2064S) £ 6,40 US\$ 9,80

Kolekto de 55 noveloj, raportaĵo, eseoj kaj poemoj de la plej famaj ĉinaj verkistoj de tiu periodo, inkluzive de Lusin, Maŭ Dun, Bakin, Laŭ Ŝe, Gŭo Moĵŭo k.a. La libro vive spegulas la socian vivon en la tiama Ĉinio.

Oranĝa Umbrello (10-Es-1979P) £ 1,10 US\$ 2,15

Kolekto de mikronoveloj montranta la ĉiutagan vivon de ordinaraĵoj ĉinoj.

Gaŭ Ŝiĉji: Aŭtobiografio de Bakterio (13-Es-1982P) £ 0,90 US\$ 1,60

Per viglaj lingvaĵoj la aŭtoro priskribas la vivon de bakterio. Ĝi estas interesa popular-sciencia legaĵo.

Kuracaj Manĝaĵoj (15-Es-2047P) £ 0,65 US\$ 1,25

Receptoj de kuracaj kaj sanigaj manĝaĵoj.

Ĉinaj Familiaj Pladoj (15-Es-2061P) £ 1,10 US\$ 2,15

Receptoj de ĉinaj pladoj facile pretigeblaj en familio.

Tajĝiĉŭan (17-Es-2065P) £ 1,30 US\$ 2,50

Speco de ĉina tradicia luktarto. Kiel saniga gimnastiko ĝi taŭgas precipe por maljunuloj kaj malsanuloj.

Ĉinlingva Konversacio (9-CEs-2070P) £ 1,10 US\$ 2,15

Elementa kurso konversacia de la ĉina lingvo pri ĉiutaga vivo.

Gvidlibro pri Pekino (12-Es-2067P) £ 1,55 US\$ 2,85

Ĝi servas kiel helpanto al eksterlandaj gastoj en vizito al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn ktp., kun mapo kaj koloraj bildoj.

Vojaĝo tra Ĉinio (85-Es-284P) £ 8,80 US\$ 12,50

Albumo pri 24 turismaj urboj de Ĉinio, kun koloraj bildoj.

Pejzaĝoj de Pekino (87-EsEC-535) £ 0,50 US\$ 0,95

Serio da koloraj poŝtkartoj.

Pejzaĝoj de Ĉinio (87-EsEC-534) £ 0,65 US\$ 1,30

Serio da koloraj poŝtkartoj.

Mendu ĉe UEA, perantoj de EPC aŭ la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Zoŭ Gŭangjŭj en laboro

La unua eksperimenta komunika sputniko de Ĉinio estis tuj lanĉota en Ŝjĉang de Siĉŭan-provinco. La loka klimato permesis lanĉi ĝin en nokto. El la du ĉefaj aparatoj de la sputniko por mezuri ĝian rivoluon, unu povas labori nur en sunradioj kaj la alia povas akiri precizajn donitaĵojn nur en la orbito fore de la terglobo. Pro tio, kiel sukcesigi la lanĉadon en nokto fariĝis la lasta malfacila problemo.

En tiu ŝlosila momento la mezaĝa inĝeniero Zoŭ Gŭangjŭj prezentis metodon mezuri sputnikan pozon laŭ ĥaosaj signoj ĉe la komenco de lanĉo per pretigitaj aparatoj de sputniko. Tiu metodo post kalkulado kaj simula eksperimentado estis transdonita al uzo kaj unuafoje sukcesigis la lanĉon.

La inĝeniero estas vicestro de la Kibernetika Instituto en Pekino sub la Ministerio de la Spaconaviga Industrio de Ĉinio. Preskaŭ ĉiuj aŭtomataj sistemoj por sputnikoj lanĉitaj de Ĉinio estas tie produktitaj. Mi vizitis Zoŭ Gŭangjŭj en lia kabineto en la "Scienca Urbo" de la nord-okcidenta Pekino.

52-jara Zoŭ Gŭangjŭj estas afabla kaj facile alirebla. Li prezentis al mi sian instituton. Ĝi konsistas el ok esploraj sekcioj kaj unu prilabora fabriko,

KONG ŜING:

Spaconaviga inĝeniero Zoŭ Gŭangjŭj

kun sume 800 laborantoj, inkluzive de pli ol 30 superaj inĝenieroj kaj ĉ. 400 inĝenieroj kaj asist-inĝenieroj. Ili plejparte estis studentoj aŭ esplorstudentoj diplomitaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Zoŭ diplomiĝis en 1960 el la Harbin-a Politekniko de nordorienta Ĉinio kaj de tiam li laboras en la instituto.

Li naskiĝis en Gajŝjan-gubernio de Ljaŭning-provinco en 1934. Lia patro estis vilaĝa instruisto. 5-jara li komencis viziti elementan lernejon kaj finlernis kursojn de mezlernejo en 4 jaroj. Li pasie ŝatis matematikon en sia infanaĝo kaj estis honorita de siaj kunlernantoj kiel "matematika majstro". En universitato li studis pri la fako de kibernetiko kaj memlernis ĉiujn kursojn de mikrofiziko.

En 1962 Zoŭ Gŭangjŭj montris sian talenton en grava scienca esplorado de la ŝtato. Poste li plurfoje sukcese gvidis gravajn esplorojn kaj eksperimentojn. En 1970 li komencis esplori aŭtomatan sistemon de komunika sputniko kaj gvidis la tutan esploradon.

"Tiam iuj landoj faris al ni rigoran blokadon kaj ni devis fari ĉion per nia penado. La plej grava reg-aparato en la sputniko estas suno-impresigema aparato, kiu regas la rivoluajn pozon kaj precizecon de la sputniko," diris Zoŭ Gŭangjŭj. Li kaj liaj kolegoj konsultis preskaŭ ĉiujn materialojn troveblajn enlande. Post longtempa esplorado ili prezentis teorion pri tia aparato sur

la bazo de la teorio pri rotacia inercio de turbo kaj tiu de elektrono kaj elfaris la aparaton. Tia aparato garantias al la anteno ekzaktan direktiĝon al la tero, kiam sputniko devias de sia normala orbito.

Unu el la gravaj kaŭzoj de la malsukceso en lanĉado de iuj komunikaj sputnikoj iafoje kuŝas en tio, ke ili ne povis venki la interferadon de sunradioj. La sputniko en la orbito ricevas sunradiaĵan interferon 300-oble pli fortan ol sur la tero. Por ekzameni eltenpovon de sputniko kontraŭ la sunradia interfero, oni nepre devas enpreni surtere tiel fortajn sunradiojn, t.e., sunajn transruĝajn radiojn. Tiu metodo estis elpensita de Zoŭ Gŭangjŭj kaj liaj kolegoj post pli-ol-unu-jara esplorado. La donitaĵoj resenditaj de la poste lanĉita sputniko koincidis kun tiuj akiritaj en la eksperimentado.

Zoŭ Gŭangjŭj vivas en feliĉa familio. Lia edzino Li Ŝufan laboras kiel kontistino en la instituto. Ili havas du filinojn. Li ŝatas fiŝhoki kaj legi klasikajn literaturaĵojn. Sed pro okupiteco en laboro li malofte tiom faras. Tamen lia absorbiĝo en la kariero ne malhelpas lin esti modela edzo kaj bona patro. En libera tempo li laŭeble faras dommastrumajn laborojn, ekz., aĉeti manĝaĵojn, grenon, lavi vestojn ktp. Ĉiufoje, kiam li revenas de la lanĉejo, li portas por sia juna filino papiliajn specimenojn. □

VOJAGŔO EN HULUN BUJR (II)

SOLENA SURSTĒPA OBOKULTO

La 8-an de aŭgusto 1986 okazis obokulta aktivado sur la monto Baŭgdeŭla en Ŝin Barag Joŭĉji. Posttagmeze de la 7-a ni aŭtoveturis sudokcidenten de Hajlar. La senlima stepo aspektis kiel vasta maro kaj la vojo, sur kiu kuris nia aŭto, etendiĝis foren. La aŭto tangis kiel ŝipo. Sur la vojo longa pli ol 300 kilometrojn sporade vidiĝis mongolaj jurtoj, bovaroj kaj ŝafaroj. Post la komenca ekscitiĝo ni dronis en veturado monotona, kapturna kaj laciga.

Kvankam ondetanta estas la stepo, tamen rara estas tiom abrupte leviĝanta montpinto, kia Baŭgdeŭla, kiun la mongoloj kultas kiel dian monton. Sur la montpinto staras alta 3-etaĝa altaro el ŝtonoj. Ĉe la mezo de la altaro staras alta ligna kolono, kiu aspektas kiel pagodeto. Ĝi estas nomata *obo*. Obokulto estas la plej solena aktivado de la mongoloj. Oni diris, ke kiam nebone kreskas herboj pro trosekeco, la tieaj mongoloj iras tien kulti *obon* por peti pluvon.

Kiam ni atingis la piedon de la dia monto, ni absorbiĝis en la

spektaklo. Ni kvazaŭ estis en alia mondo. Tie kolektiĝis ĉ. 10 000 partoprenantoj en belaj mongolaj roboj. Iuj venis tien surĉevale, aliaj per ĉaroj kune kun siaj familianoj. Ĉe la montpiedo dislokiĝis multaj jurtoj, kiuj servis kiel iliaj portempaj ripozejoj kaj loĝejoj. Multaj komercistoj metis siajn varojn sur la herbejo por faciligi la klientojn. Nia aŭto haltis inter diversgrandaj aŭtoj, traktoroj kaj motorcikloj. Mi ne sciis, de kie ili venis.

Iris bonorde la ĉevala vetkuro kaj luktado, organizitaj de

Evenkaj virinoj en dancado



lokanoj. Ĉevala vetkuro, luktado k.a. estas popularaj ĉe la mongola popolo. La surstepa vivo faris ilin serenaj, kuraĝaj kaj firmovolaj. La ĉeval-vetkurado iris sur hipodromo longa 15 kilometrojn, en kelkaj grupoj laŭ la aĝoj de la rajdistoj kaj ĉevaloj. Por malpezigi la ŝarĝon de la ĉevalo, oni elektis junajn rajdistojn kaj ne selis la ĉevalojn. En belaj vestoj kaj kun buntaj ĉapoj kaj ruĝaj aŭ verdaj silkkrubandoj sur la kapo, ili aspektis aparte viglaj. Ĉiuj luktistoj portis tradiciajn naciajn vestojn. Post multfoja luktado venis rezulto de la konkurso. La venkintoj estis premiitaj. Kiam ili, kondukante sian ĉevalon kun arĝenta selo, iris ĉirkaŭ la kunvenejo, ili estis aplaŭdataj de la rigardantoj.

Poste, mi sekvis la homfluan al la montpinto laŭ la montvojo. Oni en longa vico sin movis antaŭen. Iuj tenis en la mano longajn stangojn kun ruĝaj aŭ verdaj silkkrubandoj, aliaj laŭte kantis. Multaj el ili rajdis sur


ĉevalo. Sur la montpinto mi vidis, ke sur la *obo* pendas buntaj silkkrubandoj, sur la altaro metiĝas multaj specoj da vino kaj manĝaĵoj. Ĉe la altaro sidis bonzo, kiu voĉlegis sutron. Ĉiuj kultantoj estis viroj, kaj la virinoj ne devas suriri la dian monton laŭ moro de la mongoloj. Verŝante la vinon kaj ŝutante manĝaĵojn sur la *obon*, la kultantoj en vicoj de maldekstre dekstren trifoje iris ĉirkaŭ la *obo* kaj kantis por peti pacon kaj feliĉon.

Eble estis hazarde, ke kiam nia aŭto reiris de la dia monto, ekpluvis, kio aldonis al la obokultado ian misteran koloron. Ni foriris malproksimen. Retrorigardante la dian monton vualitan de nigraj nuboj, mi esperis, ke pli abunde pluvas por ke la kreskaĵoj pli prosperiĝu.

NADAMO POR VIRINOJ

Nadamo, signifanta amuzon en la mongola lingvo, estas de antikva aktivado de la mongoloj, evenkoj kaj dahuroj vivantaj sur la stepoj. La nuntempa Nadam-

Lukto de virinoj en Nadam-foiro



La Tanino-ekstrakta Fabriko en konstruado

foiro konsistas el sportaj konkursoj kaj varinterŝanĝo. Antaŭe okazis inter viroj la tradiciaj ĉeval-vetkura, lukta kaj sagopafa konkursoj, tamen ankaŭ virinoj nun partoprenas ilin. Ĉifoje mi havis ŝancon apreci propraokule la Nadam-foiron partoprenatan nur de virinoj sur la stepo Hulun Bujr.

La 10-an de aŭgusto, por celebri la inaŭguron de la aktivada centro de virinoj en Hujsumu de la Evenka Aŭtonoma Subregiono ĉiuj evenkaj virinoj kolektiĝis ĉe la loko kaj okazigis amuzadon, konkursojn kaj aliajn. Hujsumu nombras nur pli ol 3 000 loĝantojn, sed la nombro de la partoprenantoj, kiuj venis el ĉiuj lokoj, superis 1 000. Varma atmosfero regis en la foiro.

En gaja muziko, en evenkaj vestoj la 11 virinaj teamoj eniris en la foiron firmaŝe. Ili dancis nacian dancon preterpasante la podion. Post la malfermo komenciĝis konkurso de kanto kaj danco. La dancaj kaj kantaj trupoj de diversaj baz-unuoj prezentis programerojn unu post alia. La membroj de la juĝa

komitato, sidantaj sur la podio, ĉeloke juĝis kaj publikigis poentojn kaj rezultojn de konkurso kaj premiis venkintojn.

Post la kanta kaj danca konkurso iris la plej atentoaltira lukta konkurso de virinoj. Estis mirinde, ke en tiu malgranda loko kun nur pli ol 1 000 virinoj, 64 luktantinoj partoprenis la konkurson. Kiel viroj, ili en tradiciaj naciaj vestoj kaj kun rajdistaj botoj kuraĝe luktis en la mezo de la herbejo. Laŭ la konkursa regulo, la luktantoj devas stari vid-alvide; post la signalo de juĝisto ili ekkaptas unu alian kaj piede faligas la rivalon. Kiu tuŝas la teron en la luktado per ia ajn korp parto super la genuoj, tiu estas venkito. Ĉiufoje po 4 el la 32 paroj da rivaloj partoprenis la konkurson. Se la rivaloj estas egalfortaj, do la konkurso prokrastiĝos; se iu multe superas alian, do rapide

finiĝos la matĉo. La luktado inter du paroj da rivaloj eĉ daŭris 10 minutojn sen rezulto, tiam oni devis pesi iliajn korpojn kaj proponis la luktanton, kies korpo estis malpeza, partopreni la sekvantan konkurson. Post 7 streĉaj kaj intensaj matĉoj la partoprenantoj, kiuj gajnis la antaŭajn 4 lokojn, estis premiitaj. La luktantoj sciigis min, ke estas la unua fojo por ili partopreni la konkurson. Kaj estis ankaŭ la unua fojo, ke okazis la lukta konkurso de virinoj en Nadamfoiro. Ilia prezentado plene montris la saĝon kaj kuraĝon de la paŝtistinoj sur la stepo.

VERDA TREZOREJO

Oriente de Hulun Bujr kuŝas la ondanta Granda Ŝing'an-montaro, kie estas la plej granda primitiva arbaro en Ĉinio. Ĝi estas la hejmloko de la ŝing'an-aj larikoj. Tie pli ol 70% de la



Obokulta aktivado

La Granda Ŝing'an-montaro verde vestita





Var-interŝanĝo dum obokulto

arboj estas ŝing'an-aj larikoj kun altaj trunkoj. Ili estas bona konstru-materialo pro sia forti-keco kaj korod-rezisteco. Ili estas bonkvalita ekonomia ar-
bospeco. El ilia ŝelo oni povas elpreni taninon kaj el ilia rezino industrian kolofonon. Krome tie prosperas ankaŭ pli ol 10 specoj de arboj, kiaj betuloj, tremoloj, kverkoj, piceoj ktp. kaj pli ol 3 000 specoj da vegetaĵoj, kiaj arbedoj, herboj, micetoj, likenoj k.a. Tial ĝi ricevis la nomon verda trezorejo.

En la arbaro de la Granda Ŝing'an-montaro vivas pli ol 50 specoj da mamuloj, ĉ. 100 specoj da birdoj kaj multaj sovaĝaj bestoj. Interalie estas cignoj, tetraoj, ruĝvertaj grupoj, ruĝaj

cervoj, nordaj cervoj, kapreoloj, aproj, nigraj ursoj, moskocervoj, lutroj, brunaj procionoj, nordlandaj leporoj, k.a. Ili havas altan ekonomian kaj aprecan valoron. Ĉar la Granda Ŝing'an-montaro estas en altlatituda zono kaj tie regas frosteco, tial peltoj de la tieaj sovaĝaj bestoj estas altvaloraj kaj ĝuas bonan reputacion en- kaj eksterlande.

Pro manko de tempo ni vizitis nur la urbon Jakeŝi kaj Ulĉihan-arbarejon. En la komenco de la 50-aj jaroj Jakeŝi estis nur urbeto, tamen ĝi poste fariĝis la politika, ekonomia kaj kultura centro de la Granda Ŝing'an-montaro, ĉar tie sidas la Forstoadministra Buroo de Jakeŝi de Interna Mongolio. Nun ĝi estas

nova forstokultura urbo. Nia aŭto trapasis vastan betonan straton, ambaŭflanke de kiu staris novaj etaĝdomoj, kaj la arboj kaj verdaĵoj ĉarmas la urbon.

Ni vizitis la plej grandan tani-
no-ekstraktan fabrikan en Azio — la Lignoprilaboran kaj Tani-
no-ekstraktan Kombinaton de Jakeŝi, kiu, prenante larikŝelon kiel materialon, ekstraktas tani-
non, gravan kemi-industrian ma-
terialon, kies produktokvanto konsistigas kvaronon de la totala produktokvanto en la tuta lando kaj kies kvalito estas bona en la lando. Por altigi ĝian produktokvanton oni enkondukas novajn teknikojn kaj ekipaĵojn.

Mi ne drinkas, tamen mi vizitis la Jakeŝi-an Vinfarejon kun granda intereso. Ĝi produktas pli ol 30 specojn da vino, prenante sovaĝajn berojn kreskantajn en la nepoluciita Granda Ŝing'an-montaro kiel materia-
lojn. La speciale produktita ruĝfaba vino en 1985 gajnis arĝentan premion de la ŝtato kaj la speciale produktitaj vakcinia vino, sovaĝfrukta reĝed-
zina vino, sovaĝroza vino k.a. ĉiuj ĝuas altan reputacion en- kaj eksterlande pro siaj koloro, aro-
mo kaj gusto.

Ulĉihan estas la forstumejo plej proksima de Jakeŝi kaj pli frue ekspluatita. Tie ni vizitis plantid-kultivejon, forsto-kulturejon kaj primitivan sekundaran arbarejon. Estis bedaŭrinde, ke pro manko de tempo mi ne profundigis en la Grandan Ŝing'an-montaron, kie kuŝas la bela ĉiela lago de Arksan-monto, la hejmloko de nordaj cervoj Auluguja kaj prezentiĝas la primitiva pejzaĝo de Darbin-lago. Sennombraj vidindejoj kuŝas en la profundo de la densaj arbaroj de la Granda Ŝing'an-montaro. □

BABELO ESTOS NEPRE KONSTRUITA

de LIŬ JONGĈJŬAN kaj LI ŬEJ*



LiŬ Jongĉjŭan kaj Li Ŭej (maldekstre) en interparolo

Depost kiam Dio ordonis malordigi la komunan lingvon de la homaro, jam metiĝas antaŭ diversaj nacioj la problemo venki la lingvan obstaklon. Vivante sur la sama planedo, la homaro, kompreneble, bezonas kontaktiĝon kaj interkompreniĝon, kiuj ĉiam pli oftigiĝas kun la disvolviĝo de la socio. Nun, la modernaj trafikiloj kvazaŭ faris la malproksimajn mondpartojn proksimaj. Tamen, kun ĉiam pli vasta disvolviĝo de la kultura interŝanĝo kaj prosperaj negocoj kaj

flugrapida disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj, la lingva obstaklo ĉiam pli grandiĝas. Neniu, kiu vivas en la moderna socio, ne suferas lingvan obstaklon! Oni povas diri, ke la lingva obstaklo serioze malhelpas la progreson kaj disvolviĝon de la homaro. Eliminado de la lingva obstaklo jam fariĝas por la homaro urĝa, komplika kaj malfacila tasko. Ĉiuj esperantistoj, lingvistoj kaj aliaj interesatoj devas kontribui al solvado de la problemo.

RIMEDOJ POR ELIMINI LA LINGVAN OBSTAKLON

Estas multaj rimedoj por elimini la lingvan obstaklon. Inter ili estas traduko kaj lernado de fremda lingvo. Traduko estas la plej antikva kaj ankaŭ plej grava rimedo. Dum la pasintaj miloj da jaroj helpate de ĝi la diversaj nacioj povis fari interŝanĝon kaj disvolviĝi komune en sciencoj, teknikoj, kulturo, arto kaj aliaj flankoj. Efektive, sen traduko, la homaro ne havus la hodiaŭajn atingojn. Tamen, la tro pezaj kaj malaltefikaj tradukaj laboroj montris sin tro malkonformaj al la nuna informa socio. Kvankam la diversaj landoj kulturas grandnombre tradukajn laborantojn, tamen tio ne povas radikale elimini la lingvan obstaklon.

Ankaŭ lernado de fremdaj lingvoj estas efika rimedo por elimini lingvan obstaklon. Sed sen tia medio, en kiu estas patra lingvo, ellerni iun ajn fremdan lingvon estas malfacilege eĉ por lingvaj genioj. Por lerni fremdajn lingvojn ĉinoj devas elspezi pluroble pli multan tempon kaj energion ol okcidentanoj. Se oni metus tiujn tempon kaj energion en aliajn kreivajn laborojn, kiom da spiritaj kaj materiaj riĉaĵoj ili kreus! Estas nereala la deziro solvi lingvan problemon per popularigo de fremdaj lingvoj. Por tio oni devas oferi multe da tempo kaj energio, kaj eĉ la nacian memrespekton. Kaj krome, el la lernantoj de fremda lingvo malmultaj povas libere uzi fremdan lingvon, eĉ ili efektive posedas fremdan lingvon, ili eble renkontos malfacilojn ankaŭ en kontaktiĝo kun fremdlandanoj.

Apliko de internacia helpa lingvo estas alia rimedo por elimini lingvan obstaklon. De la pazigrafio de Leibnitz ĝis Esperanto de nia genia majstro Zamenhof, aperis pli ol cent diversaj projektoj, el kiuj nur Esperanto eltenis diversajn provojn kaj ludas certgrade la rolon de internacia helpa lingvo. Ni kredas, ke ĉiam pli multaj homoj konos la rolon de Esperanto, kun la senlaciaj kaj fruktodonaj laboroj de la esperantistoj. La perspektivo de Esperanto estas esperiga.

La epokfara invento de komputilo malfermis tute novan vojon al solvo de la problemo de lingva obstaklo. Hodiaŭ maŝina traduko aktualigis en nia vivo. La teknikaj kondiĉoj de maŝina traduko jam maturiĝis kaj ankaŭ la esplora nivelo multe altiĝis. Tradukaj aŭtomatoj de iuj landoj jam aperis en merkato. La tago, kiam furoros maŝinaj tradukaĵoj, ne plu estas malproksima.

Estas menciinde, ke la supre diritaj rimedoj havas siajn avantaĝojn kaj limigitecon respektive, sekve ili bezonas kompletigi unu la alian por ludi pli grandan rolon.

LIGIĜO DE ESPERANTO KUN KOMPUTILO

Esperanto kiel internacia helpa lingvo estas efika instrumento por interŝanĝi pensojn kaj komuniki informojn. Komputilo estas la plej moderna aŭtomato por trakti informojn. La ligiĝo de Esperanto kun komputilo estas evidente necesa kaj havas vastan perspektivon. Oni jam klopodis por tio. Ekzemple, la maŝintraduka sistemo PROTRAN prove fabrikita de la angla kompanio CALIKARN estas transformita sistemo de la ofte uzataj vortoj de Esperanto kaj la angla lingvo. La demanda kaj responda sistemo SQAP estas interparola sistemo inter homo kaj komputilo en la angla kaj sveda lingvoj kaj Esperanto. La maŝintraduka sistemo SUSY de Germanio eksperimentis aŭtomatan tradukon de Esperanto en la germanan lingvon. Ankaŭ ni provfaris maŝintradukan sistemon E-Ĉ/A de Esperanto en la lingvojn han-an kaj anglan kaj sukcese eksperimentis diversajn Esperantajn frazojn.

Tamen tiu laboro ankoraŭ ne komenciĝis efektive kaj ne ricevis sufiĉan atenton de la homoj. Hodiaŭ la komputila scienco rapide disvolviĝas, la koncernaj teknikoj ĉiam pli maturiĝas kaj la produktokosto de komputilo rapide malleviĝis. Multaj landoj jam akiris inspirajn fruktojn en esplorado pri ligiĝo de la propranacia lingvo kun komputilo. Kompare kun la naciaj lingvoj, Esperanto estas logika kaj racia. Pro tio ĝi estas pli konforma al komputilo ol la naciaj lingvoj kaj oni devas pli frue ligi ĝin kun komputilo.

Estas pluraj formoj por ligi Esperanton kun komputilo, ili meritas provon, ekzemple, instalo de donitaĵ-bazo de Esperantaj materialoj. Esperanto kun centjara historio jam akumulis sufiĉe grandan kvanton da valoraj materialoj. Se oni klasifike deponas ilin en komputilon kaj starigas koncernajn donitaĵ-bazojn, tio metas bazon de maŝina tradukado kaj statistiko de Esperanto. Kunlaborante kun specialistoj oni ankaŭ povas instali diversajn fakajn donitaĵ-bazojn, precipe tiuj fakoj kun kompare multaj Esperantaj materialoj devas unue tion fari. Havante tiujn donitaĵ-bazojn, oni povas de komputilo akiri, konsulti, montri kaj kopii materialojn laŭbezono.

Dank' al tio multaj personoj povas samtempe apliki la materialojn.

Krome, helpate de la komputilo oni povas kompili diversajn fakajn vortarojn, terminarojn, plurlingvan vortaron. Oni ankaŭ povas pogranda kopii tiujn vortarojn en moldiskojn por popularigo kaj laŭbezone ilin renovigi kaj rekompletigi.

Oni ankaŭ povas fondi komputilajn analizajn sistemojn de Esperanto, inkluzive vortan statistikon, enketon de lingva uzo, analizon de fonetiko, vortfarado, sintakso kaj semantika rilato. Pere de komputilo, oni povas fari statistikon kaj klasifikon al la lingvaj materialoj. Ekzemple, statistiko de uza frekvenco de vortoj kaj tabeloj de pozitivaj kaj negativaj vortoj estas facile faritaj. La rezultoj kaj donitaĵoj de tiuj analizoj kaj statistikoj estas tre valoraj por esperantologoj en konado de la historio kaj nuna stato de la lingvo kaj en la estonta lingvo-projektado.

ESPERANTO KAJ MAŜINA TRADUKO EN RECIPROKA AKCELO

Maŝintradukaj laborantoj kaj esperantistoj celas forigi lingvan obstaklon, akceli la kulturan kaj teknikan interŝanĝojn, interkomprenon kaj interkredon inter diversnaciaj popoloj, akiri prosperon kaj progreson de la homaro kaj kontribui al mondpaco. La komuna afero kaj peniga tasko akcelis ilian interkomprenon kaj pli bezonas reciprokajn subtenon, informan interŝanĝon kaj kunlaboron. La popularigo kaj disvolviĝo de Esperanto malpezigos la ŝarĝon de maŝina traduko. En la mondo estas miloj da lingvoj, se oni projektus por ĉiu lingvo maŝintradukan sistemon el aliaj multaj lingvoj, do la labora kvanto estus mirige giganta. Se en estonteco Esperanto estus popularigita, ĉiu edukita persono ja ellernus Esperanton krom sian patran lingvon Esperanto fariĝus unika lingvo por maŝina traduko kaj la aliaj naciaj lingvoj estos maŝine tradukitaj. Tiam la tasko de maŝina traduko estus nur esperantigi el naciaj lingvoj. Tiam iu ajn nacilingva verko devus esti metita en koncernan sistemon kaj ricevus sian Esperantan kopion.

Ankaŭ la progreso de maŝina traduko certe akcelos la Esperanto-movadon. Ĉar la nacilingva Esperanta aŭtomata traduka sistemo certe multe pliiĝos la Esperantajn legaĵojn, tio altiros al nia grupo multajn homojn, kiuj uzos tiujn materialojn. Ili tiam opinios ke Esperanto povos liveri plej bonajn valorajn fakajn informojn. Sekve tio apudigos popularigon de Esperanto.

ESPERANTO EBLE KIEL PONTOLINGVO DE MAŜINA TRADUKO

En la estonta socio aŭtomata komputila traduko por multaj lingvoj estos vaste aplikata. Tamen la traduka sistemo por multaj naciaj lingvoj bezonas tre kompleksan projekton, multaj proponas uzi unu lingvon kiel pontolingvon de maŝina traduko. Sed la naciaj lingvoj kun profunda tradicia kutimo havas multajn neraciajn, nelogikajn kaj neregulajn esprimojn kaj vortojn ofte uzatajn, multajn homonimojn, kiuj estas malfavoraj al maŝina traduko. Pro tio esploristoj forlasis provon preni nacian lingvon kiel pontolingvon en maŝina traduko. Oni tuj pensis la artefaritajn lingvojn inkluzive Esperanton.

En Esperanto ne estas vortoj kun multaj funkcioj, kiel en la naciaj lingvoj. Tio multe faciligas aŭtomatan analizon de komputilo. Esperanto estas riĉa je afiksoj, per kiuj oni povas derivi multajn vortojn kaj esprimi delikatan diferencon kaj retorikan koloron. La afiksoj ne nur favoras al senc-elementa analizo de la pontolingvo, povas certigi semantikan rilaton de Esperanto, sed ankaŭ povas malpliigi komputilan deponadon dum kompilado de Esperanta-nacilingvaj vortaroj. Kvankam la senfleksaj vortoj (funkciaj vortoj) en Esperanto estas ankaŭ iugrade plursignifaj, tamen, kompare kun ajna nacilingvo, ili estas normaj, kio multe pli faciligas komputilan analizon kaj transformon inter naciaj lingvoj kaj Esperanto. Esperanto havas historion de 100 jaroj, oni multe esploris ĝin kaj akumulis multajn spertojn. Pro tio plena utiligo de tiu instrumento kiel pontolingvo de maŝina traduko estas favora al la homaro. La projekto DLT efektivigata de la maŝintraduka grupo de nederlanda kompanio BSO ja estas aŭtomata traduka sistemo kun lingvo simila al Esperanto kiel pontolingvo.

La centjaraj faktoj pruvis, ke la idealo de Esperanto konformas al la bezono de la socio kaj la espero de popoloj. Tial ĝi estas vivipova. Tion pravas la disvolva historio de Esperanto. Ni konvinkiĝas, ke post daŭra strebado de pluraj generacioj la babelo estos nepre konstruita kaj la bela idealo de la homaro estos certe realigita. □

* *Liŭ Jongĉjŭan estas eksvicestro de la Lingvistika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, membro de la societo "Amikoj de Esperanto". Li Ŭej estas lingvistika laboranto de esploro pri maŝina traduko. La artikolo estas resumo de la disertaĵo, kiun la aŭtoroj voĉlegis en la Internacia Esperanta Sciencista-Teknikista Kongreso en Pekino 1986.*

VIZITO AL JANĜJI

Malgraŭ la lastatempa statistiko, ke japanoj okupas la duan lokon nur post usonanoj inter la eksterlandaj turistoj al Ĉinio, Janĝji estas nekonata al plimulto de ili. Malferminte sin al neĉinaj vojaĝantoj nur pasint-marte, la urbo ankoraŭ ne troviĝas en la listo de rekomenditaj lokoj en multaj turismaj gvidlibroj pri Ĉinio eldonitaj en Japanio.

Situante je 1 200 km. nord-oriente de Pekino, Janĝji karakterizas sin i.a. pro tio, ke ĝi estas la centro de la ĉ. 2 400 000 korenacianoj en Ĉinio. Ĝia moderna historio originis ĉe 1881, kiam hanoj ekenmigris en la regionon sekve de la instalado de soldata rezidejo far la tiama ĉina registaro de la dinastio Ĉing. Du jardekojn poste komenciĝis grandnombra translokiĝo de ko-

reaj farmistoj, kiuj estis devigitaj forlasi la Koreion propran rezulte de la japana anekso de la duoninsulo en 1910. Ĝis la disfalo de la japana imperiismo-koloniismo Janĝji ludis gravan rolon en la kontraŭjapana rezistbatalo.

En 1952 la pekina registaro de la nova Ĉinio agnoskis la establaron de la Korenacia Aŭtonoma Subprovinco de Janbjan, kiu okupas 26 procentojn da areo de la provinco Ĝjilin. La tuta loĝantaro nombras je ĉ. du milionoj, inter ili 175 000 loĝas en la ĉefurbo Janĝji. Grandparto de la ĉina korenaciano, kiu okupas la dekan lokon en la loĝantaro inter la 56 nacioj de Ĉinio, vivas en tiu ĉi aŭtonoma subprovinco.

Tuj post la enskribiĝo ĉe Janbjan-hotelo, la sola hotelo por eksterlandanoj en Janĝji, mi direktis min al la domo de s-ro Lü Shijun, juna prezidanto de la Esperanto-Ligo de Janĝji, en akompano de s-ro Gim Haogun. S-ro Gim mem estas korenaciano naskiĝinta en Ĉangĉun, la ĉefurbo de la provinco Ĝjilin, kiun mi tuthazarde renkontis en la trajno inter Pekino kaj Ĉangĉun, kiam li veturis hejmen kun pluraj kolegoj post partopreno de la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en Kunming. Dum la tuta vojaĝo s-ro Gim helpis kaj zorgis min kiel gvidanto-interpretanto. Fakte, ne rakontebblas tiu ĉi mia dua vizito al Ĉinio sen mencii lin kaj s-ro Lü, kiu lasta aranĝis ĉion por mi en Janĝji.

En Japanio oni ne malofte diras, ke estas malfacile por individua turisto enpaŝi hejmon de ĉina popolano. Tiu onidiro estas senbaza. S-ro Lü invitis nin al matenmanĝo, kiun preparis lia ĉarma fratino. Simpla sed bongusta manĝo el diversaj plandoj ŝajnis konsisti el kaj ĉinaj kaj koreaj manĝaĵoj. Poste ni eĉ siestis en lia dormoĉambro.

Kvankam Janĝji unuavide prezentas sin kiel tipa ĉina loka urbo, kvazaŭ nenian mian antaŭimagon de "Koreio en Ĉinio", kelkaj faktoj tamen impresis ĝian koreecon: ĉieaj korelingvaj vortoj, dulingvaj anoncoj de aŭtobusa konduktorino, kore-

La aŭtoro (la dua de maldekstre) en kore-nacieca vilaĝo



stila hararanĝo de maljunulinoj, ktp.

Sur monteto ne malproksima de la urbocentro etendiĝas la Universitato de Janbjan, kies historio originis je ses monatoj antaŭ la 1-a de oktobro 1949, kiam koreoj fondis altedukan institucion por si mem, utiligante rezidejojn de la iama japana agresa armeo. En la komenca periodo ĝi havis 400 studentojn, nun tiu cifero kreskis pli-ol-kvinoble, pli ol 70 procentoj de la studentoj estas korenacianoj.

“Antaŭe ĉiuj lekcionoj okazis en la korea, sed nun la hana estas la ĉefa lingvo por instruado,” diris s-ro Lü, ĉar “la korenaciaj studentoj parolas la hanan perfekte, dum la hanoj ĝenerale ne scias la korean.”

Laŭ s-ro Lü Shijun, la Esperanto-Ligo de Janĝji fondiĝis en 1983. Sub la Scienc-teknika Asocio de Janĝji, la ligo okazigas tri semajnajn kursojn por kontentigi la soifojn de la tieuloj interesitaj pri Esperanto. Pli ol duono de ĝiaj 54 membroj estas korenacianoj. Dum mia momenta vizito al unu el ili ĉe la 13a Mezlernejo de Janĝji, mi trovis ĉ. 20 novajn kursanojn lernantajn ABC de nia komuna lingvo. “Al ni serioze mankas lernolibroj kaj vortaroj en la korea lingvo” akcentis korenacia gvidanto de la kurso, kiu interpretis mian mallongan salutparolon.

Rilate al la signifo de la esence eŭropeca Esperanto, kiu trairis la Kontinenton Eŭrazian, finfine atingis tiun ĉi parton de Ĉinio, s-ro Wang Haitao, prezidanto de la Scienc-teknika Asocio, diris, “La evoluo de Esperanto grave kontribuos al kontaktiĝoj inter la Janĝji-a popolo kaj la popoloj tra la tuta mondo.



Membroj de Esperanto-kurso de Janĝji, kiujn la aŭtoro vizitis

Ĝi meritas pli da atento kaj progreso ol ĝi ricevas nun. La historio de Esperanto ĵus komenciĝis ĉi tie, sed mi ŝatus fari mian eblon por plimultiigi nian esperantistaron.”

Kvankam s-ro Lü Shijun mem estas hano, li ricevas konstantan asiston de du spertaj korenacianoj. S-ro An Chel-ho, ĝenerala sekretario de la nova Esperantoligo, profesias kiel lingvisto ĉe la Lingva Laboratorio de la Soci-Scienc Instituto de Janĝji. S-ro An lastatempe ricevis komisionon de komparaj studoj pri pruntovortoj inter la hana kaj korea lingvoj. Parolas tre korektan Esperanton s-ro Li Wen-hak, vicprezidanto, kiu estas eksperto pri okcident-eŭropaj lingvoj kaj respondecas pri unu el la Esperanto-kursoj en Janĝji.

Efektive, preskaŭ mitiĝis ke japanaj virinoj tiel allogas en belaj kimonoj krom la maljunulinoj kaj escepte de dum la novjaraj tagoj. Ŝajnas iom alie ĉi tie en Janĝji. Parolante la japanan mirinde bone malgraŭ sia lernado unu-jara, s-ino Bak

Gjong-E de la Scienc-teknika Asocio ŝanĝis sian veston en korean kostumon, kiam ŝi kune kun ni vizitis danchalon. Ke ŝia festvestiĝo estis nenio eksterordinara, tion montris kelkdekoj da aliaj korenaciaj danc-amantoj en la samspeca kostumo. Ŝi penis lernigi min pri la tekniko de socialdanco, sed tute vane. “Dancado estas unu el la plej ŝatataj amuzoj inter la korenacianoj ĉi tie,” diris la juna prezidanto de la Esperanto-ligo.

Koreoj kaj japanoj havas komunan tradician vivstilon, dismeti la ŝuojn ĉe la enirejo de la domo, sidi rekte sur la planko en la kuirejo kaj la salono, kaj dormi sur matoj etenditaj sur la planko. Tiusence hanoj pli similas al eŭropanoj, ĉar ili sidas sur seĝoj kaj dormas en litoj. Kiam mi malfermis la pordon de la masonita domo de s-ro Liu Guang Chun, kelkaj aliaj anoj de la Esperanto-ligo ol ĉiuj supre menciitaj jam atendis min. S-ro Liu estas vicprezidanto de la Scienc-teknologia Asocio, kiu volontulis provizi sian lokon kiel ejon de bonveniga festeno por



La aŭtoro (la tria de maldekstre) gastas en ĉina familio.

mi en mia dua vespero en Janĝji. Dekoj da pladoj sur du plenaj tabloj sufiĉe impresis por forblovi mian laciĝon el la dumtaga turismo. Kvankam la korea, hana kaj japana ĉiutagaj manĝaĵoj multe pli diferencas

inter si ol oni imagus, nemalhaveblaj iloj por la tabloj de ĉiuj tri popoloj estas la manĝbastonetoj, kiuj kredeble atingis Japanion pere de Koreio antaŭ jarcentoj. Kaj la translandlima kutimo estas ke gastiganto ne-

niam permesas la glason de gasto malplena: glasoj da kizantema vino, memfarita de s-ro Liu, estis bongustega, min ebriigis, kaj finfine min endormigis. Mia bedaŭro estas ke tiam, pro stomakdoloro, al mi mankis bona apetito fronte al ĉi ĉiuj delikataj pladoj, kiujn, s-ro Gim Haogun poste malkaŝis, preparis kvar virinoj, inkluzive s-inon Liu, foruzante la tutan duontagon.

En la trajno revene al Ĉangĉun mi aŭdis pri japana vidvino, kiu finfine efektivigis sian longe aspiritan viziton al Janĝji la antaŭan jaron. Ŝia edzo estis sendita tien kiel soldato kaj pereis en batalo de Janĝji dum la kontraŭjapana rezistmilito. Ŝi opiniis ke tia tragedio kiel la ŝia devas neniam reokazi, ŝi proponis konstruadon de porpaca parko proksime al la urbo kiel monumento de la eterna paco inter la tri popoloj. La loka instanco konsentis ŝian proponon, kaj la parko estis preskaŭ kompletigita. □

INTER NI

Opinioj pri “Instruisto Mi”, “Ĉinaj Vegetaraj Pladoj” kaj aliaj artikoloj

Mi legis sur la sesa numero de EPĈ la artikolon de s-ro Michael Behr pri la terminologia laboro. Mi ekhavis opinioneton pri tio.

Unue, pri donitaĵo kaj datumo, komputilo kaj komputero.

Estas kompreneble dezirinde ke EPĈ uzu unuecan esprimon pri sama afero. Sed igi ĉiujn

verkantojn uzi saman esprimon estas ago ekscesa. Tute same en okazo ĉe verkistoj en la tuta Esperantujo. Unuecigi per forto, per voĉoj aŭ per nacilingva tradicio estas nedezirinde. Esperebla estas unueciĝo laŭ natura fluo de lingva evoluo, laŭ Esperantolingva logiko. Oni ne hastu, ne unuecigu sed unueciĝu.

Due, pri la ofteco de la vortoj komputero kaj komputilo kaj alia.

Kiel oni kalkulas la oftecon de ili? Kio estas la unuo de la kalkulo de ofteco?

OKUMURA-RINZO
(Japanio)

Inter la ĉinaj temoj mian atenton altiris la artikolo pri la "Ĉefaj Taskoj de la Sepa Kvin-jara Plano de Ĉinio", kiu klare montras la tendencon al la vastigo de la pordmalferma politiko de Ĉinio en la ekonomia sfero, i.a. Ĉinio pligrandigos la skalon de la ekstera komerco, utiligo de eksterlandaj kapitaloj kaj enkonduko de avangarda tekniko". En la plano oni akcentas disvolvon de sciencoj, tekniko kaj edukado.

En la aŭgusta numero troveblas ankaŭ unu el la plej bonaj artikoloj de la lastaj monatoj "Homoj, riĉfontoj kaj medio", kiu tre interese prezentas la kreskantan endanĝerigon de la media polucio sur la terglobo kaj alvokas al kontraŭgado. Paren-

teze dirite, plaĉis al mi ne nur la enhavo, sed ankaŭ kelkaj tre trafaj lingvouzaj solvoj, ekz. "nutraĵologo", "regeneriva riĉfontoj". Krome interesaj estas ankaŭ la artikoloj pri Ŝekspiro inter la ĉinoj, priskribo de la vivo de ĉina instruisto Mi kaj la kortuŝa artikolo "Fragmentoj el amleteroj" pri la amo de ĉina junulo al senbraka junulino. Mi substreku, ke ĝi estas verkita per "facila lingvo", samkiel kelkaj aliaj tekstoj en ĉi tiu numero, kio kaŭzas, ke "El Popola Ĉinio" volas/kaj tute ĝuste!/pli vaste servi kiel bona legaĵo por komencantoj.

ANDRZEJ PETTYN
(Pollando)

Varmegan tutkoran dankon

pro via interese ga artikolo "Ĉinaj vegetaraj pladoj" el fama Esp. revuo El Popola Ĉinio, 9/1986.


Mi opinias, ke estas tre interese skribi detale pri vegetaraj receptoj kaj vegetaraj pladoj, kiuj estas ne nur nutraĵo, sed ankaŭ efikaj medikamentoj.

V. POPESCU
(Rumanio)

Kun granda intereso mi jam legis la artikolojn "Ĉinaj urboj en disvolviĝo" kaj "Pri kio pensas la geknaboj". Bedaŭrinde la nigraj-blankaj bildoj ofte ne estas sufiĉe klaraj (ekzemple sur paĝo 61, la kapoj de la pentrantaj infanoj.)

JOSEF FIŠER
(FR Germanio)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Sjining 2. Golmud 3. Ĝiŭĉjŭan 4. Janĝji 5. Ŝinĝjang 6. Tibeto 7. Ĉingdaŭ

PRI "LA FELIĈA BIRDO" KAJ ALIAJ LIBROJ

de JOACHIM SCHULZE

(Hungario)

En la lastaj jaroj plurfoje sin trovis en la revuo "Hungara Vivo" artikoloj (recenzoj) pri la libroj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj ili montris la seriozecon kaj akravecon de la aŭtoroj. Ni esperas, ke pli multaj kritikistoj, legantoj kaj gazetoj, same kiel "Hungara Vivo", faros recenzojn pri la eldonaĵoj de ĈEE kaj ni aperigos ilin kiel eble plej multe en EPĈ. Ĉi-foje ni citas jene tri pecojn el la recenzoj de Joachim Schulze aperigitaj en la n-ro 2/86 de "Hungara Vivo".

La Red.

"La Feliĉa Birdo" prezentas tri legendojn per facilega lingvo. Tial ĉi tiu libro certe bone taŭgas kiel postkursa legaĵo. Nur malofte oni trafas peketojn lingvajn, sed ili ne gravas kaj ne dolorigas, ili pardoneblas. La tri tibetaj rakontoj de "La Feliĉa Birdo" ensorĉas la leganton, kondukas lin en la misteran mondon de feinoj, magiistoj kaj bonkoraj simpluloj. Laste, almenaŭ pleje, la malfeliĉo estas venkita per superhomaj faroj. Oni, do, konsilu al la ĉinaj eldonistoj daŭrigi tiun komencitan serion per aldono de pluaj libretoj, enhavontaj popolajn rakontojn el la granda naciaro de Ĉinio, kaj per tio krei kompletan kolekteblan rakontaron.

Precipe, kaj kontraŭe al iuj aliaj libroj de tiu ĉi libroserio, mi substreku la vere sukcesan tradu-

kon de "La Feliĉa Birdo" — ĝi estas simpla, tamen altnivela. Tial ĝi estu la mezurilo por sekvontaj libroj samkarakteraj. Libroj ja klerigu la legantojn perenhave kaj perlingve. Feliĉe estus, se "La Feliĉa Birdo" ne restus unu el la "solecaj birdoj" inter la ĉina "birdaro".

PRI "BUKEDO AL VI"

En "Bukedo al vi" priskribas 24 tiaspecaj noveletoj tre bone la vivon en la plej multnombre loĝata lando de la mondo. Per tio la leganto povas vidi "malantaŭ la kulisojn" kaj penetri en la plej diversajn problemojn de la nuna Ĉinio, en la dezirojn, esperojn kaj pensojn de la ĉina popolo. Kiel leganto oni ricevas instruojn pri la vivo en la fora Ĉinio. Tial la libro estas salutinda.

Do, kie estas lumo, tie ankaŭ regas ombro. Ne kontentigas la titollinio de la libro. Ĝi konsistas el citaĵo el la samtitola noveleto pri sportistino, kiu kutime gajnas ĉampionadojn internaciajn, sed ĉi-foje ŝi malsukcesis. Ŝi tre malĝojas pri tio, kaj ne atendas aplaudon de siaj adorantoj. Sed stevardino de iu flugkompanio transdonas al la malĝojulino florbukedon. "Jen bukedo al vi!", diras la stevardino.




Se mi dirus "Jen bukedo por vi!", oni povus kontraŭdiri al mi, ke mi estas pedanta. Tiam mi respondus: «Ĉiu verkisto esperantista transprenas grandan respondecon per publikigado de siaj linioj. Li/ŝi ne povas permesi al si eraron, ĉar la vasta legantaro povus imiti ĝin. Tial ni devas esti severaj.»

PRO "MAGIA ŜIPO"

Mia unura konstato certe rilatas al la libro "Magia ŝipo" kun multkolora kovrilo, bonaj ĉineskaj ilustraĵoj kaj arta tipografio. Nenio riproĉinda! Iom mi hezitas pri la lingvaĵo de la recenzata libro. Ili meritis pli bonan lingvaĵon, sincere dirite! Mi donas ekzemplon. Sur p. 7 legeblas: "Reprenu vian originalan formon", do ĝi denove fariĝos papersipon malgrandan kiel la antaŭa." La apostrofon fine de la vorto "formon" mi kalkulas apartenanta al la "sekcio de presdiablaĵoj", sed la superfluan, ja tute malkorektan akuzativon mi ne povas pardoni!

Ankaŭ ne tiajn vortkonstruojn kiel "brullignohakisto" aŭ "port-seĝo" (ĉu seĝo de porto?) aŭ eĉ la monstraĵon "gren-, brullign-, koton-, ŝtof-vendantoj". Tiaj enigmaĵoj ne kaŭzis apetiton tralegi la libreton, tamen la interesa enhavo min devigis!



Lotuso

de GAŬ JA

En la lasta jaro mi trajne veturis al Ŝanhajo. Survoje mi vidis tra la fenestro ne-mal multe da lotuslagoj. Estis tempo, kiam prosperis lotusoj, kiuj svelte elstaras super la akvo kaj aspektas senkompare ĉarme.

De la infaneco mi jam ŝatas la originan belecon de la lotusfloroj. Pensante pri ili, mi ĉiufoje deziras ilin pentri por esprimi ilian modestan stilon. La lotusoj radikas en koto, tamen estas neniom malpurigitaj. La floro sidanta sur la malhel-verda tigo inter lotusfolioj estas granda, modesta kaj eleganta.

La lotusoj ne nur logas kaj edifas min per sia elstara aspekto, sed ankaŭ kortuŝas min per sia sindonema spirito. Iliaj floroj plibeligas la naturon; iliaj folioj povas esti uzataj kiel drogoj; kaj la radikoj bone servas al la homoj kiel nutraĵo. Eĉ kiam iliaj floroj forvelkiĝis, ili ankoraŭ donacas sian semon al la homoj.

La eleganta koloro de la lotusfloroj povas sin kompari kun tiu de peonio; ilia svelta figuro povas rivali kontraŭ tiu de salikoj; la bonodoro superas tiun de jasmeno. Tamen ili ne kon-



kuras pri beleco kun aliaj floroj. Ili silente floras en lago kaj oferas ĉion sian al la homoj.

Mi amas lotusojn pro ilia arta edifo, precipe pro ilia spirita edifo. Mi devas ne nur esprimi la stilon de lotusoj en pentraĵoj, sed ankaŭ lerni de ili la spiriton. □


Lucky-filmoj

tre utilaj por vi!

La Unua Filma Fabriko sub la Kemi-industria Ministerio de Ĉinio estas la plej granda fabriko, kiu produktas plurspecajn filmojn kaj magnetajn materialojn. Ĝiaj produktaĵoj estas uzataj en kinematografio, televizio, kulturo, eduko, naciddefenda industrio, astronautika telegvido, medicino, presado, fotado k.a. Estas pli ol 70 specoj de produktaĵoj, el kiuj tri oni premiis per ŝtata arĝenta medalo, 12 oni titolis elstaraj produktaĵoj de Hebej-provinco aŭ la nomita ministerio kaj 12 oni vendas en 12 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo kaj Afriko.



乐凯胶卷给您留下幸福的回忆



化工部第一胶片厂

中国保定

电话: 37901 37902
电报: 5231

Bonkvalitaj kaj bonvenaj estas la koloraj kaj pankromataj Lucky-filmoj de ĉiaj normoj.

**Unua Filma Fabriko sub la
Kemi-industria Ministerio de Ĉinio
Baŭding, Ĉinio**

Tel.: 37901 37902

Telekso: 5231

**KEMIISTO JAN DONGŝENG
FARIĜIS PREZIDANTO
DE STEA**

Proponite kaj rekomendite de iuj famaj sciencistoj, vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj Jan Dongŝeng estas elektita kiel prezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio (STEA) sub la Ĉina Akademio de Sciencoj (ĈAS).



S-ro Jan Dongŝeng

S-ro Jan Dongŝeng estas fama ĉina specialisto de neorganika kemio. Li tre atentis aplikon kaj disvastiĝon de Esperanto en la scienc-teknika kampo. Li partoprenis en la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazinta en Pekino en 1986 kaj donis subtenon multflanke al sciencistaj-teknikitaj esperantistoj de ĈAS kaj la laboro de la asocio.

**ESPERANTA EKSPOZICIO
OKAZIGITA DE LA ĈINA
ENCIKLOPEDIA ELDONEJO**

Subtenate de s-ro Ĝjang Ĉunfang, konsilanto de la Ĉina Enciklopedia Eldonejo kaj membro de la ĉina societo "Amikoj de Esperanto", la eldonejo okazigis je la fino de oktobro 1986 ekspozicion de fotoj pri la 71-a UK, kiu daŭris unu semajnon.

Antaŭ tio la eldonejo organizis Esperantan kurson. Nun ankoraŭ lernas unu grupo en la eldonejo. Por scienca kaj kultura interŝanĝo inter ĉina kaj alilandaj popoloj s-ro Ĝjang Ĉunfang proponis kompili unu voluman enciklopedion Esper-

antan pri la antikva kaj nuntempa Ĉinio.

**AKTIVAS LA PEKINA
VETERANA
ESPERANTISTA ASOCIO**

La Pekina Veterana Esperantista Asocio ĉiam estas vigla de post sia fondiĝo. Subtenate de la Ĉina Asocio por Maljunula Eduko, ĝi funkciigis konversacian kurson por siaj membroj kaj infanan Esperanto-kurson kaj organizis Esperanto-kurson en la Instituto de Eksteraj Aferoj, en kiu studentoj lernas Esperanton kiel nedevigan lernobjekton. En la 9-a de novembro 1986 ĝi inaŭguris elementan kurson de Esperanto.

**NOVAJ POŝTKARTOJ KAJ
NOVJARAJ SALUTKARTOJ
DE ESPERANTO**

En la lastaj jaroj ĉinaj esperantistoj pli kaj pli oftigis kontakton kun alilandaj samideanoj. Ili bezonas poŝtkartojn pri ĉinaj pejzaĝoj. Por kontentigi ilian bezonon, la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis du poŝtkarto-seriojn "Pejzaĝoj de Ĉinio" kaj "Pejzaĝoj de Pekino"

Membroj de la konversacia E-rondo de Veterana Universitato sub la Pekina Veterana Esperantista Asocio



(ĉiu serio havas dek pecojn) kaj tri specojn de novjaraj salutkartoj en Esperanto.

Por festi la okaziĝon de la 71-a UK en Ĉinio, la Gujlin-a Esperanto-Asocio eldonis poŝtkarto-serion pri belaj pejzaĝoj de sia urbo. Ankaŭ la Ningŝja-a Esperanto-Asocio eldonis poŝtkarto-serion pri loĝloko de Huj-nacieco. La Jangling-a Esperanto-Asocio de Ŝenŝji-provinco faris serion da Esperantaj glumarkoj por la 71-a UK. Multaj el tiuj poŝtkartoj kaj novjaraj salutkartoj estis kolektitaj de filatelistoj kiel trezoro.

POR CENTJARIĜO DE ESPERANTO EN 1987

Kion faris, faras kaj faros Unuiĝo Franca por Esperanto? Prezidanto de UFE Renée Triolle raportas, ke okaze de la Jubileo ili jam eldonis paperon kun la simbolo de la jubileo, 6 poŝtkartojn pri Esperanto (sed sen verda stelo

*Membroj
de la Zulia
Esperanto
Asocio*



kun la simbolo de la jubileo), faris tutlandan informkampanjon per pagitaj anoncoj en ĵurnalo, nova koresponda kurso, noveldonitaj kasetoj, eldono de broŝuro pri la uzebleco de Esperanto kaj granda premio: tutmonda rondvojaĝo kun haltoj en 7 diversaj landoj kaj 7 familioj. Kion do ili faras nun? Eldonoj de medalo kaj franca an-

tologieto en Esperanto, partopreno en tutlanda foiro pri lingvoj kaj lingvoindustrio, kaj informkampanjo ĉe la amaskomunikiloj per sendo al ĵurnalistoj de broŝuro "Esperanto: bildo kaj realeco". Kaj se eble, ili planis ankaŭ eldonojn de la libro de J. Wells "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" kaj poŝtmarko, radioelsen-

*Ekspozicio
dediĉita al
la 71-a UK
kaj ĉinaj
Esp-eldona-
ĵoj, aranĝi-
ta de Lud-
mila Hubc-
zenko en
julio 1986,
en Opole
de Pollan-
do*



dojn pri la jubileo, Esperanto kaj Zamenhof kaj televidelsendojn pri la samaj temoj.

FRANCA JUBILEA KONGRESO

Ĝi okazos de la 5-a ĝis la 9-a de junio 1987 en bela loko ĉe la Azura Marbordo. La programoj entenas laborkunsidojn, debatojn kaj prelegojn, distrajn vesperojn, balon kaj ekskursojn. Oni aliĝos antaŭ la 31-a de marto.

HELPO

Okaze de sia 2-a pedagogia seminario en LYON (Pasko 1987) UFE kaj la Grupo de Esperantistaj Edukistoj intencas organizi ekspozicion de Esperanta instrumaterialo (libroj, kasetoj ktp.) en la sidejoj de la CENTROJ REGIONAJ PRI PEDAGOGIA DOKUMENTADO. Ĉiulandaj aŭtoroj aŭ eldonistoj povos sendi reklamekzempleron al: Esperanto, Edmond LUDWIG, 26, route de la Schlucht, STOSS-WIHR, 68140-MUNSTER, Francio.



Por memori la kontribuon de Olof Palme por la paco, gejunuloj en Warin de GDR kunvenis la 8-an de aprilo 1986 kaj donis al sia fondaĵo la honornomon "Esperanto-klubo Olof Palme".

INTERNACIA ESPERANTO-PROPAGANDA BICIKLADO TRA EŬROPO

Pro la centjarigo de Esperanto, internacia grupo bicikle froiros ekde februaro el Perpinjano (Sud-Francio) por atingi Jubilean Universalan Kongreson en Varsovio fine de julio. Ĉi tiu alvoko petas

de ĉiu esperantisto anonci kiel eble plej frue.

MONDA UNIVERSALA PAC-AKADEMIO FONDITA

Laŭ iniciato de brazilaj kaj polaj esperantistoj fondiĝis Monda Universala Pac-Akademio en la jaro de la paco. Ĝia ĉefa sidejo estas

en Brazilo. La akademio okupiĝas pri malarmigo, preparo de socioj al la vivo en paca mondo, ekonomia ordo de la mondo, ekologio kaj universala lingvo.

ALVOKO AL KUNLABORO

Por ke Voĉo de Handikapuloj ne estu plorkolektanto aŭ nur helpkrio de malavantaĝuloj, ni petas ĉiujn verkemajn homojn, kiuj havas intereson por handikapuloj kaj handikapuloj mem kunlabori en nia gazeto. Ĝi deziras pritrakti jenajn temojn el pluraj vidpunktoj:

1. Diferenco inter denaska kaj nedenaska handikapiteco;
2. Handikapita korpo kaj kreaj potencoj;
3. Handikapulo-sana homo;
4. Socio, medicino, ekonomio kaj handikapitaj homoj;
5. Esperanto-handikapuloj.

Viaj kontribuajoj pri supraj temoj devas esti de du ĝis maksimume tri paĝoj, tajpitaj kun interspaco kaj marĝeno, en bona lingvo. La materialojn bv. sendi al adreso: Voĉo de Handikapuloj, red, Dusan Adnadj, Školska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio. □

LIŬ SŬOLA*:

JUNA KOMPONISTO

Mi devas konfesi, ke mi estis sorĉita ne de lia muzika talento, sed de lia vira beleco. Mi konatiĝis kun li, kiam mi lernis en la dua klaso de supera lernejo. De tiam mi absorbiĝis en lia muziko kaj flanken metis mian muzikan aparaton.

Lia verko "Kanjono" estis farita por violono kaj orkestro. Aŭdinte la du seriojn da akordoj, mi preskaŭ eksaltis de admiro. Sed mi ne moviĝis, retenante la

spiron kun mieno de "enprofundiĝo", mi simple malesperis: La tuta komponaĵo estis de mi dezirata, sed li verkis pli frue ol mi. Fakte "Kanjono" entenas nenion mirindan por ĉiu ajn pensema komponisto, kaj nur timiĝis min stultan. La muzikaĵo havas nenion superban, tamen montris lian organizan talenton por la notoj kaj lian sentemon al la sonoj. Tiam en mia kapo estis nur sola penso: Li bone komponis.

"Kanjono" kondukis aŭskultantojn en apatian kaj solecan medion, la melodio de violono paŝon post paŝo transiris de spleno al streĉiĝo, tamen la spleno kaj streĉiĝo estis tro junaj. La melodio subite ĉesis, kaj la ŝajna apatio denove okupis "Kanjonon", la soleca violono de sangvina junulo vibris en la kanjono. La muzikaĵo estis bela, kaj plurfoje mi sekvis la blankan nebulon en la apatian kanjonon por ŝajnigi min "enprofundi-



Ĉju Ŝjaŭsong

ĝanta". La verko estis ludita poste en la ĉina koncerto aranĝita de la Usona-Ĉina Kultura Interŝanĝa Centro de Usono. Pli poste la fama ĉina violonisto Ŝeng Gonggŭo kaj la orkestro de la Centra Baleta Trupo de Ĉinio ludis la verkon kaj surbendigis ĝin. Poste ĝi senbrue dronis en amaso da kasetoj.

"Unua Korda Kvarteto" estis impeto por Ĉju Ŝjaŭsong, estis mejloŝtono en lia vivo de komponado, kaj antaŭ tio li estis nur naiva komponisto.

Mi ekploris, kiam mi aŭdis la longan melodion de popolkanto ludita per violonĉelo en la unua movimento de lia "Unua Korda Kvarteto". Mi neniel antaŭvidis, ke en tiu maniero li prezentis la melodion kolektitan de ni en Gŭangŝji, kio portis min en la popolon kaj ebligis al mi vidi la popolon. En "Unua Korda Kvarteto" li vidigis al mi per

kvar violonoj multajn grandajn montojn, multajn kampojn, multajn plugbovojn kaj multajn parojn da nudaj piedoj. Cetere, ankaŭ sunbrunan haŭton, elstarajn blujajn vejnojn, longajn pipojn brile poluritajn, ŝpinilojn, ŝpatojn... ne, ne, ne, mi parolis tro konkrete. Muziko ne estas tiel konkreta, ĝi nur sentigas. Certe la komponisto malestimis min, kvankam li rimarkigis "ĥaoson, modestecon kaj krudecon" sur la notaro por ludo. Sed mi ne estas granda muzikisto, kaj mi devis imagi al mi multajn konkretajn realaĵojn por emociiĝi.

Ĉju Ŝjaŭsong estis feliĉa. Lia "Monta Kanto" por violonĉelo gajnis unuagradan premion en la kompona konkurso okazigita de Tcherepnin-asocio de Usono. La verko estas kompleta kaj nature modesta, tamen li ne kontentis pri ĝi. Lia "Filino de Monto"

por violono gajnis unuagradan premion en la kompona konkurso de la Centra Konservatorio de Ĉinio. En 1983 la Ĉina Disko-kompanio surdiskigis kaj surbendigis "Verkojn de Ĉju Ŝjaŭsong" kaj la Hongkonga Limitita Disko-kompanio distribuis la diskojn kaj sonbendojn. En la verkoj estas liaj "Korda Simfonio", reproduktaĵo de "Unua Korda Kvarteto", "Monta Kanto", "Filino de Monto" kaj simfonio "Monto kaj Moro". La verkoj reprezentas periodon de lia komponado, en kiu li trovis sian terenon. Ĝuste kiel diris iu artikolo en la Hongkonga ĵurnalo "Wen Hui Bao": "... la muziko de Ĉju Ŝjaŭsong... draste impresas per lia persona stilo... de pura kaj modesta eco kaj samtempe ankaŭ barakto de soleco kaj doloro, moro de braveco kaj krudeco... Lia komponaĵo odoras per specifa nacieca vivipovo kaj moro de montaro..."

De "Kanjono" ĝis "Unua Korda Kvarteto", Ĉju Ŝjaŭsong en momento fariĝis alia Ĉju Ŝjaŭsong. Li jetis "silentecon", "solecon" kaj "apation" en la kanjonon. Ilin anstataŭis plugita tero, akvaj kampoj, klara sed malvarma vintra ĉielo kaj montegoj en la sudo. Li ne plu havis tempon por aŭskulti sian saltadon en la kanjono. Simpleco, braveco kaj modesteco de sudaj kamparanoj milfoje ekscitis lin. Sen vibro en ludo de la muzikaĵo, sen tercio, regis nur rekto kaj vertikalo, sekundo kaj sekundo. Li prenis ilin kiel spiriton, ili fariĝis totemo en lia muziko. Tiuj grandaj sudaj montoj vualis ilin kaj lin per dezerta, solena, barbara kaj senbrua fantoma etoso...

La naskiĝloko de Ĉju estas Gujjang, la ĉefurbo de Gujĝoŭ-



La aŭtoro (dekstre) kaj ŝia edzo Ĉju Ŝjaŭsong

provinco, ĉirkaŭita de monta kontinuo. Eble ĝuste pro tio li senĉese ĝenis aŭskultantojn per sonoj pri monto: "Filino de Monto" prezentas spontanegan fantomon en monto, kiu devenis de "Naŭ Odoj" de Ĉju Jŭan, ĉina poeto antaŭ 2 200 jaroj. "Kanto de Monto" estas plena de modesteco, solideco kaj vivipovo. "Monto kaj Moro" portas bravecon, krudecon kaj grandiozecon. Elrampinte el "Kanjono" de post "Unua Korda Kvarteto", Ĉju Ŝjaŭsong hontis verki en la unua persono kiel en la komponado de "Kanjono", sed male, klopodis forigi el sia verko debilan memkonscion. Li esperis, ke li estos komponanta ion, sed ne skribanta aŭtobiografion. Cetere li penis serĉi vojon sublimi sian muzikon el la spleno de la naturo.

En majo 1984 naskiĝis komponaĵo, en kiu aperis diversaj homaj voĉoj eligantaj primitivajn vokojn. Ĝi estis muzikaĵo por movbilda filmo, sed dum la komponado li jam verkis ĝin kiel ĉambran muzikon. Apartiĝinte de la filmo, la komponaĵo fariĝis memstara muzikopeco, kiun li nomis "Mong Dong". "Mong Dong" estas sensenca vorto. En

la komponaĵo "modesteco, ĥaoso kaj krudeco" konserviĝis, sed kviete sublimiĝis. Ĉu la homaj voĉoj, ĉu la sonoj de muzikiloj, ili prezentis "harmonian kvieton inter prahomoj kaj la naturo" (el parolo de Ĉju Ŝjaŭsong). Se oni rigardas liajn "Unuan Kordan Kvarteton" kaj "Monton kaj Moron" kiel solidan teron, do lia "Mong Dong" similas al aerfluo sublimita el la tero. Ĉi tie Ĉju Ŝjaŭsong forskuis mornan senton de civilizitoj al la naturo. Li penis porti sin kaj la aŭskultantojn en medion nepoluciitan, por ke tie ili ĝuu honestecon, purecon, primitivan fortecon kaj krudan tamen kvietan belecon.

Tiu peco sendube estas la kulmino de lia nuna periodo. Post tio li kreis "Adaĝon" por fluto kaj korda orkestro, "Siĉŭan-ajn Melodiojn" por violonĉelo kaj malgranda orkestro, muzikaĵon por la moderna dramo "Sovaĝulo", sesteton "Sed" por naciaj muzikiloj kaj "Muzikaĵon el Du Movimentoj" por naciaj muzikiloj. En la tutlanda kompona konkurso de ĉambra muziko en la somero de 1985, lia "Violonĉela Rapsodio" gajnis trian premion. En la juĝado la juĝkomitato faris plej dis-

kretan decidon, ĉar dum la juĝado leviĝis diskutado, kaj iuj eĉ forte "indignis" por ĝi. Onidire la komponaĵo estis plej longe aplaŭdata en la konkurso. Mi citu frazojn el la artikolo "Influo Estos Profunda" verkita de iu komentariisto: "Kiam la 'Rapsodio' estas ludata, eĉ la posta trairejo de la teatro estas okupita de aŭskultantoj. Iuj el ili neteneble aplaŭdis ĉe la fino de la ludo spite la teatran difinon. La juĝantoj estis diskretaj kaj donis al la komponaĵo trian premion. . . Ĝi estas serioza komponaĵo entenanta nekontesteblajn interesajn motivojn sukcesajn kaj altiris atenton de la aŭskultantoj per drasta ŝanĝiĝo de la humoro, sona kaj muzika efekto. . ." Vere la verko en kompona tekniko kaj ĝia luda tekniko de violonĉelo formis frapon kontraŭ la profesiaj muzikistaj rondoj. La muzikaĵo sen temo, sen takto, sen tradicia modo kaj harmonio. . .

Ĉju Ŝjaŭsong naskiĝis en Gujjang antaŭ 33 jaroj. En sia knabeco li ŝatis grimpi sur arbon malgraŭ vundiĝo, ŝatis plonĝon spite vundon je la kapo, ŝatis fiŝkapton spite ŝirvundon je la piedoj. . . Post diplomiĝo el mezlernejo li laboris en kamparo kaj poste revenis en la urbon. Li eklernis violonludon en la aĝo de 20 jaroj por trovi vivrimedon. Dek jarojn poste iu germana kompona profesoro surpriziĝis, ke li kontaktiĝis kun nuziko tiel malfrue, opiniante ke li sin ekzercis per muziko jam duonon de la travivitaj jaroj. Post unujara lernado de violonludo li fariĝis aldisto de la Pekin-opera Trupo de Gujjang, poste li memlernis komponadon, kaj en la fino de 1977 li sukcese trapasis la ekzamenon por eniri en la

(Daŭrigo sur p. 42)

Popola muziko

(Daŭrigo)

De la pluva tago, kiam la blindulo montris sian talenton, ne cirkulis plu la malicaj onidiroj en la urbeto. Eĉ la scivolemaj, klaĉemaj virinoj ne interesiĝis plu pri la amafero de la blindulo kaj Jasmeno, ĉar ankaŭ al ili plaĉis la ĉarma muziko de la blindulo en la lastaj tagoj. La blindulo per sia bela muziko agitis ilian animon, emociis ilin ĝis larmoj. Li jam fariĝis mistera kaj ŝatata homo de la urbeto. Nerimarkite forvaporigis ilia ŝatokupo moki alies kriplecon.

Tiujn tagojn la taluso de Balongsoseo estis firme premita de rulmaŝino. Komenciĝis la pavimado. Venis en la urbeton kamparanoj kiel vojlaboristoj. En la urbeto tuttage aŭdiĝis iliaj neĝentilaj ridoj kaj klaĉoj. Malbonodoris la fandita asfalto. Vespere en la urbeto aŭdiĝis laŭta bruado de la vojlaboristoj. Plejparto el ili estis tro viglaj knabegoj. Kun mono en la mano, ili arope pasumis ĉiutage post vespermanĝo. La talentaj mastroj de la komerca centro ŝanĝis siajn kutimojn kaj laboris ĉefe en nokto. Jasmeno kompreneble ne volontis perdi la bonŝancon. Sia negoco iris profitodone. Ĉiuvespere ŝia drinkejo estis plenplena de klientoj. Ĉiutage ŝi kuiris 20 kokojn, kaj tiuj rapide elvendiĝis vespere.

En la unuaj tagoj de la nokta foiro bone iris la negoco ankaŭ de la aliaj 3 mastroj. Fang la Sesa kaj Flavokululo ankaŭ vendis brandon kaj almanĝaĵojn, kies kvalito kaj gusto estis neniom malbonaj ol tiuj de Jasmeno, tial klientoj plenigadis ankaŭ ilian butikon. Poste la fenomeno radikale ŝanĝi-

ĝis. Iuvespere, kiam la ĉarma mastrino de Jasmen-drinkejo servis ĉe la brila vendotablo, subite leviĝis muziko de bivo el la kvietaj malantaŭa korto. La juna blindulo estis ludanta bivon sidante sub sterkulio. En lia muziko oni kvazaŭ aŭdis la sonon de rompiĝo de arĝenta botelo, galopadon de kavalerio, faladon de bidoj en jadan teleron kaj pepadon de birdoj. De tiam la drinkejo de Jasmeno senprecedence prosperiĝis. Jasmeno do lumigis la malantaŭan korton per grandaj lampopiroj, starigis tie tablojn sub la ĉielo por la fervoraj aŭskultantoj kaj drinkantoj, dum la blindulo montris sian tutan talenton, alterne ludis siajn bambuajn flaĝoleton kaj fluton, bivon, erhu-on kaj surnaon, ĉiufoje ĝis noktomezo. Dekoj da muzikamaj knabegoj sin direktis al la drinkejo eĉ en tagmezo por aŭskulti la blindulon klarigi al ili muzikan teorion, klasikajn muzikaĵojn, kiaj "Printempa Neĝo" kaj "Ondoj Forportas Sablon".

Samtempe kun tio rapide multiĝis la negoca enspezo de Jasmen-drinkejo. Jasmeno prenis la 300 botelojn da brando superstokitajn en la butikoj de Du Ŝuang, kaj tiuj 300 boteloj forvendiĝis en duonmonato. Du Ŝuang tuj aĉetis 500 botelojn da brando de la gubernia urbo. Ilin tuj prenis Jasmeno. La klientoj admiris ankaŭ la kuiritajn kokojn kaj frititajn ternuksojn de Jasmen-drinkejo. Jasmeno energie preparis tutan tagon, tamen ne povis kontentigi vespere la bezonon de la klientoj.

La vojlaboristoj laboris jam du monatojn en la urbeto. Kvankam ilia laborloko fariĝis pli kaj pli malproksima de la urbeto kaj ili

devis transloĝiĝi, tamen ili prokrastis transloĝiĝon kaj volontis iri la longan vojon por veni al la drinkejo.

Nun iom pri amo, la eterna temo. Kio instigis Jasmenon akcepti la junan blindulon spite kalumnion al ŝia reputacio? Vere enigmo. Oni komprenis, ke tio estis kaŭzita de amo finfine iuvespere, kiam Jasmen-drinkejo estis ŝlosita kaj perdiĝis Jasmeno kaj la blindulo.

Jasmeno, virino kuraĝa kaj bela, ne volontis obei aliajn kaj ofte faris decidon mirigan eĉ por si mem. Tion bone ekzemplis ŝia eksedziĝo. Ĉu ŝi enamiĝis al la blindulo tiuvespere, kiam ŝi kondukis lin malsupren de sur la digo? Tion neniu sciis. Sed laŭ kutima rezonado, ŝi tiel agis ĉefe pro simpatio kaj kompatio. Se tio estis vera, do kiel kaj kiam naskiĝis inter ili la amo? Mi pensas, ke tio ne estas klariginda. Sendube, ŝi estis radikale transformita de ia forto. Antaŭe Jasmeno estis virino timiga, flirtema, pikema, lango-lerta kaj artifikema. Ŝi ofte per strangaj metodoj punis tiujn, kiuj ŝin ofendis. Estis timiga eĉ ŝia rideto. Ŝia rideto fariĝis dolĉa kaj karesa nur de tiam, kiam la blindulo eniris en la drinkejon. En ŝiaj strabetaj okuloj ne plu videblis mokemo. Eĉ ŝia voĉo mallaŭtiĝis je 8 gradoj. Ŝi tiele akceptis la klientojn, dum ŝia sinteno al la juna blindulo turmentis Sanŝje kaj similajn ĝis freneziĝo. Post taga streĉa laboro ŝi ofte sidis en la korto vid-al-vide kun la juna **blindulo** kaj fiksis sian rigardon sur lin en longa silento. La vizaĝo, precipe la du grandaj,

sentoplenaj oreloj de la blindulo agitis ŝian koron. Por Jasmeno la viro estis matura frukto sur aŭgusta arbobranĉo kaj ŝi povis pluki kaj engluti ĝin kiam ajn, sed ŝi ne volis tion fari. Ŝi preferis vidi la frukton alloge brilanta sur arbobranĉo kaj pacience ĝisatendi, ke la maturiĝinta frukto odoranta agrablan aromon mem falos kaj tiam ŝi kaptos ĝin per la mano. Tamen nun ŝia plej grava tasko estis zorgeme protekti ĝin por ke ĝi ne falu en alies manojn.

Fine la vojlaboristoj nevolonte transloĝiĝis. Ilia laborloko distancis de Masang-urbeto 10 km. Ĉiutaga ir-reirado malŝparis multan tempon kaj certe malhelpis la laboron, pro tio la estro faris tiun decidon.

Foriris la vojlaboristoj, tamen daŭris la nokta foiro de la komerca centro. Oni, laborintaj tutan tagon, ne volis tuj enlitiĝi post la vespermanĝo. Ili bezonis spiritan konsolon kaj ĝuon. Ili volis muzikon. Kompreneble ili povis ĝui muzikon ankaŭ de radio, kio tamen ne estas komparebla kun la ludo de la juna blindulo. Malgraŭ tio, ke la muzikaĵoj de la blindulo estas jam tre konataj por ili, tamen de tiuj ili neniam tediĝis. Ili ĉiam admiris lian ludon. Pro tio la blindulo sentis sin maltrankvila. Ĉiufoje antaŭ ludado li diris ĝeniĝe: "Mi hontas, ke mi povas ludi nur tiujn komponaĵojn. . . Jam elĉerpate. Mi devas serĉi ion novan. . ." Sed liaj admirantoj deadmonis lin: "Fraĉjo, ne estu stulta! Kien vi iros? Kie vi povas renkonti tiel bonkoran virinon kiel Franjon Jasmeno? Kaj plie, viaj muzikaĵoj estas sufiĉaj por plezurigi nin. Ni neniam tediĝos de tio, same kiel ni ne tediĝos de la brando de Jasmeno, kiun ni trinkas ĉiutage. Ĉiufoje ni kun ĝuo trinkas la brandon de Jasmeno, kio estas agrabla por ni. Same kiel ŝia brando, viaj muzikaĵoj. . ."

Aŭdinte tion, la blindulo malsereniĝis en la mieno. Lia paro da grandaj oreloj konvulsiiis, kiel

malĝoje ĝemis du vivuloj. Tiu-vespere lia prezentado malsukcesis. Lia ludado agacis, same kiel rizo miksitaj kun sableroj malfacile manĝebla.

Forflugis la tagoj. Nerimarkite onin salutis oktobro. Aŭtuna vento alportis de kampoj bonodoron de maturiĝintaj plantoj. Sur la kampoj ĉirkaŭ la urbeto verdo iom post iom cedis sian lokon al flavo. Sur la digo de Balong-rivero faladis turniĝe velkintaj folioj, kiuj floris sur la rivero jen leviĝante, jen malleviĝante. Zorgorongi la junan blindulon de kiam li malsukcesis en la ludo. Li perdis apetiton kaj kelkiam gapesidadis. Jasmeno faris ĉion eblan por plibonigi la manĝojn. Por lin distri ŝi ofte promenadis kun li sur la digo tenante lian manon. Tiam virinoj pepadis fingre montrante ilin: "Ho, vidu! Kia ideala paro! La blindulo estas centoble pli supera ol la vicsekciestro. . ." Aŭdinte tion, Jasmeno ĉiam radiis de kontentiĝo, dum la juna blindulo konsterniĝis, serĉis pretekstojn kaj petis Jasmenon konduki lin hejmen.

En la komenco de septembro finkonstruiĝis la domoj de la sukferfabriko kaj kanvasfabriko investitaj de la gubernia registaro. Post kelkaj tagoj venis ĉi tien laŭ la nove pavimita ŝoseo torento da ŝarĝaŭtoj plenaj de maŝinoj. Ilin sekvis multaj laboristoj. Tio kompreneble estis ĝojiga afero por la komerca centro de la urbeto. Estis alia pli ĝojiga informo: Oni diris, ke sub la tero ĉirkaŭ la urbeto konserviĝas abunda oleo kaj post nelonge laboristoj venos ĉi tien por ekspluati la nafton. Kiam ĉi tie estiĝos granda oleokampo, do la hodiaŭa urbeto plejble ŝanĝiĝos en Masang-urbon. . . Responde al la informo, Jasmeno faris tujan reagon. Ŝi mendis tablojn kaj seĝojn en la gubernia lignaĵfabriko kaj aĉetis brikojn, tegolojn kaj lignon por konstrui simplan grandan manĝejon en la korto kaj pliapeŝe ekspansiigi sian negocan

skalon. Ŝi petis iun aĉeti en Ŝanhajo lanŝtofan Eŭropstilan kostumon kaj nigrajn ledŝuojn por la juna blindulo — tiuj estas liaj oficialaj vestoj en vespera prezentado. Fine ŝi petis la plej eminentan kaligrafon en la urbeto skribi elpendaĵon "Muzika Jasmen-drinkejo", kiun ŝi pendigis tuj sub la kornico. La grandioza plano donis al ŝia vizaĝo ĉarmajn radiojn. Ŝi senrezerve konigis sian planon al la blindulo. En la parolo ŝi uzis ne plu "mi" kaj "vi", sed nur "ni". La blindulo admiris ŝian planon, konsciante, ke tiu virino ne estas simpla. Sed kiam li informiĝis, ke li ludos en tiu komforta ejo kiel muzikisto, sur lia vizaĝo legeblis hezita esprimo. Tiuokaze Jasmeno puŝetis lin kaj diris kun koketa kolereto: "Ho, vi, kial maltrankviliĝis? Diru, pri kio vi ne kontentas?"

La onidiro pri la brila perspektivo de Masang-urbeto nature levis ondon en la koro de Fang la Sesa, Flavokululo kaj Du Ŝuang. La sensaciaj paŝoj de Jasmeno kaj precipe la granda elpendaĵo "Muzika Jasmen-drinkejo" vekis ĉe ili ĵaluzon. Ili kredis, ke ilia talento estas neniom malpli granda ol tiu de Jasmeno, sed nun Jasmeno multe sukcesis en la negoco kaj pelis ilin en senlirejon, ĉu tio ne ŝuldis al la ĉeesto de la blindulo? Tiel pensante, ili bedaŭris, ke tiutage ili ne kondukis la blindulon en sian hejmon, kaj lasis la profiton al Jasmeno. La variolulo Du Ŝuang kalkulis, ke en la pasintaj kvar monatoj Jasmeno profitis almenaŭ 3 000 jŭanojn, dum la blindulo konsumis ĉe ŝi nur iom da kokinternaĵoj. La blindulo simple estis riĉigilo, kaj en tiu tago, kiam en Masang-urbeto funkcios la maŝinoj, la riĉigilo ludos pli grandan rolon, kaj tiu virino baldaŭ fariĝos riĉulo kun cent mil jŭanoj.

Iun tagon posttagmeze, Fang la Sesa, Flavokululo kaj Du Ŝuang interkonsiliĝis pri tio en tetrinkejo. Fang proponis, ke ili kune traktos pri tio kun Jasmeno. Komence Du

(Daŭrigo sur p. 41)

Arto de sigelila gravuro

de JŬE ĜIĈENG

La arto de sigelila gravuro estas unu el la originalaj tradiciaj artoj de Ĉinio. Kutime oni gravuras sur sigelilo han-lingvajn ideogramojn.

Antaŭ 3 000 jaroj, en Ŝang-dinastio de Ĉinio oni gravuris ideogramojn sur testuda ŝelo aŭ besta ostoj. Sigeliloj unue aperis en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj tiu de Militantaj Regnoj (770-221 a.K.) kaj portis la nomon *Ŝji*. Ili esis faritaj el jado aŭ bronzo kaj servis kiel aŭtentikigilo por la suvereneco de reĝo. Poste sigelilo ekhavis formon de tigro dividita en du partojn. Ĝi estas aŭtentikigilo por komandpovo super armeo.

Post sia unuigo de Ĉinio la Unua Imperiestro (259-210 a. K.) de Ĉin-dinastio decidis, ke *Ŝji* estas uzata ekskluzive de imperiestro. En Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.) estis difino, ke la sigeliloj de imperiestro, lia edzino kaj dukoj portu la nomon *Ŝji*, tiuj de aliaj ŝtataj oficistoj *Jin*, kaj iuj de generaloj *Gang*. Antikvuloj distingis rangojn per kvalito de sigelilo, sigelila tenilo kaj ĝia rubando. La sigeliloj estas faritaj el oro, arĝento, bronzo, jado k.a. La teniloj havas formojn de tigro, testudo kaj aliaj. La rubando estis purpura, blua, nigra aŭ flava.

Antikve sigeliloj estis praktike uzataj. En la dinastioj Suj, Tang kaj Song (581-1279 p.K.) superbe evoluis kaligrafio kaj pikturo, dume la arto de sigelila gravuro








Eminenta gravuristo Li Ŭenŝin faras sigelilon.

stagnis. La sigeliloj de ŝtataj oficistoj portis naŭ-zigzagajn skribojn malviglajn kaj malfacile legeblajn. Tamen ekaperis aprecaj sigeliloj. Oni sigelis per tia sigelilo majstraĵojn de kaligrafoj kaj pentristoj por atesti, ke ilin ĝuis aprezistoj, kolektantoj kaj imperiestroj. En la lastaj jaroj de Jŭan-dinastio (1279-1368 p.K.) pentristo Ŭang Mjan gravuris ŝtonan sigelilon kaj sigelis siajn pentraĵojn per ĝi. En Ming-dinastio (1368-1644 p.K.) la arto de sigelila gravuro atingis

kulminon de sia prosperiĝo. Eminenta kaligrafo-pentristo Ŭen Peng (1498-1573 p.K.) liberigis la sigelilgravuron el sub la kateno de sola praktika uzo, kio multe levis la artan valoron de sigelila gravuro. Poste gravuristo He Ĝen kaj Ŭen Peng kune esploris pri gravura arto. Dum sia vivo ili gravuris multajn sigelilojn kaj havis grandan influon sur aliajn. De tiam sigelilgravuro estas ne sole ilo por aŭtentikigo, sed ankaŭ memstara arto-branĉo. En la 400 jaroj de



Kaligrafajo sigelita dekstre-supre kaj maldekstre-malsupre




la tempo de He Ĝen kaj Ŭen Peng ĝis la lastaj jaroj de Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.) pompe prosperis la arto kaj aperis multaj skoloj kun apartaj karakterizaĵoj.

En la antikva Ĉinio, krom sigeliloj por ŝtataj oficistoj, oni uzis ankaŭ privatajn sigelilojn, kiuj estis faritaj laŭ ŝato. Estas multe da specoj de privataj sigeliloj, kiaj tiuj de nomo, bildo, korespondo, pikturo, talismano, domnomo, kolektado-aprecado kaj maksimumo. La enhavo por maksimumaj sigeliloj estas tre buntaj. Idiotismo, sentenco, verso aŭ vulgara frazo ĉiu povas esti gravurita sur sigelilo. Alia speco de sigelilo estas figura sigelilo, kiu servas ne kiel

Sigeliloj faritaj de Ĉji Bajŝi (1863-1957), moderna ĉina kaligrafopentristo. Li estis prezidanto de la Ĉina Belartista Asocio. En 1953 li estis honorita per la titolo "popola artisto". En 1955 li fariĝis koresponda akademiano de la Arta Akademio de GDR kaj ricevis la Premion de Internacia Paco por 1955 donitan de la Monda Konsilio de Paco en la sekvanta jaro.

Jada sigelilo kun drakforma tenilo



Tigroforma sigelilo de la Periodo de Militantaj Regnoj (403—221 a.K.)



Arĝenta sigelilo de reĝo Liŭ Ĝu de Han-dinastio (206 a. K. — 220 p.K.)







Parto de papilio rulpentraĵo de Song-dinastio (960 —1279 p.K.) kun sigeloj de tiuj, kiuj ĝuis aŭ konservis la pentraĵon



Valoraj porsigelilaj ŝtonoj kun gravuritaj teniloj (la dua de dekstre estas altvalora ŝtono en koloro de leŭso)






Valoraj porsigelilaj ŝtonoj
(la dua de dekstre estas alt-
valora heliotropo)




Bildsigeloj. Dek-
stre estas sigelo
de imperiestro
Cong Gen (1628
—1644 p.K.) de
Ming-dinastio.

Porsigelilaj ŝto-
noj kun reliefo




Figuraj sigeloj

Sigelo kun naŭzigzagaj
skriboj de generalo de
Ĝin-dinastio (1115 —
1234 p. K.)



Sigeloj de Ŭen Peng kaj He Ĝen
(dekstre estas vortoj gravuritaj
ĉiuflanke sur sigelo de Ŭen Peng)



余典
彭川先生善先生少
業有古松一株為重
于以公傳之而與典余
浦飲共不換其玩賞尚
五樂之余矣哉

先生之去同松區中
石家其子于出以松
先生之松松石而
傳之同
余請下未秋三松松
于松松為中



Sigeloj de diversdinastiaj eminentuloj de Ĉinio

aŭtentikigilo. Sur tia sigelilo oni gravuras ĉefe homojn, animalojn, ĉasadon aŭ dancadon, kiuj esprimas socian vivon, iafoje ĉefe ideogramojn de familia kaj persona nomoj garnitaj per gravuritaj drako, tigro, unukornulo, fenikso kaj testudo versimilaj kaj tre aprezindaj.

Sigelila gravuro distingiĝas per sia harmonia kunfandiĝo de kaligrafiaĵoj, dispozicio de strekoj kaj gravura maniero. La ĉina skriba lingvo havas diversajn skribmanierojn, kiuj ĉiuj montras apartan belecon de arto en diversaj gustoj. Delikata sigelilo devas havi harmonian dispozicion de ideogramaj strekoj, viglajn vejnojn kaj esti farita per lerta manipulado de gravurilo. Tre gravas la unueco inter gravurado, enhavo kaj formo. Ekde Ĵüandinastio ĉinaj kaligrafoj kaj pentristoj al kutimiĝas fari sigelon sur siaj verkaĵoj responde al iliaj stiloj. Ĝi estas marko propra al la arto de la ĉinaj kaligrafio kaj pikturo kaj ilia konsistiga parto. Estas diversspecaj sigeliloj de kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj, ekzemple, noma sigelilo, komenca sigelilo, finiteca sigelilo kaj sigelilo por kolektanto. Oni faras noman sigelon post la subskribo. Ĝi devas esti same granda kiel la subskribita nomo. Se oni volas fari du nomajn sigelojn, unu el ili devas esti intajla. Komencan sigelon oni faras sur la supra marĝeno kaj la sigelo povas esti ortangula aŭ ovala. Finitecan sigelon oni faras sur malsupra marĝeno kaj sigelon por kolektanto oni faras sur deca loko, ke ĝi ne malbeligu la verkaĵon.

La arto de sigelilgravuro prosperiĝas kiel kaligrafio kaj pikturo de Ĉinio. Kiel brila perlo, ĝi glimas inter la artoj de la tuta mondo. □

ABONU "EL POPOLA ĈINIO"!

Nun komenciĝas 1987-a abonvarba kampanjo por EL POPOLA ĈINIO. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1986 10 01 ĝis 1987 02 28), ricevos tradician ĉinan rulpenetraĵon. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	A\$	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugalia	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

VARBILON KAJ SENPAGAN SPECIMENON
NI SENDOS LAŬ PETO.

Ĉju Jŭan kaj liaj verkoj

de MEJ ĜI

Ĉju Jŭan estis la unua patriota poeto en la ĉina historio. Li naskiĝis ĉ. 340 a. K. en Ĉu-regno, en la mezaj jaroj de la Periodo de Militantaj Regnoj.

Ĉju Jŭan vivis ĝuste en la ora tempo de prozo de Ĉinio, tamen li fariĝis ne prozisto, sed poeto.

Pri tio mi interpretu per la kultura tradicio de Ĉu-regno. Ĉu-regno situis en la suda parto de Ĉinio, kaj ĝia kulturo kaj tiu de centra Ĉinio apartenis al malsamaj kategorioj. Tiu de centra Ĉinio estis oficiala kulturo, kiu akcentis pri personoj kaj praktiko; dum tiu de suda Ĉinio estis ŝamana kulturo, kiu kredis je dioj kaj fantomoj kaj estis imagriĉa. En la Periodo de Militantaj Regnoj, pro longatem-paj militoj kaj asimilado, ambaŭ kulturoj de la sudo kaj nordo kunfandiĝis, tamen konservante ĉiu siajn proprajojn, kion pruvis la prosperiĝinta prozo de la nordo. Dume en Ĉu-regno furoris ŝamanismo, kaj en kultado ŝamanoj kantis, dancis kaj ludis muzikon por amuzi la diojn. Samtempe, post longtempa disvolviĝo la popolaj kantoj prosperiĝis ĝis alta nivelo. En tia medio Ĉju Jŭan estis multe influita de la popola kanto. Ĉju Jŭan ĉerpis multajn materialojn el popolaj kultaj kantoj. La plej

klaran ekzemplon ludis lia "Naŭ Odoj". (En la ĉina lingvo "naŭ" havas signifon "multaj".) La vortuzado kaj metriko portis freŝajn karakterizaĵojn de popola kanto. La verkoj de Ĉju Jŭan estis novtipaj poemoj prilaboritaj kaj reformitaj surbaze de la popola kulturo de Ĉu-regno, sekve de tio la posteuloj nomis liajn verkojn "Poezio de Ĉu". Kaj en pli vasta senco, ĉiuj tiatipaj verkoj kreitaj de posteuloj de Ĉju Jŭan estis nomataj ankaŭ "Poezio de Ĉu".

Ĉju Jŭan devenis de aristokrato. Li estis tre diligenta en studo kaj erudicia, elokventa. Kiam li estis juna, lin tre ŝatis la reĝo de Ĉu-regno Hŭaj'ŭang. Kroniko notis, ke li estis grava kortegano ranganta nur sub ĉefministro. "En la kortego li estis konsultata de la reĝo pri ŝtataj aferoj, kaj ekster la kortego li akceptis alilandajn delegitojn kaj dukojn." Tio atestis, ke li estis plene konfidata de la reĝo Hŭaj'ŭang. En la longdaŭra aneksa militado Ĉu-regno jam disvolviĝis en unu el la plej potencaj regnoj, kaj nur Ĉin-regno povis rivali kun ĝi. Se Ĉu-regno alianciĝus kun aliaj regnoj por kontraŭstari al Ĉin-regno, Ĉu-regno povus unuigi Ĉinion; se ne, Ĉin-regno anstataŭus Ĉu. Ĉju Jŭan amis sian patrujon kaj esperis, ke Ĉu-regno



Poeto Ĉju Jŭan

potenciĝos kaj unuigos la tutan Ĉinion. Li firme staris por alianciĝo kun la kompare malgrandaj regnoj kaj persone vizitis Ĉi-regnon kaj kontraktis kun ĝi pri alianciĝo. Samtempe li konsilis al Hŭaj'ŭang fari reformadon en la regno kaj persone ellaboris novajn leĝojn.

Sed lia politiko estis oponita de Nanhoŭ, la edzino de Hŭaj'ŭang, kaj altrangaj korteganoj Princo Zilan kaj Jin Ŝang. Ili senĉese kalumniis Ĉju Jŭan antaŭ la reĝo. La stulta reĝo tamen kredis la ka-

lumniojn, eksigis Ĉju Jūan je la ofico kaj poste ekzilis lin. En tiu tempo Hŭaj'ŭang perfidis la interkonsenton kun Ĉji-regno, kredis la trompan promeson de Ĉin-regno pri "donaco de 300-kilometra teritorio de Ĉin al Ĉu" kaj amikiĝis kun Ĉin. Sed fine Hŭaj'ŭang akiris neniun colon da tero kaj male trompote veturis al Ĉin-regno kaj mortis tie kiel malliberulo. Pereis ankaŭ Ĉu-regno. Antaŭ la fakto, ke la popolo baraktis en mizero, kaj la ŝtaton minacis perejo, Ĉju Jūan povis fari nenion por savi la patrujon. Li dronis en granda malĝojo kaj indigno. Fine li esprimis en versoj sian profundan amon, indignon, alvokon kaj akuzon. Liaj fortaj sentoj ondis kiel muĝanta torento de diluvo.

Ĉju Jūan mortis la kvinan tagon de la kvina monato de 278 a.K. laŭ la tradicia ĉina kalendaro. Laŭdire, li venis ekzilate al Milŭo-rivero, kun velka vizaĝo kaj malorda hararo. Li verkis poemon "Sopiro al Ĉangŝa" kaj poste sin dronigis en la rivero Milŭo, pendiginte sur si ŝtonegon.

Ĉju Jūan restigis al la posteuloj dudekelkajn verkojn. La verko "Naŭ Elegioj" enhavas naŭ poemojn: "Spleno pro la Paseo", "Travado de Rivero", "Malĝojo pro Perejo de Ĵing", "Sopiro", "Odo pri Mandarino" k.a. La poemoj ĉefe esprimis lian idealon, malkaŝis kaj kritikis la malluman politikon de Ĉu-regno. La versaĵoj estis kolektitaj kaj kompilitaj de posteuloj en la Okcidenta Handinastio, kaj titolitaj per "Naŭ Elegioj". Alia verko de Ĉju Jūan, "Naŭ Odoj", konsistas el 11 poemoj. Supre mi jam diris, ke la verko devenis de kultaj kantoj de la popolo, estas versaĵoj pri dioj. En "Naŭ Odoj" oni povas renkonti diojn de la suno, nuboj, rivero, monto kaj martiroj. La dioj en la versaĵoj havis unuflanke superhoman potencon, kaj aliflanke ĝojon kaj malĝojon same kiel karnuloj. Iuj el la versaĵoj priskribis

ankaŭ amaferon de dioj, kio donis al la versaĵoj romantikan ĉarmcon. Alia verko "Demandoj al la Ĉielo" estis freŝe karakteriza en skribmaniero. La frazoj ĉiuj el kvar ideografiaĵoj estas animskuaĵoj. La poeto faris 170 demandojn pri la naturo, mitoj kaj legendoj. Pere de kritiko al la tradicia ideologio kaj la socia realo, la poeto aludis sian malkontenton al la aktuala socio. La versaĵoj ampleksis multajn branĉojn de la sciigo, kio montris lian eruditecon.

La plej fama el la verkoj de Ĉju Jūan estas "Lamento". La senmorta brila majstraĵo el 373 versoj kun 2 490 ideografiaĵoj estas la plej longa politika lirika poemo en la antikveco. La poemo rakontis la kialon de la melankolio de la aŭtoro kaj lian profundan maltrankvilon. Oni povas rigardi la poemon aŭtobiografio de Ĉju Jūan.

La vivo de Ĉju Jūan estis tragedia. En la tuta vivo la poeto senĉese strebis al la idealo, tamen senĉese malsukcesis. Pere de la priskribo de la proceso de strebado, eliluziigo kaj persista strebado de la aŭtoro, "Lamento" esprimis lian noblan idealon, bolantan pasion, modlis virtan kaj superan, imponan figuron de la heroo. Samtempe, pere de rakontado pri siaj spertaĵoj, la poeto malkaŝis la malluman realon de Ĉu-regno, kio des pli forte prezentis liajn malĝojn pro la nacio kaj popolo kaj neŝanceleblan lojalecon al ili.

"Lamento" povas esti dividita en du partojn. La unua duono temas ĉefe pri la pasintaĵo kaj maljusta trakto al la poeto. La versaĵo ripetfoje esprimis lian politikan idealon "promocii virtulojn kaj talentulojn, eviti ekarton per fadenliniilo". Tial la poeto tre atentis pri memkulturo, kiel li esprimis en versaĵoj, li "havas multajn belajn virtojn, kaj samtempe ankaŭ ĉarman aspekton". Cetere la poeto kulturis sin mem "trinkante mantere rosojn sur magnolioj, man-

ĝante vespere florpetalojn de krikantemoj". En plena pasio, la poeto esperis, ke la reĝo Hŭaj'ŭang povos preni antikvajn eminentajn regantojn Jaŭ kaj Ŝun kiel siajn ekzemplojn kaj ĉerpi lecionojn el la perejo de la kruelaj regantoj Ĉje kaj Ĝoŭ, por konduki la regnon sur la vojon al potenco. Por realigi sian idealon, li diris kun ekscitiĝo al Hŭaj'ŭang: "Forigu la malvirtojn dum la juneco, kaj ŝanĝu la leĝojn praktikatajn". Li maltrankviliĝis, ke la tempo forpasis neniun atendante. Kiam li elreviĝis, li indigne plendis kontraŭ Hŭaj'ŭang, kiu tute ne rimarkis lian lojalecon kaj anstataŭe kredis kalumnion kontraŭ li. Li kritikis la reĝon, ke li estas tro kaprica. Li samtempe riproĉis ankaŭ la konspirulojn, ke ili estas ĵaluzaj kaj kalumniaj. Tamen en la marĉo de mallumo la poeto neniom cedis. Li komparis sin kun aglo, "La aglo neniam miksis sin inter ordinarajn birdojn, kio herediĝas de antikve". Li preferis morti en floroj ol vivi en koto. Li diris, ke li timas nenian minacon, eĉ se oni radumus lin. En la versaĵo klare vidiĝas figuro de majesta kaj nobla poeto.

La dua duono koncentre priskribis la esploradon de la poeto pri la estonta vojo kaj ankaŭ montris la virton de refleksiĝo de la aŭtoro. "La vojo estas longe longa, mi esploros supre kaj malsupre". Retrorigardante la historion, li prezentis por ekzemplo plurajn eminentajn regantojn kaj iliajn brilajn sukcesojn en la historio, pli profunde eksplikis sian politikan idealon kaj penis admoni Hŭaj'ŭang apliki liajn proponojn. Sed kiam li trovis nenian ŝancon por disvolvi sian talenton, nek samideanon, li imagis al si ĉielan regnon, kie li povus realigi sian politikan idealon. Tamen tio estis revoj. Li do akceptis la admonon de ŝamano Ling Fen kaj decidis forlasi la patrujon por daŭrigi sian esploradon. Kiam li leviĝis kaj estis baldaŭ forlasanta la patrujon,



li rigardis al la tero de la patrujo kaj sentis profundan doloron. Li tiel priskribis en la versaĵo: “La livreuloj bedaŭras, la ĉevaloj lanti-

ĝas, ili haltas en hezito kun ĉirkaŭrigardo”. En la anima kontraŭdiro la poeto decideme restis. La poemo abrupte finiĝis ĉi tie. Tamen la kortuŝa patriotisma spirito de la poeto ankoraŭ agitas homojn.

“Lamento” estas brilega, romantikisma majstraĵo. La poemo karakteriziĝas per libera imago, brava troigo kaj mistere bela fantazio. En la poemo estas multaj mitoj, legendoj, historiaj personoj kaj naturaj fenomenoj, kiuj teksis jen misteran mondon, jen imponan pentraĵon. Ekzemple, en priskribado de sia esplorado, li prenis fenikson kiel sian ĉaron, ĵadan kiel ĉevalon. Matene li ekveturis de Ĝiŭji-monto kaj vespere atingis Kunlun-monton. Li trinkigis la ĉevalon ĉe la baseno, kie sin banis la suno, kaj ligis la ĉevalon al la arbo de kie leviĝas la suno. Li havis sian gvardion el la veturigisto de la luna dio, venta dio kaj buntaj feniksoj. Li frapis je la pordo de la Dio sur la ĉielo

kaj li petis belan knabinon sur la tero. Li aŭgurigis Ling Fen, kaj ankaŭ petis la sorĉiston Uŝjan venigi diojn. . .

Grandnombraj metaforoj en la poemo plidensigis la romantikisman koloron. La poeto ofte komparis bonajn objektojn kun aromaj herboj kaj belulinoj. Cetere li skribis en la poemo, ke li ornamis siajn vestojn per diversaj aromaj floroj kaj herboj, aŭ faris por si vestojn el folioj kaj floroj de lotuso. Per tiuj metaforoj li esprimis sian noblan virton. Li metafore komparis suverenojn kaj subulojn kun geamantoj, flatemajn korteganojn kun fiherboj kaj rabobirdoj, ĵaluzon de la maliculoj kun tiu de virinoj al belulino, kaj strebon al idealo kun serĉo de belulino.

La poemoj de Ĉju Jŭan metis la bazon por la ĉina romantikisma literaturo. Pro siaj majstraĵoj Ĉju Jŭan ĝuas eternan honoron.

Popularascienca Libro:

Aŭtobiografio de Bakterio



La “reputacio” de bakterio verŝajne estas ne bona, multaj rigardas ĝin malutila elemento en la mondo de vivuloj, do kia estas la fakto? En sia libro la aŭtoro priskribas la aktivecojn de bakterio per bele proza lingvaĵo. La libro konsistas el jenaj 15 pecoj: Mia Nomo, Mia Naskiĝloko, Mia Familia Vivo, Senkompata Fajro, Vojaĝo en Akvolando, Problemo de Vivtenado, Esplorado al Spira Vojo, Batalo en Pulma Haveno, Sperto pri Sango-manĝo, Rememoro pri Mampintoj, Okupado de Nutra

Kanalo, Kunveno en la Intesto, Forigo de Putraĵoj, Grunda Revolucio, Ekonomiaj Rilatoj.

La aŭtoro Gaŭ Ŝiĉji estas bakteriologo, fama ĉina scienc-populariga verkisto, honora prezidanto de la Ĉina Asocio de Scienc-popularigaj Verkistoj.

Kun la prospero de la Esperantomovado, la manko de sciencaj legaĵoj pli kaj pli akre reliefigas. Por kontentigi bezonon tiuflankan de esperantistoj, la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis la libron kiel sian unuan provon en scienc-populariga kampo.

Numero: 13-Es-1982P

Formato: 11.5×18.5 cm 58pĝ.

Prezo: £0,90 US\$1,60

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



(Daŭrigo de p. 30)

Ŝuang hezitis, ĉar li timas ofendi ŝin kaj tiu ne aĉetas plu de li la stokitan brandon. Sed meditinte momenton, li ŝanĝis la penson. Li konsentis iri al ŝi por sondi ŝian opinion, tio ne ofendos ŝin nek Fang kaj Flavokululon.

Interkonsentinte, ili kune venis al la Muzika Jasmendrinkejo. Estis laborplena sezono por terkulturistoj. La drinkejo estis vaka. Jasmeno sin okupis en la kuirejo por prepari manĝaĵojn por vespera negoco. Vidinte la tri gastojn, ŝi tuj ĉesigis sian laboron por ilin saluti. Proponante al ili cigaredon, ŝi demandis: "Vi multe honoras mian drinkejon per via vizito! Ĉu mi povus scii, kion vi ordonos?"

"Franjo Jasmeno," Fang la Sesa diris, karesante siajn lipharojn, "vi ja profitegis en la pasintaj kvar monatoj."

"Tamen multe malpli ol vi, mastro Fang."

"Ho, kia moko! Ni triopo estas malpli ol vi."

"Franjo," daŭrigis Flavokululo, "vian negocon multe helpis la blindulo."

"Vere," defie respondis Jasmeno.

"Franjo Jasmeno, mi proponus, ke la blindulo ludu en niaj kvar butikoj laŭvice. Alie, niaj butikoj vakiĝos tuj, kiam leviĝos muziko en via drinkejo."

"Kio? . . . Ha, kiel bona elpensajo, kiel vi elkovis? Vi volas subfosi min? Mi malkaŝe diru, neblas!"

"Franjo Jasmeno, vero tranĉas la orelojn — la blindulon unuafoje vidis ni kvar kune. Vi ja ne rajtas sola profiti de li."

"Galimatio!" kuntiriĝis ŝiaj brovoj en kolero. "Tiuvespere vi ĉiaprekste rifuzis lin. Vi timis, ke li malpurigos vian butikaĉon? Estas mi, kiu enlasis lin en mian domon kaj bone regalis lin. Nun vi trovis lin iom utila kaj intencas lin forrabi. Kiel vi ne scias honton? Fi!"

"Franjo, ne diru tiajn malagrablaĵojn. Proverbo diras, ke oni devas dividi feliĉon kaj profiton. Ni interkonsiliĝu afable, alie estos por vi infamio."

"Kion vi povas fari kontraŭ mi?"

"Franjo Jasmeno, vi ne estas parenco nek amiko por la blindulo. Ne decas longtempe loĝigi lin en via domo kaj plie, socialismo malpermesas ekspluaton. Vi profitas de li, sed ne rekompencas lin. Tio ja estas ekspluato. La leĝo malpermesas. . ."

"Kiel vi scias, ke ni ne estas parencoj?"

"Ĉu vi volas edziniĝi al li?"

"Vere! Mi tuj anoncos tion. Li estos mia edzo. Ni kune funkcigos la drinkejon. Ĉu tio estas ekspluato? Ankoraŭ kian furzon vi ellasas?"

"Mi dungos lin kontraŭ cent ĵuanoj ĉiumonate!"

"Mi pagos 200 ĵuanojn."

"Forportu vin! Mi ne konsentos eĉ kontraŭ 1 000 ĵuanoj."

Jasmeno insulte elpelis ilin, sed ankoraŭ koleris en la drinkejo. Tute ekster ŝia atendo, tiuj tri ruzaj uloj avidas la maturiĝintan frukton. Ja estas tempo verŝi la koron al la blindulo.

Ŝi ĉesigis la laboron, formetis la antaŭtukon kaj malfermis la pordon al la malantaŭa korto.

Ŝi stuporiĝis: La blindulo rektalie staris ekster la ĉambro, cerbumante same kiel filozofo. Sur lia klara kaj brila frunto aperis profunda falto.

Terure tremetis lia paro da akraj oreloj.

Jen komenciĝos interesa spektaklo.

"Ĉion vi aŭdis, ĉu?"

La blindulo kapjesis.

Jasmeno forte prenis lin en sian sinon. Per siaj ardaĵ lipoj ŝi kisis

liajn grandajn orelojn kaj murmuris: "Ho, mia kara, la frukto maturiĝis, estas tempo ĝin rikolti."

La blindulo kategorie liberigis sin el ŝiaj brakoj. Tremetis liaj lipoj. Li ekploris.

"Mia karulo, vi ŝirus mian koron," Jasmeno forviŝis al li larmon per sia mantuko, "Ni do geedziĝu!"

"Ne, ne, ne!" La blindulo subite levis sian kapon kaj diris kategorie.

"Kial?"

"Mi ne scias."

"Ĉu mi ne indas por vi? Ĉu mi faris ion malbonan kontraŭ vi? Ho, mia kara . . . Vi ne vidas, tamen vi povas palpi min de la kapo ĝis la piedoj. Ĉu sur mia korpo estus cikatro kaj survizaĝe eĉ unu variolmarko? Kiam mi ŝokis vin de kiam vi enloĝiĝis en mian domon? Mi ja estas virino. Mi volas viron. Tamen ne plaĉas al mi aĉaj viroj. Mi serĉis kaj serĉadis. Fine vi aperis kvazaŭ en mia sonĝo. Je la unua vido mi jam certiĝis, ke vi estas mia edzo, mia trezoro donacita al mi de la ĉielo . . . De longe mi jam pretis

dediĉi ĉion mian al vi. Tamen skrupulon mi havis, ke mi fuŝos la aferon. Mi timas ankaŭ, ke pli da akvo inundos la ĝermon. Mi atendis kaj atendis kaj senrezerve amas vin. Sed vi, tiel apatia. . ." Jasmeno ekploris.

"Franjo Jasmeno, vi estas bela — Mi aŭdis tion antaŭ longe. Ne vi ne indas por mi, sed male, mi ne indas por vi. Via sincereco al mi gravuriĝis en mia koro, tamen . . . mi devas foriri. Mi nepre devas foriri . . . Nun mi iras for . . ."

La blindulo palpe iris pretigi sian pakaĵon. Lin sekvis Jasmeno. Vidante, ke li ekportis la sakojn grandajn kaj malgrandajn surŝultre, ŝi sentis neelteneblan korŝiron kaj svenis.

Kiam rekonsciiĝis Jasmeno, la blindulo jam iris for.

Ĉivespere regis plena mallumo en la Muzika Jasmen-drinkejo. En malforta lunlumo oni vidis, ke ŝia pordo estas ŝlosita per granda seruro. Neniu sciis, kio okazis. Sanŝje klarigis mistere, ke ĉe la vesperiĝo li propraokule vidis, ke la juna blindulo iras okcidenten laŭ la digo kaj post nelonge lin

postkuras Jasmeno. Ĉu ŝi atingis lin? Oni ne scias. Kio rezultis?

Daŭre sin etendis orienten Balong-ŝoseo malantaŭ Masang-urbeto. La nove pavimita vojo spegule rebrilis. Se oni iros 20 km. orienten laŭ la ŝoseo, ili renkontos la vojlaboristojn, malnovajn amikojn de la urbeto. Tie ankoraŭ malbonodoras la fandita asfalto. Ankoraŭ tiel oreplaĉaj estas iliaj krudaj ŝercoj.

Tagmeze la oktobra suno varme karesis la teron kaj ankaŭ la laboristojn ripoze kuŝantajn ĉe la vojrandoj. Pigre alblovis sudokcidenta vento, levante polvan nebulon. La atmosfero estis sufoka. Subite iu per raŭka voĉo ekzumis melodion konatan kaj emocian. Post momento akompanis dekoj da voĉoj. Fine ĉiuj ekkantis. En la ora sunlumo ili kantis melodiojn unu post alia, altatonan, basan, melankolian kaj serenan. Ĉu tio estas popola muziko? Ĝi ekspansiis senĉese. Fine la muzikaĵo venis kvazaŭ ne de la vojlaboristoj, sed de la tero senkompare dika kaj solida. □

Esperantigis LIŬ CAJSENG

(Daŭrigo de p. 28)

komponan fakultaton de la Centra Konservatorio de Ĉinio. Foje li longe silentis, foje li senĉese babilis, foje li aspektis kvieta, foje gajega. Inter liaj malgajaj densaj brovoj kaj eleganta barbo viglas paro da nigraj okuloj.

Krom komponado li amas apreci pentraĵojn. Li aĉetis multajn bildo-albumojn. Iun tagon li aĉetis multajn farbojn kaj faris dekojn da pentraĵoj, per kiuj li okazigis personan ekspozicion en la konservatorio. Multaj trovis la pentraĵojn interesaj, sed ne komprenis. Librojn (krom tiuj

pri muzika teorio) por li estas dormigilo. Kelkiam mi voĉlegis por li belajn tekstojn, kaj poste mi tute forgesis la legitaĵojn, sed li bone memoris kaj utiligis ilin okaze. Neniu mondfama literaturaĵo interesis lin, sed li bone scias la literaturan historion kaj metrikon. En diskuto neniun "terminon" mi povis eldiri, sed li estis elokventa kaj povis tuj konvinki min.

Li ne scias bone disponi sian tempon kaj faras ĉion kaprice, ĉio ĉe li estas en malordo. Eble li eklegis kavaliran romanon kaj daŭrigis tion en tagnokto, kiam li estis terure okupita. Se mi

forprenis de li la libron, li televidis piedpilkadon. Sufiĉe kriinte kune kun la rigardantoj en la televido, li faris longan elspiron kaj laboris tutan nokton super komponado. La sekvantan matenon venis orkestra direktisto por preni muziknotaron. Li donis al li sian laboraĵon, sed kun pala kaj laca vizaĝo. La direktisto foliumis la notaron kaj admiris ĝin. La komponisto ofte diras, ke lia plej ŝatata distro estas ekskurso. □

* La aŭtoro estas juna verkistino, edzino de komponisto Ĉju Ŝjaŭsong.

Travado de rivero¹

de ĈJU JŪAN

Strangan veston mi ekŝatis infanaĝe,
EN oldeco mi preferas ĝin senŝanĝe.
Longan spadon portas mi kun ŝato,
Altan ĉapon sur la kapo,
Perlaj kaj juvelaj ornamaĵoj
Sur la vesto brilas.
La ĥaosa mondo min ne scias,
Iri foren senreturne mi decidis.
Jungi al la ĉaro drakojn miajn,
Kaj ekskursi kun Sun² en edeno dia.
Florojn jadajn frandos ni sur Kunlun,
Vivi longe mi ja strebos kiel l'universo,
Por eterni kiel suno kaj la luno.
Bedaŭrinde Suvereno min ne scias,
Morgaŭ Ŝjang-riveron mi transvados.

* * *

Sur la bordo apud Eĉu mi retrorigardas,
En frosteta vento mi vespiras.
Lasas apud monto mi la jungitaron,
Ripozigas en arbaro mian ĉaron.
Per boato en la rivero Jŭan mi veturas,
Tra fenestro de kajuto aŭdiĝas remado.
La boato glitas lante,
En akvokirleto algluiĝis.
En mateno mi forlasis Uangĝu,
Vespere mi ja atingis Ĉenĵang.
Kun honesta kaj lojala koro,
Mi malĝojas neniom en ajna foro.

* * *

Sed en Ŝjupu min atakas la konfuzo,
Kien veni mi ne scias.
En profundo de arbaro obskureca,
Simigregoj loĝas.
Ŝirmas sunon monto alta,
Kovris senlimaĵon blanka neĝo,
Valon lavas ofta pluvo.
Nuboj densaj premas tegmentegon.
Vivis mi sen ĝojo,
En soleco nun pli.
Tamen mi ne min plaĉigos al la moro,
Malgraŭ ke mi vivos en ĉagreno.

* * *

Ĝjeju³ punita je senharigo,
Sanghu⁴ povris almozule.
Kaj lojalaj talentuloj
Trampis ekster la nomumo.
Ziŝju⁵ sin mortigis malespere,
Bigan⁶ dispeciĝis pro lojalo.
Jen ekzemploj el la historio,
Mi ne plendu kontraŭ io.
Mi persistos ĉe la justo kaj la virto,
Malgraŭ ke mallumo min sufokos ĝis la morto.

* * *

Jen la kanto:
Flugis foren pavo kaj feniksoj,
Dum paseroj nestis en palaco.
En kamparo velkas aromfloroj,
La kortegon regas putrfetoro.
Ĉio fuŝe malordiĝis,
Tago, nokto inversiĝis.
Lojalplena mi foriras,
Pro obskura estonteco.

Esperantigita de ŬANG ŜIJONG

Notoj:

1. La poemo estas la dua ĉapitro de "Naŭ Elegioj" verkita de Ĉju Jŭan en lia maljuneco. La verko prezentis la kordoloron de Ĉju Jŭan, kiam li estis ekzilita de la reĝo Ĉingŝjangŭang (filo de Hŭaj'ŭang) al fora loko.
2. Laŭ la ĉinaj legendoj Sun estis saĝa suvereno en la antikva Ĉinio.
3. Ĝjeju — ermita talentulo en antikva Ĉinio
4. Sanghu — ermita talentulo en antikva Ĉinio
5. Ziŝju — generalo de U-regno en la Periodo Printempo kaj Aŭtuno. La regnestro rifuzis lian prudentan proponon kaj li devigite sin mortigis finfine.
6. Bigan — Fidela subulo de la tirana reĝo Ĝoŭ de Jin-dinastio. Lia koro estis enukleita de la tirano pro la lojaleco.

FIŜHOKADO SUR MARO

Ĉingdaŭ estas ideala loko por fiŝhokado.

Ĉingdaŭ situas en la suda parto de Ŝandong-duoninsulo de orienta Ĉinio. Ĝi dorse kroĉiĝas al Laŭŝan-monto kaj fronte rigardas al maro. Ĝjaŭĝoŭ-golfo kiel lotusfolio sternaĝas antaŭ la urbo. Tie abundas fiŝoj kaj aliaj mar-produktaĵoj.

Septembre de 1986, fiŝhokaj amatoroj el dekkelkaj landoj kaj regionoj, inkl. de Britio, Japanio, Usono, Svisio, Aŭstralio kaj Hongkong, partoprenis en la bela urbo la Unuan Internacian

Fiŝhokan Konkurson okazigitan de la urbo.

Matene de la 21a de septembro komenciĝis la konkurso. Alteriĝa ponto longa 400 metrojn estis plena de gajaj homoj. Sur la bordo ĉe la alteriĝa ponto oni prezentis leon-dancon en akompano de tamburado kaj gongado. Geknaboj en naciaj kostumoj salutis la partoprenantojn de la konkurso, svingante florbukedojn.

Tiutage la suno brilis kaj la maro estis kvieta. La amatoroj kun fiŝvergo ĝoje ascendis la

plezurŝipon "Malgranda Ĉingdaŭ". La ŝipo kuris antaŭen. Post unu kaj duona horoj ili atingis nian hokfiŝejon — la Duan Bredejon de Mar-produktaĵoj de Ĉingdaŭ en la orienta parto de Ĝjaŭĝoŭ-golfo. Tie ĉi abundas diversspecaj fiŝoj. Post kiam la ŝipo ankriĝis, la tie atendantaj pli ol 30 boatoj alproksimiĝis al la ŝipo unu post alia. La konkursantoj estis dividitaj en 36 grupojn. Ĉiu grupo el tri fiŝhokantoj prenis unu boaton kaj laŭvice veturis al la difinita loko. Precize je la 9-a la konkurso komenciĝis. La

Fiŝhokado sur maro



boatoj leviĝis kaj malleviĝis en ondoj de la vasta maro. Mevoj flugis tien kaj reen en la blua ĉielo kaj blovetis zefiro. Kiom bela pejzaĝo!


Mi estas veterana je fiŝhokado en riveroj, lagoj kaj akvokonservejoj, sed estis por mi la unua fojo, ke mi hokfiŝis surmare. Kiel aliaj konkursantoj mi en savvesto kaj kun viziero donita de la Ĉingdaŭ-a Hokfiŝista Asocio atente sidis en la boato kaj ĵetis la fiŝhokon kaj plumbaĵon en la akvon, kiu profundas pli ol 20 metrojn. Mi sentis la plumbaĵon falanta kaj vidis la radeton de la fiŝhoka bobenilo senĉese turniĝi. Post kiam la plumbaĵo atingis la fundon de la maro, mi kun pacienco atendis. Post momento la fino de la bobenvergo balanciĝis forte. Mi levis ĝin, sentante ĝin sufiĉe peza. Jen fiŝo estis hokita! Mi estis emociita kaj streĉita kaj malrapide volvis la fadenon. Post granda penado mi fine elakvigis la fiŝon. Jen estis angilo, helbruna kaj ventre blanka, kun longeco de 0.5 metro. La fiŝo estas bongusta kaj nutroriĉa. Tia fiŝo estas bonvena en la bazaroj de Pekino.

Mi kaj trinkis Ĉingdaŭ-bieron kaj hokfiŝis sur la maro. En malpli ol du horoj mi sukcesis hoki ses angilon samgrandajn kiel la unua. Ho, mi fiŝhokis simple en angila nesto!

Foje kaj foje aŭdiĝis ĝojkrioj de aliaj boatoj: "Angilo, angilo!" "Granda pleŭronekto!" "Plia ŝtonkapa fiŝo!"

Je la 1-a posttagmeze finiĝis la konkurso kaj la boatoj revenis al la plezurŝipo unu post alia. La konkursantoj, portante retsakojn kun diversgrandaj kaj malsamspecaj fiŝoj, komparis inter si, kiu hokis pli multe kaj

*La aŭtoro
(la unua de
maldekstre)*



kies fiŝo estis pli granda kaj peza.

El la partoprenantoj estis patro kaj filo. Ili estis s-ro Robert Neil Lindsay kaj lia filo David James Lindsay. S-ro Robert Neil Lindsay aĝas 77 jarojn kaj estas membro de la Melburna Hokfiŝista Asocio de Aŭstralio. Antaŭ 60 jaroj li ekŝatis fiŝhoki. Li kun emocio diris: "La fiŝhokado estas bone aranĝita kaj mi sentas komfortecon kaj oportunecon. Se venontjare okazos ĉi tie tia konkurso, mi partoprenos ĝin ankoraŭfoje." Lia filo funkcias kiel vanda direktoro de turisma oficejo en Aŭstralio. Li foje refoje admiris la belan pejzaĝon, historiajn vidindejojn kaj komfortajn ekipaĵojn por turismo de la urbo. Li diris: "La urbo estas plej alloga!" Li intencis preni la urbon kiel turisman etapon de ilia oficejo, por ke pli da aŭstralianoj vojaĝu, somerumu kaj fiŝhoku ĉi tie.

Fiŝhokisto de la Fiŝhokista

Klubo de Long Beach de Usono kaj fiŝhokistoj el Ŝimonoseko de Japanio kune ĝuis festenon el fiŝoj hokitaj de ili. Dum la festeno iu japana fiŝhokisto diris kun ĝojo al la usonaj fiŝhokistoj: "Ŝimonoseko kaj Ĉingdaŭ estas amikaj urboj. Kaj ankaŭ Long Beach kaj Ĉingdaŭ estas tiaj urboj. Tial Ŝimonoseko kaj Long Beach estas ankaŭ amikaj urboj." Ĉiuj ĉeestantoj tostis por la amikeco inter la tri urboj.

En la konkurso s-ro Perka Runonen el Finnlando gajnis la plej bonan sukceson. Li partoprenis en la konkurso en akompano de sia edzino. Li hokis fiŝon la plej grandan en la konkurso kaj superis ĉiujn per totala pezo de hokitaj fiŝoj. Tiel li gajnis du orajn medalojn. Kiam li estis premiita, oni aplaudis varme pro lia bona sukceso. Mi gajnis la duan lokon de la nombro de hokitaj fiŝoj, tamen mi kiel aliaj tre ĝojis pro mia partopreno en la konkurso. □

Amo de maljunuloj

Ĉinio havas ĉ. 100 milionojn da maljunuloj super la aĝo de 60 jaroj, el kiuj preskaŭ duono restas sola pro la morto de sia kunulo, eksedziĝo aŭ fraŭleco. Por akiri feliĉon en siaj lastaj jaroj, multaj maljunul(in)oj kaŝe aŭ senkaŝe serĉas amat(in)on. Oni nomas ilian amon vespera amo. Sekve de la socia malfermo en la lastaj jaroj, iom post iom febliĝis la influo de la malnovaj konceptoj pri amo kaj malgrandiĝis la malhelpo el diversaj flankoj, sed pli kaj pli multiĝis maljunaj geamantoj, kiuj perdis sian edz(in)on, kaj variaj estas iliaj manieroj serĉi amat(in)on.

EN SVATAGENTEJO POR MALJUNULOJ

En malnova korto de kelkaj grizharaj maljunuloj gaje ludis

maĝangon kaj ĉinan ŝakon ĉe kvadrataj tabloj. Tie estas la Huĝjaloŭ-a Svatagentejo por Maljunuloj iniciatita en Pekino.

Maljunuloj diferencas de junuloj en serĉado de amat(in)o Ili, realismaj, ne elektas ejon nek evitas aliajn. Antaŭ nelonge mi vizitis tiun svatagentejon. Mi vidis, ke ili ŝajne ludas maĝangon kaj ĉinan ŝakon, sed fakte parolas pri io alia. Iuj pri loĝkondiĉoj, aliaj pri vivteno, triaj pri ŝatokupo kaj kvaraj alttone pri alia temo. Videble, ili ĉiuj laŭeble konis aliajn en la babilado kaj samtempe prezentis sin mem.

Sur sofo sidis paro da gemaljunuloj, el kiuj la viro malrapide kaj mallaŭte parolis pri siaj enspezo, loĝejo kaj gefiloj kaj la virino atente aŭskultis. Ŝajnas,

ke konatoj babilas en renkontiĝo. Sed ĉe la adiaŭo la viro demandis: "Ĉu ni povas revidiĝi?" Ha, ili ĵus interkonatiĝis.

Tiu svatagentejo fondiĝis en julio 1985. Ĝia fondintino Liŭ Ŝuĉin diris, ke en la tago de la fondiĝo de la svatagentejo, 273 gemaljunuloj vicatendis por enskribiĝi. En la daŭro de nur iom pli ol unu jaro la nombro de la enskribitoj atingis jam mil. Nun kontaktiĝis pli ol 80 paroj kaj geedziĝis 58 paroj, el kiuj pli ol 10 partoprenis en la kolektiva nupto aranĝita de la svatagentejo.

Ankaŭ en Ŝanhajo, Tjanĝin, Ŝenjang, Uhan kaj Ŝjian fondiĝis simila svatagentejo. Tio estas unu el la efikaj rimedoj por reedz(in)igi maljunul(in)ojn, kiuj perdis sian kunulon.

AMO ANKORAŬ PROFUNDA EN LA MALJUNECO

Liŭ Ĝingjan kaj Ŭang Ĝenĉin interkonatiĝis en iu aktivado okazigita de la Huĝjaloŭ-a Svatagentejo por Maljunuloj kaj geedziĝis.

Liŭ Ĝingjan, 62-jara, perdis sian edzinon antaŭ kelkaj jaroj. Lia filino jam edziniĝis kaj lia filo laboras ekster Pekino. Li restis sola en la domo kun du ĉambroj kaj unu salono. Li sentis vakecon de la hejmo. Por forigi sian solecon, li kulturis florojn, bredis fiŝojn, lernis pentradon kaj kaligrafion. . . Mal-

Al kolektiva nupto



graŭ tio, la tagoj estis ankoraŭ tedaj. Ne sciante aranĝi la vivon, li grave malsaniĝis je la stomako pro manĝaĵoj foje varmaj foje malvarmaj. Li malgrasiĝis, paliĝis kaj multe maljuniĝis.

En 1985, kuraĝigate de sia filo Liŭ Ĉang, li venkis skrupulon kaj enskribiĝis en la svatagentejo. En iu aktivado li ekamis la teneran kaj virtan Ŭang Ĝenĉin. En la komenco de la pasinta jaro ili geedziĝis. La 59-jara edzino bone prizorgis lin. Matene ili kune faris korpajn ekzercojn ekster la domo kaj post vespermanĝo kune promenis kaj korverŝe babilis en parko proksime de la domo. Nun Liŭ Ĝingjan estas energi plena kun sana aspekto. Lia korpopezo kreskis je 10 kg. Emocie li diris al mi: "Familia vivo en harmonio estas tre grava por maljunuloj."

FILINO SVATIS

Iutage mi venis en kvadratan korton ĉirkaŭitan de domoj en la Orienta Distrikto de Pekino. Mi vidis trankvilan maljunan paron sidanta sur perono. Interparolante ili prilaboris legomon. Ili estas novaj maljunaj geedzoj Ŝju Ĵongĉen kaj Ĝaŭ Ŝulan, svatitaj de Ŝju Ĝijan, filino de la maljunulo.

Ŝju Ĝijan, mezaĝa virino, estas malkaŝema kaj afabla. Ŝi estas la plej juna el la kvar gefratoj. En la aĝo de kvin jaroj ŝi perdis sian patrinon, kaj la patro flegis ilin ĝis ili geedziĝis. Por ne malhelpi siajn tre okupitajn gefilojn, Ŝju ne volis vivi ĉe ili. Vidinte, ke la patro estas sola tuttage, Ŝju Ĝijan petis iun svati lin al maljunulino Ĝaŭ. Je la unua vido la gemaljunuloj estis kontentaj unu pri la alia. Sed Ĝaŭ havis nek infanon nek en-



Liŭ Ŝuĉin (maldekstre) gratulas la novgeedzojn.

spezon, kaj pro tio Ŝju timis, ke ilia geedziĝo malfaciligos la vivon de la gefiloj, kaj ankaŭ Ĝaŭ timis, ke oni mokos ŝin pro tio, tial la afero estis prokrastita. Ŝju Ĝijan kaj ŝiaj gefratoj decidis doni ĉiumonate al sia patro 50 jŭanojn (ĉ. 13.5 usonajn dolarojn) por lia vivteno kaj persvadis la gemaljunulojn pri geedziĝo. Poste ŝi akompanis ilin al rilata oficejo, ke ĝi registru ilin por geedziĝo. Kiam la gefiloj de Ŝju vokis Ĝaŭ Ŝulan per "panjo", ĉi tiu ne povis sin deteni de larmoj. Ŝi diris: "Mi ne atendis, ke feliĉo venis al mi en mia maljuneco, kaj mi havas obeemajn infanojn."

Tiel Ŝju komencis sian novan vivon. Li preferas raviolojn, lia edzino ofte preparas por li tian manĝaĵon aŭ aliajn farĉitajn farunaĵojn. Antaŭe Ŝju estis hejmosida, sed nun eliras por iel servi al najbaroj. Hejmen reveninte, li rakontis tion al sia edzino, kaj ŝi kun granda intereso aŭskultis. Ili kune vizitis kinejon kaj teatron kaj ekskursis al vidindaj lokoj en antaŭurbo. Ŝju Ĝijan tre ĝojas, ke la maljuna patro estas en bona humo-

ro kaj fartas pli bone ol iam antaŭe.

ĜOJO DE LA FAMILIO

Maljunuloj serĉas amat(in)on atenteme kaj serioze. Maljunulo Daj Ĝoan diris: "Konveneco kondukas al feliĉo, malkonveneco al ĉagreno."

Daj Ĝoan havas 69 jarojn. Lia edzino forpasis en 1985 pro malsano. Liaj gefiloj ŝarĝiĝis per profesia laboro. La dommastrumado falis sur la maljunulon. Tage li sentis lacon, nokte solecon. Foje li malsaniĝis. Malgraŭ ke liaj gefiloj laŭeble prizorgis lin, li trovis, ke ili ne povas tiel bone flegi lin, kiel lia edzino, precipe nokte ili ne povas resti ĉe li kiel ŝi. Do venis al li en la kapon ideo reedziĝi. Li konsiliĝis kun siaj gefiloj, kiuj tion aprobis, ĉar ankaŭ ili trovis, ke eĉ ilia perfekta prizorgado ne povas forpeli lian solecon.

Post nelonge lia amiko svatis lin al Ĉen Ĵuling, 53-jara statistikistino. Ŝiaj du filoj jam edziĝis kaj loĝas aparte. Post kelkfojaj kontaktoj la gemaljunuloj



Familio en ĝojo (la dua de dekstre estas Daj Ĝoan kaj la kvara de dekstre Ĉen Ĵuling)

trovis, ke ili havas saman ŝat-
okupon kaj povas harmonie kun-
vivi. Ĉen Ĵuling ŝatas kaligra-
fion kaj skribas bele, kaj Daj es-
tas en lernado de kaligrafio kaj
bonŝance ekhavis instruanton.
Krome, ŝi bone scias dommastru-
madon kaj estas lerta en prepa-
rado de pladoj. Ĝuste tion Daj
deziris. Ili amas unu la alian
kaj okazigis nupton post kelkaj
monatoj.

Geedziĝinte, ili vivas ankoraŭ
kune kun la gefiloj. Daj havas
filinon needziniĝintan, filon,
bofilinon kaj nepinon. Vidinte,
ke ili estas okupitaj de lernado
kaj laboro, Ĉen Ĵuling volonte
prenis sur sin la dommastruma-
don. Post laboro la gefiloj kon-
tente ĝuis varmajn manĝaĵojn.
Kiam ŝi havis liberan tempon, ŝi
akompanis la nepinon por pro-
meni ekster la domo. La familio
vivas harmonie kaj gaje. La
bofilino ofte diris: "Mia bopa-

tro estas akrevida, li havigis al
ni bonan patrinoŝan."'

NE ĈIO ESTAS GLATA

En la lastaj jaroj multiĝis
maljunuloj enskribitaj por svat-
iĝi, sed ne estis facile ĉiufoje
sukcesigi la aferon. Supre mi
prezentis nur la glatan aspekton.
Ekzistas ankaŭ malsukceso kaŭ-
zita de diversaj influoj. Pro sia
reedziĝo iu profesoro spertis
malagrablaĵon.

La 73-jara profesoro konatiĝis
kun dezirata maljuna virino. Ili
enamiĝis. Informiĝinte pri tio, la
filo malpaciĝis kun sia patro. Lia
bofilino sin turnis al la malju-
nulo kaj klaĉis al ŝi, ke la pro-
fesoro estas enfermiĝema, egois-
ma kaj mallaborema. La ama-
fero ĉesis, sed la famo kuris. La
profesoro povis fari nenion alian
krom larmi kun ĉagreno.

Estas nemalmultaj tiaj ekzem-
ploj, ke gefiloj malhelpas sian

patr(in)on reedz(in)iĝi. La kia-
loj kuŝas en multaj flankoj, ĉefe
en tio, ke iujn gefilojn influas
feŭdismaj moraloj kaj malnovaj
tradiciaj konceptoj. Ili opinias,
ke la reedz(in)iĝo de la patr(in)o
perdis al ili la vizaĝon. Aliaj
diras, ke maljunuloj ardaj en
amo estas malseriozaj kaj tio es-
tas hontinda afero. Tiuj antaŭ-
juĝoj kreskigas skrupulojn ĉe iuj
maljunuloj, ke ili ne kuraĝas
fari paŝon antaŭen kaj pasigas la
tempon nur en melankolio.

Laŭ kalkulo de la Ĉina Komi-
siono por Studo de Maljunulaj
Problemoj, post 40 jaroj Ĉinio
havas 280 milionojn da malju-
nuloj, t.e. ĉiu kvina ĉino estos
maljunulo. Nun kaj estonte la
nombro de la ĉinaj maljunuloj
okupas kaj okupos la unuan lo-
kon en la mondo. Tial la ĉiam
pli rimarkinda reedziĝa proble-
mo de maljunuloj vekas la aten-
ton de la socio. □

Muzeo de Antikvaj Sonoriloj en Pekino

Templo de Granda Sonorilo situas en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. Tiu antikva templo konstruita en 1733 antaŭe ne portis tiun nomon. Poste, la templo akiris grandan sonorilon de pli ol 500 jaroj, kaj pro tio la templo ekhavis la nunan nomon. La Muzeo de Antikvaj Sonoriloj estas establita en la templo.

Nun en la muzeo konserviĝas 160 diversaj antikvaj sonoriloj. Inter ili la plej granda altas je pli ol ses metroj kaj okupas sola tutan kampanilon, dum la plej malgranda estas nur pomo-granda. La ĉinoj ekhavis sonorilon en prahistoria epoko. Tiam prahomoj faris sonorilojn el bambuo, ligno kaj argilo. En eks-

ponejo de la muzeo estas du ŝoveliloformaj fajencaj sonoriloj en granda de pomo. Ili estis faritaj en la lasta periodo de la primitiva socio. Inter ekspoziciataj objektoj estas bronza cimbaleto, farita en Ŝang-dinastio (17-a — 11-a jc. a. K.) En la antikvaj ĉinaj literaturaĵoj estas diro “retiri trupojn laŭ sonorilfrapo”. Tio signifas ke oni ordonis retiriĝi per ĝia sono. Poste oni grupigis tri cimbalojn de malsamaj grandeco kaj tembro, tiele ĝi jam fariĝis muzikilo. En ludado unu homo povis frapi nur unu pecon, kio estis maloportuna. Poste oni reformis la cimbalon en gamosonorilon el 8-9 diversgrandaj sonoriloj pendantaj sur framo. Unu homo jam sufiĉas por ludi.

Ĉinaj arkeologoj plurfoje elterigis gamosonorilarojn de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (11-a jarcento a. K. — 771-a jaro a. K.) Tiam la sonoriloj estis vaste uzataj en kulta, pluvpeta, epidemiforiga, bankeda, pafrita kaj triumfa solenoj. En la meza periodo de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio kaj la postaj 500 jaroj sonoriloj estis pli grandaj kaj pli multaj kaj fariĝis simbolo de la aŭtoritateco de reganta klaso. La malsamrangaj regantoj havis malsamajn sonorilojn. Ekzemple por reĝo oni pendigis kvar sonorilojn respektive sur la muroj de la ĉambro, por regnestroj tri sonorilojn sur la muroj, por superaj oficistoj du sonorilojn kaj por malsuperaj oficistoj unu sonorilon.

La Muzeo de Antikvaj Sonoriloj en la Templo de Granda Sonorilo



En la muzeo eksponiĝas kopio de gamosonorilaro de la Periodo de Militantaj Regnoj el 14 pecoj, elterigita en Ŝinjang de Henan-provinco. Vizitantoj povas frapi ilin. En la muzeo estas ankaŭ modelo de alia gamosonorilaro. Ĝia prototipo konservata en la Hubej-provinca Muzeo estis elterigita en 1978 el tombo de la Periodo de Militantaj Regnoj (475—221 a. K.) en la gubernio Sujŝjan de Hubej-provinco. Ĝi el 65 pecoj estas la plej grandnombra kompleto, ĝis nun konata. Ĝi pendas sur trietaĝa framo el ligno kaj bronzo. La framo ortilforma longas 10 metrojn, altas 2.73 metrojn



Reprodukto de gamo-sonorilaro el 14 pecoj de la Periodo de Militantaj Regnoj

kaj estas subtenata de ses bronza militistoj kun glavo kaj kelkaj cilindraj kolonoj. Ĝi pezas je pli ol 3 500 kilogramoj. Mirinde estas ke ĉiu sonorilo surhavas sian tonsignon, inter ili 45 surhavas ne nur sian tonsignon, sed ankaŭ klarigon pri tempero. Ĉiu sonorilo povas eligi du sonojn. Laŭ analizo de la moderna muzika teorio la gamosonorilaro portas oktavon de C Maĵora kaj la totala sona amplekso enhavas kvin oktavojn. Kompare kun piano al ĝi mankas du oktavoj respektive ĉe ĝiaj ekstremoj. Ĝia centro entenas kompletan kromatan skalon. Ĝiaj bazaj kaj ĉefaj sonoj konsistis el kvin-tona, ses-tona kaj sep-tona


gamoj. Per ĝi oni povas ludi multajn belajn muzikojn ĉinajn kaj eksterlandajn.

Elegantaj budhisma kaj taoisma sonoriloj



En nia lando sonoriloj estas uzataj en diversaj aferoj. Sonoriloj, simbolantaj dignon de kortego, estis nomataj kortegaj sonoriloj. Aliaj por akompani dancon kaj kanton estis nomataj muzikaj sonoriloj. La triaj, uzataj en religia aktivado, estis nomataj budhismaj sonoriloj kaj taoismaj sonoriloj. La kvaraj por anonci horojn estis tempo-anoncaj sonoriloj. De la 14-a ĝis la 17-a jarcento, la sonorilo en la Pekina Kampanilo estis frapita 108 fojojn ĉe la sunsubiro kaj la trafiko en la tuta urbo estis malpermesita.

En la muzeo la Sonorilego Jongle honorata kiel "urba trezoro" estas la plej granda. Jongle estis nomo de erao de la Imperiestro Ĉengzu (de 1403 ĝis 1424 sur trono) de Ming-dinastio. Ĉar ĝi estis farita en tiu periodo Jongle, tial oni nomas ĝin la Sonorilego Jongle. Ĝi pezas 46.5 tunojn, altas 6.75 metrojn kun ekstera diametro de 3.3 metroj kaj la sonorilrando dika je 18.5 cm. Sur la ekstera kaj interna muroj de la sonorilo estas 17 budhismaj sutraj ĉapitroj en han-lingvo kaj sanskrito, sume 227 000 ideografiaĵoj. Ĝi estas la sonorilo kun plej multaj



La sonorilego Jongle

skribaĵoj en la mondo. Ĝia agrabla sono povas disvastiĝi 40 kilometrojn. En la meza periodo de Ming-dinastio oni prenis ĝin kiel amuleton por Pekino. Depost la 18-a jarcento la imperiestroj uzis ĝin por peti pluvon. En la lastaj jaroj oni ekuzis ĝin por bonvenigi novan jaron.

La Sonorilego Jongle estis

muldita per argila modlilo en kavo. Dekoj da fandformoj samtempe verŝis de diversaj flankoj fanditan bronzon en la modlilon. Tiamaniere oni faris ĝin unufoje. Imperiestro Jongle elektis la sutrojn por la sonorilo kun la celo fortigi sian regadon per budhismo, sed antaŭ naskiĝo de la sonorilo li mortis.

Transportado de la Granda Sonorilo estis tre malfacila en antikveco. En vintro oni fosis kanaleton sur la vojo traŭrota de la sonorilo kaj enverŝis akvon. Kiam la kanaleteto glaciĝis, oni transportis la sonorilon per tirbestoj. Atinginte la celokon, oni puŝis ĝin supren al la frostigita teramaso por pendigi ĝin al ligna trabo de la framo. Printempe oni forigis la teron sub la sonorilo kaj konstruis kampanilon. Tiam la sonorilo pendis en kampanilo.

La kampanilo estas ligna konstruaĵo kun kvadrata bazo, ronda korpo kaj pinta kapo. En ĝi spirala ŝtuparo kondukas al la supro, de kie oni povas vidi la sonorilan supron kaj trabon sur kiu pendas la sonorilo.

En orienta korto de la templo staras dekoj da metalaj sonoriloj de la 13-a jarcento ĝis la 19-a jarcento. Inter ili estas sonoriloj draka, feniksa kaj okcidentstilaj.

M. T. POPOV (Sovetunio):

KIO ESTAS OMNICIDO?

Sur diagramo prenita el la revuo Scienca Mondo estas desegnitaj cent dudek kvadratetoj, en kiuj troviĝas po 53 punktoj; en la centra kvadrateto — unu punkto. Tiu punkto sur la diagramo prezentas tri megatunojn da trinitrotolueno (T. N. T.) eksplodigita en bomboj, obusoj, minoj, torpedoj, grenadoj dum la jaroj de la Dua Mondmilito, en kiu pereis 50 milionoj da homoj. 6 360 punktoj en la 120 kvadratetoj prezentas en la sama skalo nunajn rezervojn de nuklea eksplodaĵo sur la Tero. Multiplike kinte la kvanton da punktoj per tri megatunoj, ni ricevas —

eksplodaĵon, kiu estas sur la planedo, ekvivalentas dek naŭ miliardojn da tunoj da T. N. T. Multiplike kinte la kvanton da punktoj per 50 milionoj, ni ekscias, ke per tiu eksplodaĵo eblas neniigi 300 miliardojn da homoj, tio estas 70 fojojn neniigi ĉiujn homojn sur la Tero. Ekfunkciigo de nur du procentoj de la nukleaj mortigiloj ĉesigus vivon de ĉiuj homoj sur nia planedo.

La homaro neniam staris antaŭ danĝero de totala perejo, tial por tia situacio en leksikonoj mankis adekvata vorto. Tute antaŭ nelonge aperis sinistra vorto "omnicido". Ĝi estas kunmetita

el du latinaj vortoj: omnis — ĉiu, ajna, kaj cido — mortigi. Omnicido tradukiĝas kiel "mortigo al ĉiuj".


En 1955 dek unu elstaraj sciencistoj (naŭ el ili Nobel-laŭreatoj) verkis kaj publikigis la Manifeston de la XX-a Jarcento (Einstein-Russel-Deklaracio), kiu severe avertis pri danĝero de omnicido: "Ni apelacias, kiel homaj estaĵoj, al homaj estaĵoj: memoru, ke vi estas homoj kaj forgesu la ceteron. Se vi povas fari tion, la vojo al la nova paradizo estas aperta; se vi ne povas, antaŭ vi troviĝas la risko de universala morto."

SILKA VOJO

de LAN ŜAN


En la dinastioj Han (206 a. K. — 220 p.K.) kaj Tang (618 — 907 p.K.) en Ĉinio malfermiĝis tervojo kondukanta de la tiama ĉefurbo Ĉang'an (la nuna Ŝjan, Ŝenŝji-provinco) al centra, suda kaj sudokcidenta Azio kaj Eŭropo. Ĝi ludis gravan rolon en amikaj rilatoj kaj komerca interŝanĝo inter diverslandaj popoloj. Tiutempe la ĉefa eksportaĵo de Ĉinio estis silkaĵoj. Pro tio la eŭropanoj nomis tiun vojon Silka Vojo.

Bredado de silkraŭpoj, kokonobonado kaj silkteksado estis granda invento de la laborantaj virinoj de la antikva Ĉinio. Legendo diras, ke la edzino Lejzu de Hŭangdi, komuna prapatro de la diversaj naciecoj en centra Ĉinio, trovis, ke raŭpoj sur morusarboj sekrecias silkojn molajn kaj longajn, el kiuj oni povas fari teksaĵon por sin ŝirmi kontraŭ malvarmo. Ŝi do ins-



- | | |
|-----------------|---------------------|
| 1. Dunhŭang | 11. Kaŝi |
| 2. Hami | 12. Loŭlan |
| 3. Barkol | 13. Ĵŭoĉjang |
| 4. Urumĉi | 14. Ĉiemo |
| 5. Ĝinghe | 15. Mingfeng |
| 6. Hŭoĉeng | 16. Ĵutjan |
| 7. Turpan | 17. Ĵutjan (Hetjan) |
| 8. Janĉji | 18. Piŝan |
| 9. Kuĉa (Gujzi) | 19. Ŝaĉe |
| 10. Aksu | |

La ruino de la antikva urbo Gjaŭhe en Turpan



truis aliajn bredi silkraŭpojn, bobeni kokonojn kaj teksis silkon por fari vestojn. Elterigitaj objektoj montras, ke jam antaŭ 4 000 jaroj Ĉinio faris silkajn fadenojn, silkajn zonojn kaj satenon. Post longa praktikado la ĉina silka produktado multe progresis ĉu en kvanto ĉu en kvalito, kio ebligis plejprosperon de silkeksportado en Tang-dinastio.

La helena historiisto Herodoto (484 — 425 a. K.) diris, ke

jam antaŭlonge la helenoj konis Ĉinion fama pro sia silkaĵo kaj komence de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno en la 6-a kaj 7-a jarcentoj a.K. iuj helenoj vojaĝis en la silka ĉefurbo. Romia verkisto admiris, ke kolorriĉa silkaĵo estas bela kiel kampa floro kaj delikata kiel araneaĵo, kaj nomis Ĉinion Serice, kiu signifas silkan landon. De Han-dinastio ĝis la 13-a jarcento, granda kvanto da supraj kaj belaj silkaĵoj estis transportita tra la Koridoro Okcidente de la Flava Rivero en Gansu-provinco, laŭ Kunlun- kaj Tjanŝan-montaroj, al la Okcidenta Regiono, t.e. lokoj okcidente de Dunhŭang, Gansu-provinco, sude kaj norde de Tjanŝan-montaro, centra Azio, la Irana Altebenaĵo, la Malgranda Azio kaj la orienta bordo de Mediteraneo. Tiu vojo tra Azio, kun longeco de pli ol

7 000 kilometroj, estis la plej longa antikva komerca vojo kunliganta Ĉinion kun okcidentaj landoj.

En Ĉinio troviĝis pluraj silkaj vojoj. Ekzemple, vojo kondukanta de Ĉang'an okcidenten laŭ Ŭejhe-rivero, tra Baŭĝji, al la Koridoro Okcidente de la Flava Rivero; kaj alia kondukanta de Ĉang'an okcidenten laŭ Ĝinghe-rivero, tra Ŝjaŭgŭan de Gujŭan-gubernio, Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, al Uvej-gubernio, Gansu-provinco. En la Ŝingĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono troviĝis sume tri vojoj irantaj okcidenten, kiuj estis ĉefaj vojoj tra Gansu kaj Pamiro en Ŝingĝjang al okcidentaj landoj. La ĉefan vojon konduktan okcidenten de Ĉang'an oni nomas Silka Vojo. Krome, Tubo-vojo kondukanta okcidenten de Ĉang'an tra Tubo (la nuna



Mogaŭ-ŝtonkavernaro en Dunhŭang

La ruino de predikejo de Ŝjŭanzang en la antikva urbo Gaŭĉang



Tibeta Aŭtonoma Regiono) al Hindio kaj Jongĉang-vojo kondukanta de Jongĉang-prefektujo (norde de la nuna Baŭŝan-gubernio, Junnan-provinco), al Hindio, Persio (la nuna Irano), Romio kaj aliaj lokoj, ambaŭ ludis grandan rolon en kontaktiĝo inter la antikva Ĉinio kaj okcidentaj landoj.

Al la malfermo de la Silka Vojo kontribuis diverslandaj popoloj en pluraj jarcentoj. Pro tio oni ĉiam tenas en sia memoro la senmortajn meritojn fari-tajn de la ĉina diplomato Ĝang Ĉjan antaŭ 2 000 jaroj. Tiam en la Okcidenta Regiono estis dekoj da regnoj grandaj kaj malgrandaj. Je la fino de Ĉindinastio kaj la komenco de Handinastio la hunoj konkeris la regionon kaj obstrukcis la vojon inter Ĉinio kaj la Okcidento. Post sia surtroniĝo imperiestro Udi (140 — 88 a.K.) de Handinastio decidis kunagi kun Da-



La ruino de la budha pagodo Moer ĉe Kaŝi

jueĝi por ataki la hunojn de ambaŭ flankoj. Ĝang Ĉjan sin proponis por la afero kaj, kun pli ol cent personoj sub sia gvido, ekiris de Ĉang'an en 138 a. K. por plenumi tiun danĝeran taskon. Tio estis la unua fojo en la ĉina historio por ekspedi senditojn al la Okcidenta Regiono por kontaktiĝo kaj esploro.

Post nelonge Ĝang estis kaptita de Ĉanju, monarko de hunoj, kaj malliberigita dek jarojn. Li estis devigita edziĝi al loka virino. Tamen li ne forgesis la mision de Han-dinastio. Finfine li fuĝis kun sia sekvanto kaj venis al Dajueĝi. Tie ili restis unu jaron kaj faris multajn esplorojn. Revenvoje ili estis denove kaptitaj de hunoj kaj enkarcerigitaj por pli ol unu jaro. Profitante internan konflikton inter hunoj, ili forkuris al Ĉang'an. Kiel sendito al la Okcidenta Regiono Ĝang Ĉjan pasigis 13 jarojn tie. Kun pli ol cent personoj li forlasis la ĉef-

urbon, sed revenis nur du inkluzive de li mem. Ĝang detale raportis sian spertaĵon al imperiestro Udi kaj proponis starigi amikajn rilatojn inter la landoj en la Okcidenta Regiono kaj Ĉinio.


Poste la armeo de Han-dinastio venkis la hunojn kaj trapasebligis la Koridoron Okcidente de la Flava Rivero. En 119 a. K. Ĝang gvidis 300 personojn por refoje iri al la Okcidenta Regiono, kun multaj silkaĵoj kaj aliaj valoraj donacoj. Atinginte la regnon Usun, Ĝang sendis sian asistanton al Irano, Afganio, Hindio kaj aliaj landoj, el kiuj multaj volis amikiĝi kun Ĉinio kaj iliaj senditoj venis kune kun Ĝang aŭ lia asistanto sinsekve al Ĉang'an. Ekde tiam ĉinaj kaj alilandaj senditoj kaj komercistoj iradis laŭ tiu Silka Vojo.

Ĉinio uzis la vojon por eksporti okcidenten siajn silkaĵojn, lakaĵojn, bambuaĵojn, latunaĵojn, feraĵojn, municion, oraĵojn, arĝentaĵojn, porcelana-

ĵojn, persikojn, pirojn kaj ankaŭ teknologiojn pri paperfarado, putofosado kaj akvoutiligo, kaj importi el la Okcidenta Regiono vinberojn, granatojn, juglandojn, sezamon, parfumon, drogojn, gemojn, vitron, eburojn, bonrasajn ĉevalojn, strutojn, leonojn, muzikon, dancon, pentraton kaj akrobatikon. Krome, ankaŭ astronomio, kalendaro, kristanismo, budhismo kaj islamo estis enkondukitaj en Ĉinion. Tia interrilato multe fortigis la amikecon inter diverslandaj popoloj, larĝigis ilian vidkampon, spicis ilian vivon kaj prosperigis iliajn landojn.

En la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.) Ban Ĉaŭ kiel sendito de Han-dinastio pasigis 31 jarojn en la Okcidenta Regiono. En sia aĝo de 71 jaroj li revenis al Ĉinio. Post Ĝang Ĉjan li estis la plej granda kontribuanto en la akcelo de amikiĝo inter Ĉinio kaj okcidentaj landoj kaj la defendo de la Silka Vojo. En Tang-dinastio la Silka Vojo fariĝis des pli vigla. En la 7-a jarcento la eminenta bonzo Ŝjüanzang de Tang-dinastio, riskante sian vivon, vojaĝis al Hindio. Li revenis kun pli ol 600 budhismaj verkoj. En la 13-a jarcento la 15-jara itala vojaĝisto Marko Polo ekiris de Venecio kaj venis laŭ la Silka Vojo al la ĉefurbo Dadu (la nuna Pekino) de Jüan-dinastio. Dum sia 17-jara restado li vojaĝis preskaŭ tra la tuta Ĉinio. "Vojaĝnotoj de Marko Polo" diktita de li estis laŭdita kiel la unua mirakla libro en la mondo. La Silka Vojo etendiĝanta okcidenten al Mediteraneo, tra kiu oni povas atingi Italion kaj Egiption, fariĝis amika vojo por ekonomia kaj kultura interŝanĝo inter la antikva Ĉinio kaj landoj de centra kaj okcidenta Azio, Eŭropo kaj Afriko. □

Ok sanigaj ekzercoj (VII)



Frotu la manojn ĝis varmiĝo kaj per ili premu la kavojn je 11-12 cm. ambaŭflanke de la dorna punkto de la 3-a lumba vertebro. Post momento forte frotu malsupren ĝis la akupunktura punkto *čangčjang* ĉe la lasta

vertebro. Frotu supren ĝis la punkto, kien la brako povas atingi. Frotu sume 30 fojojn. (Vidu la bildon 20)

Vi povas ankaŭ pugnigi la manojn ne forte. Masaĝu aŭ frapetu la kavojn per la dikfingra aŭ dorsa flanko de la pugnoj. Vi povas pinĉi aŭ knedi la lumbon tiom da fojoj, kiom laŭ via plaĉo. Simultana turnado de la lumbo faras la efikon pli bona.

Masaĝo de la lumbo povas dilati la kapilarojn sennombrajn en parto de haŭto, akceli sango-cirkuladon, plibonigi nutran provizon, stimuli ekskreciadan, eksciti la periferiajn sensorajn nervojn kaj estigi mildan eksciton al la nerva sistemo, tiel ke ĝi estas utila por resanigi malsanajn histojn, levi la psoasan kapa-

blon kaj ĝian eltenpovon, preventi la psoasan atrofion. Ĝi povas preventi kaj kuraci funkcion lumbalgion kaj estas bonefika precipe por kuraci kronikan psoasan difektiĝon, akutan lumban tordiĝon. Ĝi estas iom bonefika ankaŭ por kuraci la protrudecon de intervertebra disko, iskiatalgion kaj utila por preventi kaj kuraci polucion, tro fruan ejakulon, impotenton, dismenoreon, amenoreon k.a.

Atentu, la lumbofrotado estas malutila por la suferantoj de organika lumbalgio, kaŭzita de tuberkulozo, ŝveliĝo, frakturo aŭ bakteria kontaĝo kaj povas devastigi la tuberkulozon, ŝveliĝon kaj inflamon, gravigi la ostrompiĝon, difekti nervojn kaj tiel kaŭzi malbonan rezulton. □

(Daŭrigota)

AMUZO

Humuraĵoj

I. VIRSEKSA KAJ INSEKSA

“Ĉu vi kredas, ke inter la dek muŝoj ĵus de mi mortigitaj estas kvar masklaj kaj ses femalaj?”

“Ne. Kiel vi povas distingi la masklajn disde la ineksaj?”

“Simple. La virseksajn mi kaptis ĉe vintaso kaj ineksajn sur spegulo.”

II. PLUVOŜATANTO

“Ju pli forte pluvas, des pli mi ĝojas.”

“Vi do certe estas optimisto.”

“Ne. Mi estas vendisto de pluvombrelo.”

Etaj Sciencaj Magiaĵoj

I. KRETO BRULAS

Preparo: Solvu iom da bora acido en alkoholo kaj trempu kreton en la solvaĵo.

Prezentado: Ludanto bruligas la trempitan kreton. Jen ĝi tuj ekbrulas kaj eligas belan flamon.

II. KAMFORAJ GLOBETOJ DANCAS

Materialoj: Unu senkolora kaj travidebla botelo kun granda

aperturo aŭ laboratoria glaso, natria bikarbonato kaj kristala pulvoro de citra acido (po unu kulero) kaj kelkaj kamforaj globetoj.

Prezentado: Ludanto verŝas akvon en la botelon kun la du supre menciitaj kemiaĵoj kaj poste enmetas la kamforajn globetojn. Jen la globetoj ekdancas. Principo: La pulvoro de natria bikarbonato kaj citra acido sin neŭtrigas, kio kaŭzas turniĝadon de la akvo. Plie, la specifa pezo de kamforaj globetoj estas iom pli granda ol tiu de akvo, tial ili dancas kun turniĝado de la akvo. □

Loĝantaro kaj perspektivo de urboj

Antaŭ nelonge la Fonduso por Loĝantara Aktivado de UNO okazigis en Barcelono de Hispanio internacian kunvenon pri loĝantaro kaj perspektivo de urboj.

Invitite ĉeestis la kunvenon reprezentantoj de 48 urboj de 29 landoj. Ili varme diskutis pri "loĝantaro kaj perspektivo de urboj". Laŭ la takso de koncerna organizo de UNO, en la jaro 2005 vivos en la urboj pli ol 50% de la tutmondaj loĝantoj. La disvolviĝo de la estontaj urboj decidus la kvaliton de la vivnivelo de la sekvanta generacio: La homaro aŭ havos pli komfortan medion aŭ suferos plagojn. Por tio la koncerna organizo de UNO faris takson al la urboj, kiuj havos almenaŭ 4 milionojn da loĝantoj en la jaro 2000, kaj okazigis la kunvenon surbaze de tio.

"URBIGA" EVOLUO EN LA MONDO

Kiaj problemoj aperis en la urbigo en diversaj landoj kaj kiel oni rigardis kaj traktis ilin? Antaŭ ol paroli pri tiuj problemoj, oni devas koni, kio estas "urbigo", kaj kiajn pozicion kaj rolon la urboj havas en la nuna socio. Frue en miloj da jaroj an-

taŭ Kristo jam aperis la plej frua rudimento de urbo en la naskiĝlokoj de antikva civilizacio. En la 7-a kaj 8-a jarcentoj, la prospera periodo de Tang-dinastio de Ĉinio, Ĉang'an (ĉe la nuna Ŝĵian) jam estis la unua urbo havanta milionon da loĝantoj en la tiama mondo. En la 19-a jarcento aperis multe da novaj industriaj urboj kun la leviĝo de la industria revolucio kaj la rapida disvolviĝo de la kapitalisma ekonomio, rapide grandiĝis la procentaĵo de la urbaj loĝantoj en la totala loĝantaro de la mondo. Post la Dua Mondmilito pli prospere disvolviĝis la mondskala urbigo. En 1983 la urbaj loĝantoj de la mondo konsistigis 39% de la totala loĝantaro, interalie tiuj de evoluintaj landoj konsistigis 70% de la totala nombro de iliaj loĝantaroj kaj tiuj de evoluantaj landoj 29%. La vorto "urbigo" ĝeneraligis la fenomenon de rapida disvolviĝo de urboj. Urbo estas sinteza produktaĵo de la socia, ekonomia kaj kultura disvolviĝo de la homaro. Ĝia stato ofte markas la nivelon de politiko, ekonomio, kulturo kaj scienc-tekniko en koncerna lando. Tial multaj landoj metas la perspektivan projekton de urba disvolviĝo en strategian pozicion.

"SINDROMO" DE LOĜANTARA EKSPANSIO EN LA EVOLUANTAJ LANDOJ

La disvolviĝo kaj prospero de urboj akcelis la disvolviĝon de la monda ekonomio, samtempe aperis serio da problemoj kaŭzitaj de multaj malakordoj en la urba disvolviĝo. Kiel bone solvi la problemojn pri trafiko, elektro- kaj akvoprovizo, loĝdomoj, enoficigo kaj aliaj estas problemoj komune alfrontata de la evoluantaj landoj, kaj ankaŭ same por la evoluintaj landoj. Sed la evoluantaj landoj alfrontas troan ekspansion de urba loĝantaro kaŭzitan de grandkvanta enurbigo de kamparaj loĝantoj kaj alta naskiĝprocento, kaj la evoluintaj landoj alfrontas urbo-malplenan problemon pro translokiĝo de urbaj loĝantoj al ĉirkaŭurbo.

Hodiaŭ la blinda koncentriĝo de loĝantoj al urboj en la evoluantaj landoj kaŭzis malbonajn loĝkondiĉojn, malfacilan trafikon, median polucion, nesufiĉan provizon de akvo kaj elektro, seriozan senlaborecon kaj aliajn problemojn. Tio estas "sindromo". Nun multaj evoluantaj landoj donas grandan atenton al limigo de urba loĝantaro, aziaj

landoj plimulte praktikas naskolimigon. Multaj landoj aplikis metodojn por reformi urbon. Ekz., Singapuro konstruis ekster urbo industriajn kvartalojn, novajn urbetojn aŭ satelitajn urbojn, Filipinoj, Indonezio kaj aliaj landoj alprenis planon rekonstrui urbon kvartalon post kvartalo.



Unu el la trefkruciĝoj de Pekino

“URBA MALPLENO” DE EVOLUINTAJ LANDOJ

Por la evoluintaj landoj ne estas la problemo pri naskolimigo, ĉar tie la naskiĝprocento estas tro malalta, aperis eĉ nula aŭ negativa kresko. Krome, riĉuloj kaj junuloj en tiuj landoj unuj post aliaj transloĝiĝis al kvieta ĉirkaŭurbo por eviti urban polucion, kaj tiel restas en la urboj plejparte maljunuloj kaj malriĉuloj. Iuj urboj ne kapablas reformi siajn malnovajn kvartalojn pro nesufiĉa impostado, tial la urbocentro kun malnovaj kvartaloj deprimiĝis. Iuj urboj de FR Germanio dimanĉe estas malplenaj, hazarde vidiĝas kelkaj maljunuloj solece promenantaj surstrate. En la okcidenta Berlino la magistrato aktive kulturigas gazonojn kaj konstruas loĝdomojn por allogi homojn kun alta enspezo loĝantajn en ĉirkaŭurbo. Ankaŭ tiel stas Baltimoro de Usono, en ĝia centro estas nombro da bonkvalitaj loĝdomoj neokupataj, la magistrato vendas ilin po unu dolaro por ĉiu kvadrata metro. Aĉetinte domon, oni devas ripari ĝin kaj pagi imposton laŭ la difinoj.

LA NUNA STATO KAJ PERSPEKTIVO DE ĈINAJ URBOJ

Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, aperis aro da novaj urboj. En 1984 la urbaj loĝantoj de Ĉinio proksimiĝis al

200 milionoj, kiuj konsistigis ĉ. 20% de la tutlanda loĝantaro, je la fino de la kuranta jarcento la nombro de la loĝantoj de la urboj atingos 400 milionojn laŭtakse, kiuj konsistigos 33% de la tutlanda loĝantaro. Ĉinio nun prenas kiel siajn ĉefajn laborobjektojn tiujn urbojn, kies loĝantaro nombras pli ol milionon da homoj. Unue, oni devas racie aranĝi produktan forton, redukti la kreskon de enloĝiĝantaj loĝantoj, plenforte disvolvi la terciaran industrion, perfektigi la urbajn funkciojn, konstrui satelitajn urbetojn k.a. Due, oni devas aktive akceli la disvolviĝon de mezgrandaj kaj malgrandaj urboj, precipe tiun de urbetoj kun malpli ol centmil loĝantoj. Tiaj urbetoj estas ligiloj de ekonomia interŝanĝo inter la urboj kaj vilaĝoj, ili estas multnombraj kaj havas grandan eventualecon ekspluatablan en ekonomia disvolviĝo, tial ili ludos sufiĉe grandan rolon en la estonta urba disvolviĝo. Trie, unu el la radikalaj vojoj por mildigi la troan ekspansion de urba loĝantaro estas aktive disvolvi la kamparan ekonomion, kuraĝigi kamparanojn administri entreprenojn ĉeloke por ke ili ne forlasu la hejmlokon forlasinte kamplaboron, kaj ne eniru urbon enirinte fabrikojn. Kvare, oni devas plifortigi laŭplanan konstruadon en urboj kaj plibon-

nigi vivmedion; kaj altigi la nivelon de modernigo. Kvine, oni devas praktiki naskolimigon kaj altigi kvaliton de la loĝantaro.

KREI RACIAN VIVMEDION

En la diskutado la reprezentantoj el diverslandaj urboj ĝenerale opiniis ke nun en la tuta mondo mankas sufiĉa kono pri strategia pozicio de urba konstruado en la ŝtata disvolviĝo kaj malproksim-vida konsidero. Iuj urbetoj opiniis, ke urboj nun uzis tro malmultan sumon por fundamenta konstruado. Laŭ ilia opinio almenaŭ 50% de la loka financo devas esti uzataj en la fundamenta konstruado de urbo. Nur tio povas adapti la urban fundamentan konstruadon al la senĉese kreskanta socia bezono. En la fino de la kunveno diverslandaj reprezentantoj unuanime opiniis, ke la disvolviĝo de modernaj urboj provokis al la homaro en urbo-konstruado. Kaj la diversaj kontraŭdiroj aperintaj en urbaj konstruado kaj administrado fakte estas zigzagaj montriĝoj de la produktado kaj vivo — la fundamenta problemo de la homa socio. Tial en la estonta socio, oni povos krei por si mem komfortan kaj racian vivmedion, nur se ili pli efike kunordigos la rilatojn inter la ekonomia disvolviĝo, loĝantara stato kaj urba konstruado. □

MEMORE AL LA 120-JARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE DR. SUN JATSEN

Antaŭtagmeze de la 12-a de novembro 1986, pli ol 10 000 personoj, inkluzive de gvidantoj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ŝtato, samlandanoj el Taj'ŭan, Hongkong kaj aliaj mondpartoj kaj eksterlandaj gastoj partoprenis en la solena kunveno, kiu okazis en la Popola Halo de Pekino, memore al la 120-jara datreveno de la naskiĝo de Dr. Sun Jatsen, granda pioniro de la ĉina demokratia revolucio.

La kunvenon ĉeestis Hu Jaŭ-bang, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Peng Ĝen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, Deng Jingĉaŭ, prezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kaj aliaj gvidantoj.

Peng Ĝen faris longan paroladon en la kunveno. Li laŭdis, ke Dr. Sun Jatsen, granda nacia heroo, granda patrioto kaj granda pioniro de la ĉina demokratia revolucio, decideme batalis por la sendependeco kaj libereco de la ĉina nacio dum sia tuta vivo. Per tio li malfermis novan eraon en la ĉina historio.

Tiutage po unu bronza statuoj de Dr. Sun Jatsen estis starigita en Ĝongŝan-parko de Pekino kaj tiu de Ŝenjjang (Ĝongŝan estis alia nomo de Sun Jatsen).

Ĉinio faris dokumentan, rakontan kaj televidan filmojn pri la revoluciaj faroj de Sun Jatsen.

En la memorfestoj diversondaj personoj de Ŝanhajo kaj Ĝuangdong-provinco kun respekto rigardis respektive liajn malnovajn loĝejojn tieajn. Popolanoj en la provincoj Ĝuangdong, Ŝanŝji kaj Hubej kaj Ŝanhajo, Hongkong kaj Aŭmen kunvenis memore al Dr. Sun Jatsen.

Sur la podio de la solena kunveno memore al la 120-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Sun Jatsen



Ankaŭ en Taj'ŭan-provinco oni okazigis samcele kunvenon, raporton kaj ekspozicion de fotoj pri liaj faroj, de lia literaturo kaj la de li uzitaj objektoj.

DENSA NAFTO DE ĈINIO EN GRANDA EKSPLUATADO

Ĉinio faras grandan ekspluatadon de densa oleo, grava riĉfonto de nafto. Ĝi estas nemalhavebla por ekstrakti bonkvalitajn asfaltan, ole-lakon, izolajn kaj kemi-industrian produktaĵojn. Tamen, ĝi kun granda proporcio kaj glueco de oleo estas malfacile ekspluatebla per ordinaj metodoj, kio estis teknike malfacila problemo nesolvita dum longa tempo en nafta ekspluatado en- kaj eksterlande.

En la pasintaj jaroj ĉinaj sciencistoj pri nafto elpensis kompletan da tekniko de termodinamika ekspluatado de densa nafto. La nova teknologio jam estas uzata en la olekampoj de Ŝingĵang, Ljaŭhe kaj Ŝengli. Dank' al ĝi oni povas ekspluati densan nafton el oleputo profunda pli ol 1 200 metrojn. Antaŭ 1985 pli ol miliono da tunoj da densa nafto estis ekspluatita. En 1986 la ekspluat-kvanto atingis tri milionojn da tunoj, kaj en 1990 ĝi espereble atingos dek milionojn da tunoj.

12 800 AVIADILOJ PRODUKTITAJ DE ĈINIO

En la pasintaj pli ol 30 jaroj Ĉinio produktis 12 800 diversitajn aviadilojn kaj per tio ekhavis kompare kompletan sistemon de aernaŭtika industrio, scienc-esplorado kaj edukado de Ĉinio. La Ĉina Spacnaŭtika Departemento vendis al 11 landoj 359 aviadilojn. 619 motorojn kaj aliajn aernaŭtikajn produktaĵojn.

5 000 KM. POMARBA ZONO EN ĈINIO

La 5 000-kilometra Pomarba Zono, kiu etendiĝas laŭ la kampŝirma forsto de nordorienta, norda

kaj nordokcidenta Ĉinio, havas rudimentan formon en la regiono inter 34°-41° N de Ĉinio.

La zono komenciĝas de Ljaŭ-dong-duoninsulo oriente, irante tra la provincoj Ljaŭning, Hebej, Ŝandong, Henan, Ŝanŝji, Ŝenŝji kaj Gansu, la municipoj Pekino kaj Tjanĝin, kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, kaj finiĝas okcidente ĉe la koridoro okcidente de la Flava Rivero. Tie la pom-ĝardeno pli-grandiĝas ĉiujare je 30 000 hektaroj. Nun ĝia totala areo atingis 800 000 hektarojn. En 1986 oni rikoltis tri milionojn da tunoj da pomoj, kiuj konsistigis 4% de la totala produktokvanto de pomoj de Ĉinio.

RAPIDA KONSTRUADO DE LOĜDOMOJ EN LA ĈINA KAMPARO

La konstruado de loĝdomoj en la ĉina kamparo iras rapide kaj disvolviĝas grandskale.

En la sep jaroj post 1979 la areo de la novaj loĝdomoj en la ĉina kamparo atingis 4.26 miliardojn da kvadrataj metroj, kiuj multe superis tiun en la 30 jaroj antaŭ 1979. Nun en Ĉinio ĉiu kamparano meznombro okupas loĝareon de 17.8 kvadrataj metroj.

ĈINIO — NOVA GRAVA PRODUKTOLANDO DE BRAKHORLOĜOJ

Ĉinio jam enviciĝis inter la gravaj produktolandoj de brakhorloĝoj en la mondo, ĉiu kun jara produktokvanto de pli ol 50 milionoj da brakhorloĝoj. Ĉinio produktas 4.7 milionojn da brakhorloĝoj pomonate, kiuj superis la totalan produktokvanton de la blankhorloĝoj produktitaj en sinsekvaj jaroj antaŭ 1965.

Ia ĉina industrio de brakhorloĝoj aperis meze de la 50-aj jaroj kaj postiĝis je ĉ. duonjarcento, kompare kun la tiamaj gravaj produktolandoj de brakhorloĝoj en la mondo. Nun en Ĉinio estas 40 entreprenoj de brakhorloĝoj. En

1985 la produktokvanto atingis 54.31 milionojn da brakhorloĝoj. Kaj en la unuaj dek monatoj pasintjare la produktokvanto kreskis grande, kompare kun la sama periodo de 1985.

SURAKVA KAMPO EN TAJHU-LAGO

La unua surakva kampo de Ĉinio aperis en Tajhu-lago, Ĝjangsu-provinco. Verdaj akva spinaco, lufoj kaj sojfaboj estas rikoltotaj. Tio estas miraklo farita de ĉinaj scienc-esplorantoj, kiuj kulturis surterajn plantojn sur Tajhu-lago sen uzi teron.

La produktokosto por tia kulturado estas kvankam iom pli alta ol tiu por kulturigi grenplantojn surtere, tamen ĝi estas multe pli malalta ol tiu por kreskigi plantojn en fabrika kultivejo sen uzi teron. Tia kulturado estas simpla kaj facile disvastigebla. Estas rigardata kiel nova vojo la ekspluatado de akvosurfaco per tiu metodo en la meza kaj malsupra baseno de Jangzi-rivero de Ĉinio por konstrui sur ĝi paŝtejon, legomĝardenon kaj frukto-ĝardenon.

MONDE AVANGARDA TEKNIKO DE ALTRAPIDA KEMI-ANALIZO DE ĈINIO


La nova tekniko de altrapida kemi-analizo, kreita ekskluzive de Ĉinio en la komenco de la 60-aj jaroj, donis frukton kaj akiris rimarkindan ekonomian efikon en ekspluatado, aplikado kaj esplorado en la lastaj jaroj.

La altrapida analizo estas nova tekniko, per kiu oni observas kaj

esploras la tutan procezon de kemi-analizo el koncepto pri sekundo. Ĝi pli taŭgas ol rapidanaliza tekniko por analizi produktajn specimenojn kaj ekzameni la kvaliton de produktaĵoj po-grande kaj altrapide en la moderna industrio. La nova tekniko estas alte taksata de en- kaj eksterlandaj analiz-kemiistoj pro siaj altrapideco, ĝusteco, simpleco kaj prezo-favoreco. En la lastaj jaroj la bezono de la ekonomia konstruado akcelis la teorion esploradon kaj aplikatan ekspluatadon de tiu tekniko. La sukcesoj de Ĉinio tiurilate estas avangardaj internacie en studado pri la analoga kemi-analiza metodo.

La tekniko estas sukcese aplikata en fandado de fero kaj ŝtalo, fera aloj kaj nefera metalo, traktado de surfaco de metalaj materialoj, galvanizado kaj gas-analizado de metalaj materialoj. Metalurgia konvertoro bezonas nur 25 minutojn por fandi unu fornon da ŝtalo. Sed en la pasinteco necesis 20-30 minutoj por analizi specimenon. Ofte okazis, ke nekvalifikita produktaĵo elforniĝis, kiam venis la analiza rezulto. Dank' al aplikado de la nova tekniko, oni bezonas nur pli ol 30 sekundojn por ĝuste analizi la konsiston de specimeno kaj fundamente eliminis nekvalifikitan produktaĵon. Laŭ statistiko, aplikante tiun teknikon, ĉ. 12 000 entreprenoj de metalurgio kaj maŝinoj en Ĉinio pliiĝis la enspezon je miliardo da jŭanoj ĉiujare en reduktado de fand-tempo kaj ŝparo de energio. Intensigo de esplorado pri la teorio de altra-

La Ĉina Fairo de Horloĝoj en Pekino



pida kemi-analizo kaj disvastigo de uzado de komputa tekniko cer-tagrade akcelis provfaradon de aŭtomataj ekipaĵoj de altrapida analizo.

TEKNIKA INTERŜANGO INTER ĈINIO KAJ EVOLUANTAJ LANDOJ

En la pasintaj pli ol 30 jaroj Ĉinio starigis duflankan rilaton de teknika kunlaboro kun 80 evoluantaj landoj kaj tien sendis ĉ. 400 000 inĝenierojn kaj teknikistojn. Krome, ĝi trejnigis 35 000 teknikistojn kaj 3 000 studentojn por ĉ. 70 landoj.

Ekde 1963 Ĉinio sendis al 40 landoj kaj regionoj medicinajn taĉmentojn kun 8 000 homfojoj. Ili kuracis 70 milionojn da malsanuloj kaj kulturis por la helpataj landoj 10 milionojn da elementaj kaj mezgradaj kuracistoj. De 1979 ĝis la fino de aprilo de 1986 Ĉinio subskribis kun 88 landoj kaj regionoj 3 000 kontraktojn pri konstruo kaj laboro kaj sendis alilanden pli ol 170 000 laborulojn. Krome, kunlabore kun la Ekspluata Programo de UN Ĉinio fondis interregionan esplor-kulturan centron por kulturaj fakuloj por evoluantaj landoj kaj fari interregionan scienc-esploradon kaj informan interŝanĝon. Samtempe Ĉinio monhelpas koncernajn fakojn de UN kaj okupiĝas pri teknika kunlaboro per la speciala mono de UN por helpi Ĉinion, duflanka monhelpo kaj mono asignita el la ŝtata financo. Ĉinio sendas instruistojn eksterlanden kaj tie funkciigas teknikan lernejon laŭ kontrakto, tiamaniere ĝi kulturis por la helpataj landoj lokajn teknikistojn.

PLI OL 2 000 KVADRATAJ METROJ DA DETRUITAJ FRESKOJ RIPARITAJ

Fakuloj de la Oficejo por Protekti Historiajn Restaĵojn sub Dunhŭang-instituto faris esploran eksperimentadon kaj riparigis multajn detruitajn freskojn.

La freskoj en Mogaŭ-ŝtonkavernaro de Dunhŭang, Gansu-provinco, havas historion de 1 000 jaroj. La freskoj en 251 ŝtonkavernoj kun areo de 4 200 kvadrataj metroj (9.4% de la totala nombro de la freskoj) estas iagrade detruitaj de vento, pluvo, sunfrapo, sablatako kaj tertremo. Iuj el ili granda aree detruigis de rokmuroj, aliaj kreviĝis kun levitaj skvamoformaj pecoj. Nun la instituto jam riparigis pli ol 2 000 kvadratajn metrojn da detruitaj freskoj. Ili ne plu senkoloriĝis kaj kreviĝis.

EN ĈINIO NE ESTAS ALS-O

Lastatempe respondeculo de la higiena departemento de Ĉinio diris al eksterlandaj raportistoj, ke ĝis nun en Ĉinio ne okazis ALS-o (Amiotrofia Latera Sklerozo). Oni diris, ke ĝi okazis iam en Ŝanhajo. Tiu diro estas senbaza, ĉar la suferanto estis eksterlandano kaj la malsano trafis lin antaŭ ol li venis al Ĉinio. En Ŝanhajo oni trovis post ekzameno, ke li suferas de la malsano. Ĉinio malkovris kvar el la suferantoj de sang-malsano, kiuj uzas usonajn sang-produktaĵojn kaj havas pozitivan antikorpon de la viruso de ALS-o, sed tio ne signifas, ke ili estas portantoj de la viruso de ALS-o.

Li montris, ke laŭ statistiko de morbokvanto farita de aliaj landoj, estas granda ebleco, ke ALS-o atakos ĉinojn en 2000. Por protekti la sanon de sia popolo kaj preventi la malsanon Ĉinio starigis grupon por preventi ALS-on.

Li prezentis ankaŭ niajn ĉefajn rimedojn por preventi la malsanon.

NOVA MONDA REKORDO DE PARAŜUTADO APROBITA

La Ĉina Paraŝuta Teamo el pekinaj sportistoj Ŭang Jongli, Ĉen Li, Han Jiĉjang kaj Ĝang Lin kreis la plej bonan sukceson de la kvar-paraŝuta rotacio kun 22 formacioj de la mondo en la Unua Monda Paraŝuta Ĉampionea Konkurso, kiu okazis la 26-an de la

lasta septembro en Brisbano de Aŭstralio. Tiu sukceso estas aprobita de la Internacia Aernaŭtika Federacio kiel nova monda rekordo.

La konkurso pri la kvar-paraŝuta rotacio postulas, ke la kvar sportistoj de ĉiu teamo faru formaciojn rotacie en la difinitaj tri minutoj post ekparaŝutado. Kiu faras plej multe da formacioj, estas venkinto. En la konkursoj de la kvina, sesa kaj sepa rondoj de la kvar-paraŝuta rotacio la ĉinaj sportistoj dufoje faris 22 formaciojn kaj unufoje 21 formaciojn kaj per tio rompis la mondan rekordon de 20 formacioj kreitan de usonaj paraŝutistoj en la lasta junio kaj gajnis la ĉampionecon per 148 poentoj.

ĈINO — MONDA ĈAMPIONO DE ŜIRLEVO

La 8-an de novembro, 1986, ĉina halterlevisto He Jingĉjang per ŝirlevo de 127.5 kg. gajnis la ĉampionecon de la kategorio 56 kg. en la 40-a Monda Halterleva Ĉampionea Konkurso, kiu okazis en Sofio, Bulgario.

201 halterlevistoj el 44 landoj kaj regionoj partoprenis en la konkursoj de 10 kategorioj de la ĉampionea konkurso.

ĈINAJ SPORTISTINOJ EN LA SESA MONDPOKALA VOLAN- LUDA KONKURSO

En la finalo de la virina solludo de Sesa Mondpokala Volanluda Konkurso ĉina sportistino Li Lingĉej venkis Han Ajping per 11:8 kaj 11:3 kaj gajnis la ĉampionecon. Han Ajping gajnis la subĉampionecon.

Tio estis sinsekve la tria fojo, ke Li Lingĉej gajnis ĉampionecon en tia volanluda konkurso.

En la samtaga finalo de la virina parludo Li Lingĉej kaj Han Ajping venkis Rosiana Tendean kaj Imelda Kurniawan de Indonezio per duobla 15:7 kaj gajnis la ĉampionecon □

BELA KANASI

Teksto de **NI SJŬEGJAN**

La rezervejo Kanasi kun areo de 5 588 kvadrataj kilometroj, situanta sude de la meza parto de Altaj-montaro en Ŝinĝjang, estas la sola loko de Ĉinio por la sud-siberia flaŭro. Kun bela pejzaĝo, abundaj riĉfontoj kaj kompleta ekologia sistemo ĝi havas valorojn en scienc-esplorado kaj ekonomio. Tie estas ĉ.

1 000 specoj de vegetaloj, kun imponaj siberiaj larikoj, prosperaj ruĝaj pinoj kaj belaj abioj kiel la ĉefaj, kiuj aspektas kiel verda maro. Tie vivas ankaŭ sovaĝaj bestoj, kiaj ruĝaj cervoj, neĝleopardoj, brunaj ursoj kaj perdrikoj ĉefe protektataj de la ŝtato.

En la mezo de la arbaro kuŝas la fama Kanasi-lago 20 km. longa kaj 1 374 metrojn alta super la marnivelo, en formo de lento. La koloro de ĝia akvo varias en malsamaj tempoj kaj en malsamaj tagoj. Ĝi aspektas malhele verda en nuba tago, lakt-blanka en serena tago, blua en mateno kaj ruĝa en vespero.

La plej mirinda estas granda ruĝa fiŝo en la lago. Tia fiŝo kun pezo de ĉ. 30 kg. kaj longeco de 15 m. povas engluti sovaĝan anason. Ĝi faras la lagon iom mistera.

Kanasi ravas la turistojn precipe en printempo kaj aŭtuno. En printempo ĉie sur la montoj bunte kreskas kartamoj, tropeoloj, tulipoj kaj delfinioj. Ili kunfandiĝas kun la blua ĉielo, blanka nubaro, kun neĝpintoj, akvo kaj arbaro kaj prezentas ĉarman bildon. En aŭtuno flaviĝas betularo, ruĝpinaro, montaro kaj herbaro, kiuj kondukas vizitantojn kvazaŭ en oran fabelan mondon.

Kanasi-lago

Foto de **SU MAŬCUN**






Tropeoloj

Foto de **ĜANG LANŜUJ**

Parto de la rezervejo Kanasi

Foto de **LI JUDE**





Kanasi-rivero

Foto de **LI JUDE**






En aŭtuno

Foto de **ŜEN ĈEN**



POŝTMARKOJ PRI ANTIKVAJ MONEROJ




de SUN HOŬ



Antaŭ 3 000 jaroj en Ŝang-dinastio de Ĉinio cirkulis bronzaj moneroj. Ĉi tie la poŝtmarkoj kun antikvaj moneroj kiel la enhavo estas projektitaj laŭ elterigitaj moneroj faritaj antaŭ la Periodo de Militantaj Regnoj (475—221 a.K.), inter

kiuj troviĝas konka monero de Ŝang-dinastio (1711—1066 a.K.), monero en formo de kava ornamaĵo de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770—476 a.K.) kaj monero en formo de glavo kun desegnoj kaj monero en formo de cirklo kun trueto de la Periodo de Militantaj Regnoj. Ili havas sur si ne nur indikitajn lokojn de farado, sed ankaŭ diversajn formojn, kiuj tiu de konko, tiu de tranĉilo kaj tiu de ŝovelilo. El tio evidentiĝas, ke siatempe Ĉinio havis sufiĉe prosperan komercaĵan ekonomion kaj altan teknikon de fandado.

La du poŝtmarko-serioj pri ĉinaj antikvaj moneroj havas sume 16 pecojn kaj estis emisiitaj en 1981 kaj 1982 respektive.



Impona fonto de Jangzi-rivero

Teksto de ĈIU HUANSING

Fotoj de JU SUJĈU

Nia vojaĝo komenciĝis per esploro pri la fonto de Jangzi-rivero.

En somero ni ekveturis de Pekino per pasaĝera aviadilo kaj venis al Ŝjining, la ĉefurbo de Ĉinghaj-provinco. Post necesa preparo kaj korpo-ekzameno ni trajne veturis okcidenten. Ni preterpasis Ĉinghaj-lagon, la plej grandan landinternan lagon de Ĉinio, Ĉajdam-basenon konatan kiel "trezora pelvo", kaj fine atingis la novan industriaran urbon Golmud, kie estis paŝtejo en la 50-aj jaroj. Nun ĝi estas trafika nodo, kiu interligas per oportunaj ŝoseoj kaj fervojoj la provincojn Ĉinghaj kaj Gansu kaj la aŭtonomajn regionojn Ŝingĝang kaj Tibeto. Kaj la trafikitineroj tra la urbo estas

allogaj al la en- kaj eksterlandaj turistoj.

SURVOJE AL LA FONTO

Kvar tagojn poste, ni ekveturis al la riverfonto laŭ la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo.

Nia aŭto estis transveturanta Kunlun-montaron 4 700 metrojn super la marnivelo. Ĝi estas longa 2 500 km. de oriente okcidenten kaj la plej granda en Ĉinio. La fenestro de la aŭto enkadrigis belan vidaĵon: Ondas montoj kun neĝkovritaj pintoj, inter kiuj punktiĝas herbejoj kaj spegule brilas lagoj. Kiam ni supreniris la monton, maŝivoj da plumbaj nuboj subite aperis sur la serena ĉielo. Post momento torento de hajlo frapegis la tegmenton de la aŭto. Kaj tion sekvis densaj neĝflokaj.


Ni venis al la Kvin-kresta Monto 4 200 metrojn alta. Ĝi portas la nomon pro tio, ke la monto havas kvin kontinuajn krestojn. Pro la speciala tereno la tiea klimato estas malbonega. Tie cirkulas onidiro: "La Kvin-kresta Monto vere estas infero, tie ajna malsano povas kaŭzi morton." Ripozante ni sentis nin pli kaj pli peze kaj la piedoj ribelis. La kapo doloris, la oreloj zumis kaj la brusto sufokiĝis. Ni malfacile spiris kaj perdis la apetiton al bongustaj manĝaĵoj preparitaj de kuiristo por ni. La alpa reakcio atakis nin.

Je tio la komisiono de la redakcio kaj la espero de niaj legantoj donis al mi la kuraĝon venki malfacilojn.

EN DEZERTO

Ĉe la fonto de Jangzi-rivero fluas la riveroj Ĉumar, Tŭotŭo, Garĉju, Buĉju kaj Damĉju, inter kiuj Tŭotŭo, fontanta norde de Tanggula-montaro, estas la plej longa, do ĝi devas esti la ĉefa fonto de Jangzi. Ni forlasis la ŝoseon ĉe Ŭenĉjŭan kaj veturis okcidenten laŭ la norda deklivo de Tanggula-montaro al la neĝkovrita Geladandong, la ĉefpinto de Tanggula kaj la fonto de Tŭotŭo-rivero.

La loko estas dezerta, kun unu loĝanto por ĉiuj dek kvadrataj kilometroj. La aŭto tangis sur montkresto, rivervalo kaj





Serako

Foto de ĜANG ĜIJŬE

herbejo. La ŝoforo atente manipuladis la direktilon, observis la terenon por trovi ireblan linion. Li jen kaj jen haltigis la aŭton kaj legis mapon en skalo 1/10 000 kaj kompason por ĝustigi la orientiĝon.

La aŭto rampis pli kaj pli malrapide pro obstakloj.

Antaŭ ni defiis marĉejo. Tie etendiĝas vastega herbejo. Sur ĉiuj garboj da herboradikoj elkreskas herboj kaj diversaj okulplaĉaj floroj. Tamen, en la loko ne mankas kavoj kaj la senmova akvo odoras ŝimaĵon. Sub la herbotavolo estas enfalujo. Se la aŭto falos en ĝin, ĝi neeviteble surfundiĝos.

Ho ve! la antaŭaj radoj de la aŭto premrompis la herbotavolon. La ŝoforo tuj bremsis la aŭton, sed la radoj jam estis en-

falantaj, kaj akvo ŝprucis el sub la tersurfaco. Ni tuj elaŭtiĝis kaj laŭ la ordono de la ŝoforo anhelante serĉis ŝtonpecojn kaj metis ilin sub la radojn kaj sternis tabulojn sub la radojn. Ni tutforte puŝis antaŭen la aŭton kaj la aŭtisto forte piedpremis la akcelilon. . . En bruado de la aŭto kaj nia "ho ruk" la aŭto elturniĝis el la marĉo.

TRANOKTO SUR ALTEBENAĴO

Veturinte okcidenten 150 km. kaj venkinte multajn malfacilojn, ni fine atingis Tŭotŭo-riveron nemalproksime de la fonto. Ni starigis tendon ie mallofe sur la riverbordo.

Nelonge post kiam ni ŝovis nin en la tendon, ekblovis kaj ekneĝis. Ofta ventego, abunda neĝo

kaj frosto karakterizas la tiean klimaton.

Tie ofte ventas. Precipe en la periodo de decembro ĝis marto de la venonta jaro ĉiutage furiozas ventego. La plej granda ventorapido atingas 12 gradojn.

La jara meza temperaturo de la regiono estas 6 gradoj sub la nulo. En la frosta sezono de oktobro ĝis majo de la venonta jaro la meza temperaturo estas 10 gradoj sub la nulo, dum la plej malalta temperaturo estas 40 gradoj sub la nulo. La varma sezono daŭras de junio ĝis septembro kaj la meza temperaturo estas nur ĉ. 3 gradoj. Tamen, tie la temperatura diferenco inter tago kaj nokto estas grandega: Tage la suno rostas forte, dum nokte oni sentas malvarmegon eĉ en peltaĵo.

La tiea jara precipitaĵo de ĉ. 400 mm. ĉefe falas en la varma sezono, en formo de neĝo kaj hajlo.

Ni jam al kutimiĝis al neĝo-ŝtormo. Sed pro laciĝo kaj forta alpa reakcio ni komplete perdis la apetiton al ĉokolado, kunpremita biskvito kaj sekigitaj bovaĵoj, escepte de enladigitaj fruktoj. Tamen mi devis manĝi ilin. Ni do kuraĝiĝis unu alian: "Manĝu por grimpi la neĝan monton kaj glaciriveron!"

Ni do prenis kunpremitan biskviton. Je ekmanĝo ni vidis sangomakulojn sur la biskvito: La sekaj lipoj refoje sangis! Oni estas senmikroba kaj trinkebla. Oni diris, ke akvo el degelinta firno Ni do ektrinkis la akvon, sed ĝi preskaŭ frostigis niajn internajojn.

SUPERBA NEĜA MONTO

Frumatene por elteni ni devis forpuŝi la dikan neĝon amasigitan nokte antaŭ la por-do. Ni volus lavi al ni la vizaĝon kaj brosi la dentojn, sed ni ne faris tion, ĉar lavtuko kaj dentobroso glaciigis.

Nedegela glacia tavolo




Foto de ĈU SIMING

La hieraŭan neĝŝtormon anstataŭis serena tago. Sude laŭ Tŭotŭo-rivero, la neĝkovritaj montpintoj kaj fluantaj nuboj estis ore kolorigitaj en la fono de matenruĝo. La ĉarma matena pejzaĝo instigis nin al plua marŝo.

Invitite nia vojevdisto, tibeta paŝtisto, venis al ni kondukante ĉevalojn. Oni bezonas rajdi surĉevalo por supreniri al la neĝkovrita monto kaj glacirivero. Post simpla preparo ni ekiris.

En la valo inter la montoj Geladandong kaj Gaĉjadijugang ni sentis ke ni venis en belan fabelan mondon. En la disaj lagoj kreskis herboj kaj flavaj floroj, kiuj plibeligis la blujn lagojn. Sur la akvoj distriĝis aroj da sovaĝaj anasoj. Kiam ni alproksimiĝis al lago, maljunaj anasoj gakte flugis al la ĉielo, dum la anasidoj ne povis leviĝi kaj kriis panike. Ĉe la bordo etendiĝis marĉaj herbejoj, sur kiuj prosperis diverskoloraj floroj. De tempo al tempo trakuris leporoj, gazeloj k.a.

Estas pli agrable trapasi mar-

ĉejon surĉevalo ol per veturilo. La ĉevaloj de altebenaĵo lertas en distingo de danĝera loko. Kaj plie, la ĉevaloj iras sur molaj garboj da herboradikoj, kvazaŭ dancante, kio donis al ni apartan ĝojon.

Ni ĉirkaŭiris montpinton, kaj nia vidkampo plilarĝiĝis. Ho, ni eniris vastan glacian mondon! Oriente kuŝas Geladandong, inter kies montpintoj la ĉefa altas 6 621 metrojn. Okcidente staras la 14 neĝkovritaj montoj de Gaĉjadijugang, inter kiuj la ĉefa pinto altas 6 500 metrojn. La areo kun eterna firno kovras 750 kvadratajn kilometrojn.

Malproksime ĉirkaŭe la neĝaj montoj prenas diversajn formojn de lanco, arĝenta kasko de militisto, piramido ktp. Karesate de la ora sunlumo, la montoj zonitaj per nuboj radiis blindigajn rebrilojn.

GLACIRIVERO — NUTRANTO DE JANGZI-RIVERO

En la valoj inter neĝkovritaj montoj alte pendas gigantaj kristalaj glacilangoj, kiuj estas antaŭaj randoj de glacirivero. Somere la degelinta firno falas kiel blanka silkrubando kaj enfluas Tŭotŭo-riveron.

En la neĝkovrita Geladandong dislokiĝas 40 glaciriveroj kaj en la neĝkovrita Gaĉjadijugang 19. La glaciriveroj sude de la monteĝo turnas sin al Nuĝjang-rivero. Malmulte da akvo el la glaciriveroj okcidente de ĝi enfluas en la landinternan lagon Ĉibuĝang kaj la cetera akvo enfluas en Jangzi. La gigantaj glaciriveroj ekzistantaj dekmi- lojn da jaroj formis la fonton de Jangzi-rivero.

Malsame al la altlatitudaj kontinentaj glaciriveroj sur Antarkto, tie staras montaj glaciriveroj. Ŝajne ili ne moviĝas.



Post degelado de glaĉer-supraĵo

Foto de ĈU SIMING

sed fakte ili moviĝas kelke da centimetroj ĉiutage.

Kiel formiĝis la monta glacirivero? En altebenaĵoj, kie regas frostego kaj abundas neĝo, la neĝo kaj firno nedegelintaj iom post iom formis grandiozajn glaciblokegojn pro frostiĝo de la neĝakvo. Granda kvanto da tia glacio amasiĝas kaj malrapide moviĝas malsupren, formante glaciriveron.

Ĉinio estas lando kun abundo da montaj glaciriveroj en la mondo. La totala areo de la glaciriveroj estas ĉ. 44 000 kvadrataj kilometroj kun akvorezervo de 2 300 miliardoj da kubmetroj. Ĉinaj sciencistoj estas esplorantaj pri degeligo de glaciriveroj. Fine venos la tago, en kiu oni akvumos kampojn, stepojn kaj dezertojn per la akvo el tiuj gigantaj naturaj akvokonservejoj.

MIRINDAJ PEJZAĜOJ DE SERAKOJ

Inter multnombraj glaciriveroj la du glaciriveroj de la neĝa

monto Ĝjanggendiĵu 6 548 metrojn alta sudokcidente de Gelandong estas la plej supra fonto de Jangzi-rivero. Ili havas tenajlan formon, kiu similas al la antaŭaj du piedoj de krabo. La suda glacirivero longas 12.5 km. kaj larĝas 1.6 km., kaj la norda longas 10 km. kaj larĝas 1.3 km.

Post malfacila grimrado ni atingis la glaciriveron Ĝjanggendiĵu. Ĉe ĝia vosto staras belaj serakoj. Iuj el ili similas al spadoj aŭ lancoj pikantaj al la ĉielo, aliaj al svelta knabino, triaj al ĝiba maljunulo, ceteraj al blankaj ursoj, simioj, aŭ antikva kastelo. . .


Kiel formiĝas serakoj? Dum longtempa moviĝo de glacirivero la surfaco krevas de sunradio, vento kaj fluanta akvo. La kreviĝo estas tiel forta, ke la glata surfaco fariĝas jen kava jen konvekso kaj tiele formiĝas diversgrandaj stalagmitaj glaciopintoj. Ili kontinue interligiĝas kaj aspektas kiel pagodaro.

En la serakoj ni ĉiuj estas

mirigitaj de la belaj pejzaĝoj dotitaj de la naturo: ĉielskrapantaj glaciaj kolonoj, konusaj glaciaj stalagmitoj, glaciaj arkpontoj super fluanta akvo el degelinta glacio, glaciaj fungoj, glaciaj tabloj el ŝtonplato subtenata de kolda glacia kolono.

Aparte interesaj estas la glaciaj kavernoj, kiuj impresas kiel kristala palaco. La sunradioj ĉarme lumigas la kavernojn. Ĉe la aperturo kaj sub la plafono de la kaverno pendas aroj kaj aroj da glaciaj stalaktitoj kiel lustroj. Sube rebrilas diversgrandaj stalagmitoj. La kavernaj muroj kvazaŭ gravuritaj, surhavis multe da zigzagaj vejnoj, kiuj aspektis kiel perlaĵ kurtenoj.

Sur la glacirivero Ĝjanggendiĵu kuŝas multaj sulkoj kaj rojoj malsamlarĝaj kaj malsamprofundaj, kiuj zigzagas inter serakoj. Iuj profundas malpli ol unu metro dum aliaj ĉ. kvin metrojn. Jen el tiuj grandaj kaj malgrandaj sulkoj fontas la grandioza, impona kaj torenta Jangzi-rivero!




La fonte de Jangri-ribera



Glaĉeroj ĉe la fonto de Jangzi-rivero

Tŭotŭo-rivero, la plej supra parto de Jangzi-rivero






La riverakvo el degelinta glacio

Foto de ĜANG ĜIJŬE

Serakoj

Foto de ĈU SIMING





En glacia kaverno

Foto de CU SIMING

世界语《中国报道》一九八七年第二期（本年代号：二一九一五）北京市千禧书店第六九二号